

V-19034/1960-1961

# El Popola Ĉinio


## 人民中國報道



PEKINO 1 1 9 6 0

ELDONAS: ĈINA ESPERANTO-LIGO

VERDA VOJO  
 ESPERANCKI LIGONIA TOWARZYSKI  
 SOCIETY OF ESPERANTO - CLUB  
 GDAŃSK-DYREKCJA 214



La 7-an de nov. 1959 finkonstruiĝis la 1-a Traktora Fabriko ĉe Lejang, Henan-provinco.

## FINKONSTRUIĜIS LA 1-A TRAKTORA FABRIKO ĈE LEJANG

(Daŭrigo sur la antaŭlasta paĝo)




Multaj el ĝiaj ekipaĵoj estas fabrikitaj en Ĉinio. Jen estas sesangulaj torniloj el Senjang.

Sovetiaj specialistoj multe helpis la konstruadon kaj produktadon de la fabriko. Jen k-do Petrov instruas ĉinajn laboristojn.



Antaŭ la kompletigo de la unuafaza konstruado, la fabriko jam elfaris 697 54-ĉevalpovajn traktorojn, 534 dren-irigaciajn maŝinojn, pli ol 110 kompletojn da metalurgiaj ekipaĵoj kaj dekoj da gas-traktoroj elbakante fortan personaron teknikan. Jen ĝiaj produktaĵoj: (maldekstre) pumpmaŝinoj, (dekstre) gas-traktoroj.





# Renkonto al la nova antaŭensalto en 1960

*Jena estas traduko de artikolo verkita de Li Fu-ĉun, vic-ĉefministro, aperigita en "Hongki" (Ruĝa Standardo), No. 1, 1960, dusemajna gazeto de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio.* — La Red.

## I

**R**ESPONDE al la alvoko de la Oka Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio kontraŭbatali la dekstreman tendencon kaj streĉi plene la energion kaj dank' al la penado de la tuta popolo, estas superplenumita la plano de nacia ekonomio por 1959. Laŭ materialoj de unuapaŝa statistiko, en industrio, la ĉefaj celitaj ciferoj por jaro 1959 prezentitaj de la Oka Plena Sesio kaj aprobitaj de la Konstanta Komitato de la Nacia Popola Kongreso, estas superplenumitaj. La totala industria produktvaloro multe su-

peris celitan ciferon difinitan de la Oka Sesio, t.e. 25.6-procenta pliigo kompare kun tiu de 1958; produktkvanto de ŝtalo superis la celitan ciferon de 12 milionoj da tunoj kaj sumis pli ol 13 milionojn da tunoj; ankaŭ la produktkvanto de karbo rimarkinde superis la celitan ciferon de 335 milionoj da tunoj. En 1959 la agrikulturo de nia lando alfrontis plej rigoran naturan plagon, iam renkontitan en la lastaj kelkdek jaroj, pli ol 600 milionoj da muoj\*, t. e. pli ol triono de nia tuta kulturata kamparo, suferis katastrofon, tamen ni akiris rimarkindajn atingojn sur agrikultura fronto multe superante celitan ciferon de la totala agrikultura produktvaloro. Estas superplenumita ankaŭ la totala investo de fundamenta konstruado por la jaro 1959. Tiel ni realigis pluan antaŭensaltegon de nacia ekonomio en 1959, post tiu de 1958.

La antaŭensaltego de 1959 estis same antaŭensalto ĉiufanka, kaj eĉ pli bona. En ĉiu ajn branĉo kaj en ĉiu ajn regiono, la socialisma konstruado progresis grandpaŝe. Sur la tereno de industrio tre multiĝis la specoj de produktaĵoj, rimarkinde pliboniĝis la kvalito kaj multe reduktiĝis la produktkosto. Kiel ekzemple, la utiliga koeficiento de la malgranda altforno laŭ moderna procedo atingis en oktobro de 1959 la rezulton de meznombra potaga produkto de ĉirkaŭ 0.9 tuno po kubmetro, kun proporcio de laŭnorma giso de ĉirkaŭ 80% kaj redukto de produktkosto je 40% malpli ol tiu de la lasta kvaronjaro de 1958. En agrikulturo, estiĝis interkombinata ĉiufanka disvolviĝo en terkulturado, forstado, bestbredado, flankokupadoj kaj fiŝado; kaj sen escepte grandmezure kreskis la produkto de grenoj, koton, oleaj plantaĵoj, bastofibraĵoj, teo, tabako, sukeraĵoj, silko, fruktoj, legomoj, medicinaj herboj, kaj diversaj plantaĵoj. Sur la bazo de la ĉiufanka plibona disvolviĝo de industrio kaj agrikulturo, ankoraŭ pli rapidan disvolviĝon akiris la komunik-transportado ol la aliaj ekonomiaj branĉoj, kaj prezentiĝis nova prospera stato en la merkato.

Post la daŭra antaŭensaltego de 1959 la antaŭensalta situacio de altrapida kaj laŭ proporcia disvolviĝo de nacia ekonomio komencita en 1958 en nia lando jam firmiĝis.

## EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Kultura Gazeto  
Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

### Enhavo de N-ro 1 (58), 1960

*Bildo sur la kovrilo — Vivu Paco (Ĉinstila pentraĵo de Huang Hiang)*

#### **Brilaj atingoj de kulturo kaj artoj en Ĉinio**

Granda ĝojo de kvincent milionoj da kamparanoj

Kunveno de herooj en Pekino

Granda kanalo surmonta

#### **Natura naskiĝo post matura embriogenio**

Tradicia amikeco inter ĉinaj elmigrintoj kaj la popolo de Indonezio

Nova disvolviĝo de kulturo kaj edukado en Tibeto

Vojperdo


Esperanto Marŝas

*Bildo sur la dorsa kovrilo — Kanalo surmonta (Lignogravuraĵo de Ŝaŭ Ke-ping)*

La kontinua antaŭensaltado de 1958 kaj 1959 ebligas al ni la plenumon de la ĉefaj celitaj ciferoj, origine difinitaj por la dua Kvinjara Plano, jam en daŭro de nur du jaroj. Laŭ la propono pri la Dua Kvinjara Plano de disvolvado de nacia ekonomio alprenita de la unua kunsido de la Oka Tutlanda Kongreso de la Partio en septembro 1956, estas difinitaj la kresko de industria produktvaloro de 1962 je ĉirkaŭ unuoblo pli kompare kun tiu de 1957, kaj la kresko de agrikultura produktvaloro je ĉirkaŭ 30%. Estas difinita la jara produkto de 10,500,000-12,000,000 tunoj por ŝtalo; de 190-210 milionoj da tunoj por karbo; de 40-43 miliardoj da kilovathoroj por elektro; 60,000-65,000 unuoj por il-maŝinoj; de 8-9 milionoj da pakadoj por koton-ŝpinadoj; de ĉirkaŭ 250 milionoj da tunoj por grenoj; de ĉirkaŭ 2,400,000 tunoj por koton. Ĉiuj tiuj celitaj ciferoj jam estis plenumitaj aŭ

### Konstruado de Hidroelektrejo

*Lignogravuraĵo de Vang Li*




superplenumitaj en 1959. Tiel ni povos en la postaj tri jaroj multe pli grandigi la originajn celitajn ciferojn de la Dua KJP kaj liberigi niajn manojn por plifortigi la malfortajn ĉenerojn de la nacia ekonomio, ebligante la daŭran disvolvadon de nia socialisma konstruado altrapida kaj laŭproportia.

Dank' al la sukcesplena plenumo de la Unua KJP ni jam metis la primaran fundamenton de socialisma industriigo de nia lando, kaj ĝi estas plifortigita de la kontinua antaŭensaltego de 1958 kaj 1959, dum kiu preskaŭ de ĉiuj pezaj industrioj kreskis la produktkvanto je pli ol unuoblo. Escepte de Tibeto, starigis en ĉiuj provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj en nia lando, ferŝtala kaj maŝinkonstrua kaj aliaj pezaj kaj malpezaj industrioj. Estas rapide formiĝanta kompleta sistemo de industrioj en la tuta lando, kun ferŝtala kaj maŝinkonstrua industrioj kiel centro, kombinanta grandajn, mezgrandajn kaj malgrandajn entreprenojn, kun pli racia geografia dislokigo; kaj iom post iom ŝanĝiĝas la malekvilibra stato de ekonomia disvolviĝo de diversaj regionoj. Jam en 1958 la memproviza proporcio de ŝtalaj produktoj kaj ekipaĵoj jam atingis 80%, kaj plian paŝon antaŭen ĝi faris en 1959. Stimulate de la devizo de teknika revolucio, ĉiuj entreprenoj sukcesis plialtigi sian teknikan nivelon kaj plivastigi siajn teknikajn trupojn. Ni jam povas mem projekti kaj konstrui modernajn entreprenojn teknike relative pli kompleksajn. Samtempe, la popola komunumo jam fariĝis la baza organizo de nia vasta kamparo. Ĝi estas plej bona organiza formo, kombinanta la politikon kaj ekonomion, por mobilizi la pli ol 500 milionojn da kamparanoj de nia lando aktive partopreni la socialisman konstruadon, kaj malfermas plej vaste la pordon al rapida disvolvo de agrikulturo, kaj de industrio kaj aliaj ekonomiaj, kulturaj entreprenoj en la kamparo. Post unu-jara reordigo kaj evoluo, ĝia supereco jam pli evidentiĝis.

Kiam ni publikigis en 1956 la Duan KJP, kaj poste en somero de 1959 ni reĝustigis la celitajn ciferojn de la koncernata jaro, la imperiistoj disvastigis kalumniojn kaj diversajn kriaĉojn por ataki nian landon kaj por konfuzi la popolojn de la tuta mondo. Sed la evoluo de la historio senkompate frakasis tiujn imperiistajn kalumniojn kaj kriaĉojn.

Ni plenumis en daŭro de du jaroj la taskojn, kiujn ni iam opiniis plenumotaj en kvin jaroj, kaj tio ne refuteble atestas, ke la Ĝenerala Linio de la Partio "streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui la socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie" kun serio da rilatantaj politikoj, estas linio karakterizata per la kombino de la universala vero de marksism-leninismo kun la konkreta praktikado de konstruado de nia lando, kaj estas plene konforma al la objektiva leĝo de ekonomia disvolviĝo de Ĉinio. Dum la dujara grandioza praktikado ni





### En Granda Antaŭensaltado

*Lignogravuraĵo de Ŝen Liang-gian*

amasigis riĉajn spertojn el sinsekvaj grandaj sukcesoj, kaj ankaŭ akiris valorajn instruojn el la dumtempaj, malmultaj, partaj malfaciloj kaj zigzagoj. Ĉiuj scias, ke en sia evoluado ĉiu ajn nova grandioza afero ne eviteble renkontas iujn malfacilojn kaj zigzagojn kaj tamen ĉiam sukcesas ilin venki kaj antaŭen marŝi senhalte. Per ĉiufankaj spertoj el ĉiuj kampoj dum la granda antaŭensalto estas armita nia vasta kadraro, kaj ankaŭ la tuta popolo. Kun tiuj spertoj ni povos pli profunde ekkoni la Ĝeneralan Linion kaj ĝin sekvi pli konscie, kaj labori multe pli aktive kaj kreive en socialisma konstruado. Sub la kondiĉoj materiaj kaj teknikaj kreitaj de la kontinua granda antaŭensalto en la du jaroj, kiel supre menciitaj, kaj sub la kondiĉoj politikaj kaj mensaj kreitaj dank' al la enkorpiĝo de la Ĝenerala Linio, kiel ĉi tie diritaj, estas tute certa sen ia dubo la daŭra disvolviĝo de antaŭensaltado.

**E**N sia parolado “Pri la problemo de ĝusta traktado de internaj kontraŭdiroj de la popolo” K-do Maŭ Ze-dong diris: “En nia lando troviĝas pli ol 500 milionoj da agrikultura loĝantaro. Gravegan influon havas la stato de la kamparanoj en ekonomia evoluo kaj fortikiĝo de la politika reĝimo en nia lando.” Li diris ankaŭ: “La demando pri la vojo de industriigo, ĉefe koncernas la rilatojn inter peza industrio, malpeza industrio kaj agrikulturo en ilia disvolviĝo. La centro de nia ekonomia konstruo estas peza industrio. Tion ni devas certigi. Sed samtempe ni devas doni sufiĉan atenton al la disvolvo de agrikulturo kaj malpeza industrio”. La plej elstara sukceso de la kontinua antaŭensaltego en lastaj du jaroj estis tio, ke sub la gvido de K-do Maŭ Ze-dong nia Partio jam formulis ĝustan ĝeneralan linion por solvi la problemon de la rilatoj inter peza industrio, malpeza industrio kaj agrikulturo en ilia disvolviĝo, t.e. nia Partio jam trovis vojon por socialisma industriigo, kies ĝusteco estas pruvit de provo en praktikado.


Kamparana kaj agrikultura problemo ĉiam estas la unuarange grava problemo en nia lando, dum la tempo, ĉu de demokratia revolucio, ĉu de socialisma revolucio. Nia sperto en multjara socialisma konstruado, precipe en la lastaj du jaroj, foje kaj refoje pruvis, ke se disvolviĝas nia agrikulturo, fariĝas pli facilaj ankaŭ ĉiuj niaj ekonomiaj laboroj. Faciliĝas ne nur la malpeza industrio, sed ankaŭ la peza. Tial akceli la disvolviĝon de agrikulturo estas la centra ĉenero por altrapide kaj laŭproporcie disvolvi la socialisman ekonomion en nia lando.

La ekstreman gravecon de agrikulturo en disvolvado de nacia ekonomio K-do Maŭ Ze-dong eksplikis jam de multaj jaroj. En la raporto “Pri koalicia registaro” farita en 1945 li diris: “Kamparanoj—ili estas la origino de laboristoj. En estonteco ankoraŭ milionoj da kamparanoj eniros en la urbojn, en la fabrikojn. Por konstrui potencon nacion industrion kaj multajn modernajn urbegojn, Ĉinio nepre traŭros longan procedon por transformi la loĝantaron agrikulturan en loĝantaro industria.” “Kamparanoj—ili estas la ĉefa subteno de la merkato por ĉina industrio. Nur ili povas liveri plej riĉajn grenojn kaj krudajn materialojn kaj konsumi plej grandkvantajn industriajn produktojn.” Post la tutlanda liberiĝo en 1949 kaj kiam la industrio de nia lando restatiĝis kaj prospere disvolviĝis, K-do Maŭ Ze-dong tuj montris, ke la disvolviĝo de agrikulturo devas respondi al la bezono de socialisma industriigo. Li gvidis la revolucion movadon de kooperativigo de la kamparanoj en la tuta lando. Poste en sia parolado “Pri dek gravaj rilatoj” K-do Maŭ Ze-dong montris, ke ĝusta trak-

tado pri la rilato inter agrikulturo kaj industrio estas problemo de unuaranga graveco por disvolvi la nacian ekonomion multe, rapide, bone kaj ekonomie. Tiun ideon K-do Maŭ Ze-dong poste resumis jene: “Disvolvado de industrio devas esti entreprenata samtempe kun disvolvado de agrikulturo,” kaj “Peza industrio devas trovi sian ĉefan merkaton en agrikulturo.” Estas konate, ke tiu ĉi penso estas jam rigardata kiel unu el la gravaj direktoj inkluzivitaj en la ĉefaj punktoj de la Ĝenerala Linio.

Sub gvido de tiu direkto, la totala produktvaloro de industrio en 1958 kreskis je 66% kompare kun tiu en 1957, kaj tiu de agrikulturo — je 25%, la kresko de industrio estas 1½ obloj de tiu de agrikulturo; la totala produktvaloro de peza industrio kreskis je 103%, de malpeza industrio — je 34%, kaj la kresko de peza industrio estas du obloj de tiu de malpeza industrio. Kompare kun 1958, en 1959, la totalaj produktvaloroj de industrio kaj agrikulturo kaj de peza kaj de malpeza industrioj daŭre kreskis grandmezure. Sed la rapideco de kreskado de agrikulturo jam proksimiĝis ĝis duono de tiu de industrio, kaj la distanco inter la rapidecoj de kreskado de peza kaj malpeza industrioj ankaŭ multe mallongiĝis. Tiel en la samtempa antaŭensaltego de agrikulturo, peza kaj malpeza industrioj, la proporcio inter industrio kaj agrikulturo fariĝis pli harmonia, kaj same ankaŭ inter peza kaj malpeza industrioj.

La pli harmonia proporcio inter agrikulturo, malpeza kaj peza industrioj utilas al plua antaŭensalto de la nacia ekonomio kaj al plifortikiĝo de laborista-kampana alianco. La laborista-kampana alianco en nia lando estas alianco sub gvido de laborista klaso kaj daŭre fortikigata kaj disvolvata tra la demokratia kaj socialisma revolucioj. Post la tutlanda liberiĝo nia laborista-kampana alianco trairis jam du etapojn: en la unua etapo, la alianco estas starigita surbaze de plena realigo de agrara reformo, kaj en la dua etapo surbaze de la socialisma posedanteco tra la kooperativigo kaj popolkomunumigo de agrikulturo. Nun la alianco komencas eniri sian trian etapon kaj devas stariĝi sur nova bazo t.e. samtempe kun la daŭra disvolviĝo de socialisma posedanteco, efektiviĝi paŝon post paŝo la teknikan reformon kaj modernigon de agrikulturo. Dank’ al la efektiviĝo de popola komunumo kaj la rapida kresko de produktado,



Streĉa sterkokolektado tuj post neĝado

*Lignogravuraĵo de Jin Guo-guang*

grandmezure kreskas la komuna akumulado necesa por pligrandigita reproduktado en agrikulturo, kaj la pligrandigo de produkta skalo kaj plimultgo de entreprenataj okupoj ankaŭ kreas favorajn kondiĉojn por teknika reformo en agrikulturo. Dume, dank’ al la efektiviĝo de kontinua antaŭensaltego en la peza industrio, multe pli ol antaŭe kreskis la produkto de ŝtalo kaj maŝinoj bezonataj de agrikultura teknika reformo; kaj la ĝenerala disvolvo de lokaj industrioj, precipe tiuj de gubernioj kaj popolkomunumoj, povas ludi ĉiam pli grandan rolon en la agrikultura teknika reformo. En tiaj cirkonstancoj estas eble antaŭenpuŝi paŝon post paŝo la laboristakampanan aliancon al nova etapo, t.e. etapo de modernigado agrikultura.

Iuj kamaradoj opinias, ke rapida disvolviĝo de agrikulturo ne konformas al la direkto doni la unuan lokon al disvolviĝo de peza industrio. Eraras certe tia opinio. Rapida disvolvo de agrikulturo ne nur ne malhelpas, kontraŭe, multe akcelas la disvolviĝon de peza industrio. K-do Maŭ Ze-dong diris: “Ĉiuj scias, ke ekzistas tre intima rilato inter malpeza industrio kaj agrikulturo. Sen agrikulturo ne ekzistus malpeza industrio. Tamen, ankoraŭ ne estas klare vidata tio, ke sian gravan merkaton peza industrio devas trovi en agrikulturo. Sed kun la paŝo-post-paŝa disvolviĝo de teknika reformo kaj pli kaj pli moderniĝo de agrikulturo, ĉiam pli multiĝos produktoj kaj konstruadoj servantaj al agrikulturo — maŝinoj, sterkoj, konstruadoj de akvovuitligo, elek-



troenergio kaj transportado, brulaĵoj kaj konstruaj materialoj por la konsumantoj, kaj tiam oni pli facile komprenos, ke sian gravan merkaton peza industrio trovas en agrikulturo.” Nia agrikulturo estas agrikulturo entreprenata de pli ol 500 milionoj da loĝantoj. Ĝi estas plej vasta enlanda merkato senkompara en iu ajn lando en la tuta mondo, ne nur por malpeza industrio sed ankaŭ por la peza. Kun la rapida disvolviĝo de agrikultura produktado kaj la progresado de agrikultura teknika reformo, agrikulturo postulas de la peza industrio grandan kvanton da produktaj rimedoj agrikulturaj. Por longa estonteco, nia lando bezonos kelkajn milionojn da traktoroj, kelkajn milionojn da ŝarĝaŭtoj, kelkdek milionojn da tunoj da kemiaj sterkaĵoj, grandan kvanton da elektroenergio, brulaĵoj, konstruaj materialoj kaj aliaj diversaj agrikulturaj maŝinoj kaj modernaj ekipaĵoj por komunikado kaj transportado. Por kontentigi tiujn bezonojn nia peza industrio ne povas disvolviĝi nur kelkoble, sed dekkelkoble, kelkdekoble. Post kiam peza industrio estos ekipinta agrikulturon per tiom da produktaj rimedoj agrikulturaj, grandmezure disvolviĝos la diversspeca entreprenado de agrikulturo, forstado, bestbredado, flankokupado kaj fiŝado, la totala produktkvanto de agrikulturo kreskos kelkoble, dekkelkoble, la agrikultura laborproduktiveco altiĝos kelkdekoble, centoble, kaj agrikulturo povos liveri tre riĉajn produktojn agrikulturajn, brutajn, arbarajn kaj diversajn aliajn krudajn materialojn por industrio, kaj provizi cent milionojn da laborfortoj al industrio kaj aliaj entreprenoj.

Oni povas vidi el tio, doni la unuan lokon al disvolviĝo de peza industrio kaj rapide disvolvi agrikulturon estas du aferoj reciproke kondiĉantaj, ligan-taj kaj akcelantaj. Nur tiel niaj agrikulturo, malpeza kaj peza industrioj kaj same nia tuta nacia ekonomio povas kreski kun alta rapideco. Iuj reakciaj burĝaj instruituloj de nia lando ĉiam opinias, ke agrikulturo estas negativa faktoro en nia nacia ekonomio, la pli ol 500 milionoj da kamparanoj estas peza ŝarĝo al nia socialisma konstruado. Ili opinias ankaŭ, ke ju pli disvolviĝos la socialisma industriigo, ju pli disvolviĝos la agrikultura teknika reformo, des pli multe da laborfortoj en la kamparo senokupiĝos kaj ankaŭ la ŝtato ne trovos rimedon por ilin okupi. Kvankam tiajn gurditajn frazojn jam refutis la faktoj en la lastaj jaroj, tamen ili daŭrigas disvastigi sian venenon inter la popolo. Kial do? Ĉar iliaj putraj burĝaj konceptoj kaj egoismo vualas iliajn okulojn, ke ili ne vidas, aŭ ne volas vidi la grandiozan rolon ludatan de agrikulturo kaj la grandiozan forton de la pli ol 500 milionoj da kamparanoj en nia socialisma konstruado. Ili rigardas socialismon per burĝaj okuloj, tial ili povas vidi nenian superecon de socialismo

kaj nek ian grandiozan rolon de nia multnombra loĝantaro en la grandioza afero de kreado de nova Ĉinio.

### 3

**L**A tasko por disvolvi la nacian ekonomion en la jaro 1960, ĝenerale dirite, estas: pli bone efektivigi la Ĝeneralan Linion de la Partio streĉi plene la energion, kaj strebi forte antaŭen por konstrui la socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie; pli bone efektivigi la fundamentan politikon de la Partio, samtempe disvolvi industrion kaj agrikulturon, kaj klopodi por daŭra antaŭensaltado de la nacia ekonomio surbaze de la kontinua antaŭensaltado en 1958 kaj 1959. Laŭ la direkto de K-do Maŭ Ze-dong, por efektivigi tiun ĉi taskon, nia aranĝado de la naci-ekonomia plano de 1960 devas plue certigi agrikulturon kiel la fundamenton, kaj pli bone trakti la rilatojn inter agrikulturo, malpeza kaj peza industrioj laŭ la principo kombini la unualokan disvolvion de peza industrio kun la rapida disvolvo de agrikulturo, kaj plifortigi laŭplane kaj laŭpaŝe la malpli fortajn branĉojn industriajn, kiel tiujn de transportado, energio, minekspluato k.t.p. por krei kondiĉojn por pli bona ĉiufanka antaŭensaltado en la venontaj jaroj.

La politiko plue fiksi agrikulturon kiel la fundamenton estas elstara problemo nova por nia tuta laboro de planado. La nova enhavo de naci-ekonomia plano por la jaro 1960 postulas, ke tiu ĉi politiko estu fidele efektivigata por akceli la progreson de ĉiuj branĉoj de la nacia ekonomio.

En 1960, samtempe kun plua firmigo de la popolaj komunumoj, devas esti aktive kaj paŝo-post-paŝe antaŭenpuŝata la teknika reformo de agrikulturo por plialtigi la agrikulturan labor-produktivon. Tiucele, la ŝtato pligrandigos grandmezure la provizon de maŝinoj, fero kaj ŝtalo, kemiaj sterkoj k. a. produktaj rimedoj bezonataj de agrikulturo. Samtempe, kampanjoj por konstruado de akvoutiligaj konstruaĵoj kombinanta la grandajn, mezgrandajn kaj malgrandajn projektojn devas esti disvolvataj en ĉiuj regionoj. En Ĉinio konstruado de akvoutiligaj projektoj estas la plej grava kondiĉo, hodiaŭ, por pliiigi agrikulturan produkton. En 1959 ni suferis severajn katastrofojn de trosekeco kaj inundo: Se ni ne estus disvolvintaj popolamasajn kampanjojn por grandskala akvoutiliga konstruado surbaze de agrikultura kooperativigo kaj popolkomunumigo, tiel ke multe pliiĝis la irigaciata areo kaj multe pli grandigis la forto por kontraŭbatali trosekecon kaj inundon, estas tute ne imagebla la miraklo, ke en 1959 la agrikultura

produkto ne nur ne malpliĝis, sed eĉ faris daŭran antaŭensalton. Surbaze de la kampanjoj de akvo-utiliga konstruado agrikultura dividitaj en aŭtuno de 1959, kaj partoprenitaj de dekoj da milionoj da laborantoj, en la jaro 1960 ni daŭre plenumos bone tiun ĉi taskon plimultigi novajn irigaciajn areojn, pli-grandigi la provizon de irigaciaj kaj drenaj ekipaĵoj, pliigi la utiligatecon de la irigaciaj areoj por senĉese kaj firme plialtigi la agrikulturan produkton.

Alia grava rimedo por efektiviĝi daŭran antaŭensalton de agrikultura produkto en 1960 estas grand-skala disvolvado de porko-bredado, por plimultigi organikan sterkon. La produkta kvanto de kemia sterko de nia lando ankoraŭ estas ne granda, kaj en la proksima estonteco, la produktita kemia sterko povos esti uzata nur koncentre por industriaj plantaĵoj por pliigi ilian po-muan produkton. Eĉ kiam la kemia sterko produktiĝos en granda kvanto, la ĉefa fonto de nia sterko ankoraŭ restos la bredado de porkoj kaj aliaj dombestoj. Se la tuta lando povos unue atingi la celon de unu porko por ĉiu persono en kelkaj jaroj, kaj poste de unu porko por ĉiu muo da tero en aliaj kelkaj jaroj, kiel kelkaj produktaj brigadoj, popolaj komunumoj kaj iuj gubernioj jam faris, tiam plus ege pligrandigita produkto de kemia sterko, la problemo de sterkoj de nia lando povos esti plene solvita. Porka sterko kaj aliaj besto-sterkoj estas organikaj sterkoj, kaj estas multe pli bonaj ol neorganikaj kemiaj sterkoj. On povas tiel diri, ke porko estas malgranda fabriko de organika sterko. Krome, porkviano estas manĝaĵo, porkaj haregoj kaj feloj estas materialoj por fabriki produktajn ĉiutage uzatajn, kaj la internajoj de porkoj estas materialoj por valoraj medikamentoj. Ĉiuj partoj de la porka korpo estas valoraj kaj havas gravan ekonomian valoron, nur se ili estas bone utiligataj. Tial, estas erare subtaksi kaj ne energie disvolvi la bredadon de porkoj.

Ankoraŭ alia rimedo por efektiviĝi daŭran antaŭensalton en agrikultura produkto en 1960 estas disvolvi diversspecan entreprenadon en agrikulturo, daŭre plenumante la politikon preni grenproduktadon kiel la akson. Grava kaŭzo de tio, ke la totala produktita valoro de agrikulturo en la jaro 1959 multe superis la celon de antaŭtaksita kresko de 10 procentoj, kuŝas en tio, ke ekde la printempo de 1959, la diversspeca entreprenado en agrikulturo ricevis ĝeneralan priatenton kaj tio akcelis ĉiufankan disvolvon de agrikulturo. Tio ĉi estas tre grava sperto. En 1960, garantiante pli grandan kreskon de grenprodukto, ni devas entrepreni samtempe kulturadon de grenplantoj kaj industriaj plantaĵoj, entrepreni samtempe agrikulturon, forstadon, bestbredadon, flankokupojn kaj fiŝadon, kaj doni apartan atenton al agrikulturo kaj bestobredado. Kun granda kresko de grenproduktado, ni havos pli multe da furaĝo kaj fojno por bredi pli multe da dombestoj. Kaj inverse, kun

granda disvolvo de bestobredado, ni havos pli multe da sterko por disvolvi agrikulturon. Nia direkto estas ebligi samtempan disvolviĝon de grenoj, kontono, oleaj plantaĵoj, bastofibraj plantaĵoj, teo, tabako sukeraĵoj, silko, fruktoj, legomoj, medicinaj herboj kaj diversaj-plantaĵoj.

La granda disvolvo de agrikulturo, unuflanke liveros pli multe da krudaj materialoj al la malpeza industrio kaj tiel akcelos ĝian grandan disvolviĝon; aliflanke, ĝi postulos de la peza industrio ĉiam pli grandan provizon de produktaj rimedoj, kaj tiel akcelos grandan disvolvon de peza industrio.

La centra problemo en disvolvado de malpeza industrio en la jaro 1960 estas diversflanke plivastigi la provizajn fontojn de krudaj materialoj. Kvankam ĉiujare pligrandiĝis senĉese la utiligateco de la ekipaĵoj de nia malpeza industrio, tamen troviĝas ankoraŭ konsiderinde granda latentata forto en ĝi. Por plene utiligi la nunajn ekipaĵojn de la malpeza industrio kaj ankoraŭ pli grandigi ĝian produkton, ni devas multe klopodi por trovi novajn specojn de krudaj materialoj, krom pliigi la produktadon kaj aĉetadon de krudaj materialoj kreskigataj en kampoj. Ni devas vaste kolekti diversajn sovaĝajn kreskaĵojn kaj bestojn, kaj ĉiuspecajn krudajn materialojn utiligeblajn por malpeza industrio kiel la ŝelojn de kontonaj kaj tabakaj tigoj, la tigojn de sezamo, maizo ktp. Kaj samtempe, la departementoj por peza industrio ankoraŭ devas preni aktivajn paŝojn por laŭeble pligrandigi la produkton de krudaj materialoj por fabrikado de porkonsumaj varoj. Konforme al la ĉiam kreskantaj bezonoj de la popola vivo, ni ankaŭ devas entrepreni en konvena mezuro la fundamentan konstruadon de malpeza industrio, kaj konstrui certajn entreprenojn de malpeza industrio, kiujn la popola vivo urĝe bezonas kaj por kiuj la provizado de krudaj materialoj estas garantioble, kiaj sukera rafinejo, paperfabriko, kotonŝpina fabriko, fabriko de artefaritaj fibroj k. a.

Peza industrio, ĝuante la unua-lokan disvolvon, devas en 1960 daŭre preni la produkton de ŝtalo kiel akson, plifortigi ĝian subtenon al agrikulturo, plifortigi la malfortajn ĉenerojn de nia nacia ekonomio, plialtigi la kvaliton kaj plimultigi la specojn de la produktaj, kaj ĝustamezure entrepreni novajn konstruadojn. Subteni la teknikan reformon de agrikulturo estas nemankebla parto de socialisma industriigo, kaj ĉiuj departementoj de nia peza industrio devas starigi la vidpunkton de servado al agrikulturo, kaj rigardi la subtenadon al la teknika reformo de agrikulturo kiel sian plenumandan devon. Ĉiuj entreprenoj fabrikantaj produktajn rimedojn por agrikulturo devas konkrete pristudi la aktualajn, siatempajn kaj sialokajn bezonojn, laŭeble konformigi sian produktadon al tiuj bezonoj kaj ellabori planon de disvolvado por la venontaj jaroj. Ĉar plibonigitaj kaj duonmekanigitaj instrumentoj agrikulturaj aplikiĝos en nia



agrikulturo en la venontaj kelkaj jaroj, la lokaj industrioj de ĉiuj niveloj kaj de popolaj komunumoj devas plene utiligi siajn fortojn, kombinante modernajn produktometodojn kun la indiĝenaj, por diversflanke antaŭenpuŝi la teknikan reformon de agrikulturo. Post la dujara kontinua antaŭensaltego, la rilato inter diversaj branĉoj de nia peza industrio jam pli harmoniiĝis, kaj certaj antaŭe malfortaj branĉoj jam rapide kuratingis la ceterajn. Tamen ankoraŭ ekzistas kelkaj branĉoj relative malfortaj kiel la energiaj, certaj min-ekspluatataj kaj petrola industrioj. La peza industrio daŭre disvolvata en la unua loko, devas klopodi por plirapidigi la konstruadon de tiuj ĉi branĉoj, ke ili pli bone respondu al la bezonoj de la daŭra antaŭensaltado de la tuta industrio kaj de la tuta nacia ekonomio.

Ĉiuj entreprenoj de la peza industrio, kaj antaŭ ĉio la mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj, devas en la daŭra antaŭensalto de produktado multe strebi por altigi sian teknikan nivelon por akiri samtempan antaŭensalton en kvanto, kvalito kaj specoj de la produktaĵoj. Por garantii sian seninterrompan antaŭensaltadon kaj plibonon servadon al la konstruado de agrikulturo, malpeza industrio, komunikado kaj transportado kaj nacidefendo en 1960 kaj la postaj jaroj, la diversaj branĉoj de peza industrio daŭrigos grandskalan fundamentan konstruadon en 1960. En konstruado, oni devas pli bone efektiviĝi la politikon de kombino de grandaj entreprenoj kun la mezgrandaj kaj malgrandaj kaj tiu de racia utiligo de la malnovaj apudmaraj industriaj bazoj kun la aktiva konstruado de la novaj en interna parto de la lando, por pli bone solvi la problemojn de skalo de konstruado de entreprenoj kaj racia geografia dislokigo de industrioj.

Unu el la gravaj taskoj en la disvolvo de nacia ekonomio en la jaro 1960 estas plifortigo de la konstruado de komunikado kaj transportado, por ke ili konformiĝu al la bezono de la daŭra antaŭensaltado de produkto kaj konstruado. La konstruado de fervojoj estas la ĉefpunkto de la konstruado de komunikado kaj transportado. La trunkaj kaj branĉaj fervojlinioj konstruitaj en 1960 nombriĝos multe pli ol tiuj konstruitaj en la pasintaj jaroj, kaj ni devas garantii la plenumon kaj superplenumon de tiu ĉi tasko. Ekde la jaro 1958, sufiĉe multaj simplaj kaj malpezrelaj fervojoj konstruiĝis en diversaj lokoj. Tio estas konkretiĝo de la industria politiko de samtempa disvolvado de grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj entre-



**Plene streĉu la energion en produktado! Festu abundan rikolton per kantoj kaj dancoj!**

*Novjara pentraĵo de He Jan-jong*

prenoj, kaj de samtempa alprenado de modernaj kaj indiĝenaj metodoj en produktado, sur tereno de komunikado kaj transportado. Nun jam estas klare por ni, ke tute prava estas la tuta serio de politikoj en konstruado de fervojoj—samtempa konstruado de pezrelaj kaj malpezrelaj fervojoj, samtempa konstruado de modernaj kaj simplaj fervojoj, samtempa konstruado de trunkaj linioj, branĉaj linioj kaj specialaj linioj kaj samtempa entreprenado de konstruado de novaj linioj kaj plifortigo de la malnovaj. Tiuj ĉi politikoj devos esti daŭre praktikataj en 1960. Kaj krome, tiu ĉi sperto devos esti aplikata al ĉiuj branĉoj de komunikado kaj transportado laŭ la konkretaj kondiĉoj.

En la jaro 1960, agrikulturo, malpeza industrio, peza industrio kaj komunikado-transportado, ĉiuj devas pli vaste kaj pli profunde disvolvi teknikan renovigon kaj teknikan revolucion. La faktoj klare montras, ke senfina estas la ebleco de teknika renovigo, kaj kiam la laborfervoro estas bone kombinita kun teknika renovigo, la latentaj fortoj de homoj kaj materio povas esti pli bone liberigataj kaj la produktado forte puŝata al senĉesa antaŭensalto. Teknika renovigo kaj teknika revolucio kompreneble devas esti vaste efektiviĝita en la teknike postgintaj mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj kaj teknike kompare postgintaj malnovaj entreprenoj. Sed eĉ en la grandaj modernaj entreprenoj nove konstruitaj ekzistas ebleco kaj neceso efektiviĝi teknikan renovigon kaj teknikan revolucion. La altrapideca disvolvo de nia ekonomio en la estonteco devas dependi de du fontoj: unu estas entrepreni fundamentan konstruadon por plimultiĝi novan produktan forton, la alia

estas efektiviĝi teknikan renovigon kaj teknikan revolucion en la ekzistantaj entreprenoj kaj en ĉiuj branĉoj de nia nacia ekonomio por senĉese liberigi latentajn fortojn por grandmezure plialtigi la laborproduktivon. En disvolvado de tekniko ni devas havi firman decidemon kaj memfidon kaj en la spirito de sinapogo al niaj propraj rimedoj, por kuratingi kaj ekposedi la progresintan teknikon de la mondo en kompare mallonga tempo. Por tion atingi, ĉiuj branĉoj devas decideme sekvi la popolamason linion, daŭre senkatene mobilizi la popolamason, frakasi superstiĉojn, liberigi la penson, flegi la spiriton kuraĝe pensi kaj agi, subteni la raciigajn proponojn kaj inventojn de la amaso kaj disvastigi la progresintajn spertojn. La entreprenoj devas plifortigi la kulturan kaj teknikan edukadon de laboristoj kaj oficistoj altiĝi iliajn kulturan kaj teknikan nivelojn, trejni altgradajn kaj mezgradajn teknikistojn en kunlaborado kun la edukaj departementoj por konstrui fortan armeon de laborista scienca kaj teknika personaro politike progresema kaj profesie kompetenta.

En teknika novigado kaj teknika revolucio, oni devas apliki la metodojn preni ambaŭ finojn por movi la mezon, t. e. unuflanke atenti pri la teknike progresintaj unuoj kaj aliflanke atenti pri la teknike postgintaj unuoj, unuflanke atenti pri la plej moderna tekniko kaj aliflanke atenti pri la simpla tekniko, por ĝenerale levi la teknikan nivelon en nia lando.

Por plenumi la taskon de daŭra antaŭensaltado en agrikulturo, malpeza industrio, peza industrio, komunikado kaj transportado kaj por vaste disvolvi teknikan novigon kaj teknikan revolucion, la decida afero estas persisti la politikon de kombino de centralizita gvidado kun disvolvo de popolamasaj movadoj kaj daŭrigi la disvolvon sur ĉiuj frontoj la movadon de produktpliigo kaj ŝparado. Nur dank' al disvolvo de amasaj movadoj en granda skalo kun teknika novigo kaj revolucio kiel ĉefa enhavo, fariĝos ebla la pli bona kombinado, tiel ke la laborentuziasmo de la amaso ĉiam pli alte leviĝos. Kaj nur en la movado la amaso povas esti hardita, la kolektiva saĝo plene elmontrita, kaj la gvidantaj kadroj de diversaj niveloj

---

## Brilaj atingoj de kulturo kaj artoj

Jene estas artikolo de <sup>Ĝ</sup>Sen Jan-bing, Ministro de kulturo,  
Popola ĵurnalo de la 9-a de oktobro, 1956.

“Kune kun la alveno de la alta tajdo de ekonomia konstruado neeviteble aperos alta tajdo de kultura konstruado,” asertis Prezidanto Maŭ ĉe la Unua Plena Sesio de la Ĉina Popola Politika Konsiliĝa Konferenco en 1949. La grandioza progreso de la kulturaj laboroj en lastaj dek jaroj bone pruvis tiun ĉi grandan antaŭdiron.

### Grandaj atingoj en 10 jaroj

En la lastaj dek jaroj, konforme al la grandioza konstruado ekonomia efektiviĝis ankaŭ grandskala konstruado kultura. Ni reformis laŭ la bezonoj de la popolo la kulturajn establojn postlasitajn de malnova Ĉinio kaj samtempe starigis multe da novaj kulturaj entreprenoj. La popolamaso komencis posedi kulturon, kaj disvolvis vastajn vivoplenajn amasajn kulturajn agadojn. Remuldinte sian ideologion kaj hardiĝinte en korp-laboroj la literaturaj kaj artaj laborantoj pli interligiĝis kun la laboranta popolo, plialtigis sian politikan konscion kaj kreis multajn eminentajn verkojn literaturajn kaj artajn. Jam komencis formiĝi armeo de literaturistoj kaj artistoj armi-

taj per marksismo-leninismo. La kulturaj kaj artaj laboroj povis akiri tiajn grandajn sukcesojn dank' al la korekta gvidado de la Partio kaj la senŝancela efektivigo de la partia politiko por kulturo kaj arto fare de la tuta kultura kaj arta laborantaro.

La kulturaj kaj artaj laboroj de nova Ĉinio servas al la vasta laboranta popolo, kun celo kontentigi iliajn postulojn tiuflankajn. Kulturo kaj artoj jam fariĝis potencaj armiloj por eduki la popolamason pri socialismo kaj komunismo. Sub Kuomintang-a regado la progresema kulturo estis subpremata kaj la laboranta popolo longe restis kulture postginta. La tiamaj kulturaj entreprenoj jam estis ridinde malmultaj kaj tiuj kiuj postrestis el ili tute ne povis respondi la bezonon de la laboranta popolo. Al tiuj malnovaj kulturaj entreprenoj ni laŭpaŝe faris reformojn, por ke ili ricevu novan enhavon socialisman kaj tio kion malmultaj ekspluatantoj ĝuis fariĝu instrumentoj por servi la popolamason. Ni starigis samtempe grandan kvanton da diversaj novaj kulturaj organizoj. Senprecedence disvolviĝis la novaj socialismaj kulturaj laboroj. Kulturaj palacoj kaj stacioj, kluboj, bibliote-



povas kompreni pli bone la sentojn kaj postulojn de la amaso, lerni iliajn senliman entuziasmon kaj kresmon kaj tiel levi la nivelon de gvidaj laboroj.

Ni nepre devas persisti en la gvidado de la Partio kaj la estrado de politiko. En ĉiuj entreprenoj kaj institucioj, en ĉiuj departementoj kaj lokoj, la batalo kontraŭ dekstrema tendenco nepre devas daŭri ĝisfine; burĝa ideologio nepre devas esti ĝisfunde malkovrita kaj kritikita, kaj socialismaj kaj komunismaj ideoj nepre devas esti starigitaj.

La tre riĉaj spertoj, kiuj ni akiris en grandskalaj amasaj movadoj ekde la granda antaŭensalto en 1958, koncentriĝis al unu punkto, nome: ni devas alte levi la standardon de la penso de Maŭ Ze-dong, serioze studi liajn instruojn kaj ilin propagandi vaste. Nur se ni vere komprenas la principojn elmetitajn de Kamarado Maŭ Ze-dong kaj ilin aplikas, firme apogas nin sur la iniciatemo kaj kreemo de la amaso, ni certe kontinue rikoltos grandajn venkojn en socialisma konstruado kaj atingos daŭran, ĉiuflankan, ĉiam pli bonan antaŭensalton en nia nacia ekonomio.

kaj plisuperaj nombris 360, t. e. dekvin-kaj-duoble pli multe ol en 1936. Antaŭ la Liberiĝo en 1949 apenaŭ troviĝis iu ajn kultura establajo en plejparto de la nacimalplimultaj regionoj. Sed nun en la nacimalplimultaj aŭtonomaj regionoj Interna Mongolio, Hingiang, Guanghi kaj Ninghia jam fondiĝis iliaj propraj filmo-produktejoj kaj ĵurnaloj kaj eldonejoj de la respektivaj naciaj lingvoj. Ĝis la fino de 1958 la naciaj malplimultoj havis entute 1,559 filmoprojekciajn unuojn, 11 nacilingvajn eldonejojn kaj 656 librejojn. Laŭ la statistiko de tiuj kvar nacimalplimultaj aŭtonomaj regionoj sole, ekzistis jam 156 artaj trupoj, 89 teatroj, 322 kulturaj palacoj kaj stacioj de la ŝtato administrataj kaj 50 publikaj bibliotekoj. Radikale ŝanĝiĝis la stato ke la kulturaj entreprenoj estis monopolitaj de malmultaj personoj kaj apartigitaj for de la vasta laboranta popolo.

Fariĝinte mastro de sia ŝtato post emancipiĝo ambaŭ ekonomia kaj politika, la liberigita ĉina popolo postulas ankaŭ emancipiĝon kulturalan por fariĝi mastro de kulturo. Kune kun la pliboniĝo de sia ekonomia vivo kaj iompostioma ekposedo de kultura scio, la vasta laboranta popolo urĝe deziras esprimi siajn laboron kaj lukton per formo literatura kaj arta. Tial en pasintaj dek jaroj, sub la gvido de la Partio, vige progresis la popolamasaj kulturaj agadoj responde al iliaj postuloj. Jam en la unua periodo post la Liberiĝo, la popolamaso komencis esprimi sian ĝojon pro liberiĝo per diversaj kulturaj agadoj. Poste fondiĝis ĉe fabrikoj, minejoj kaj vilaĝoj multe da amatoraj belartaj organizoj, ekzemple amatoraj dramtrupoj, verkogrupetoj ktp., kaj tiamaniere vaste disvolviĝis la popolamasaj amatoraj agadoj belartaj intime ligitaj kun la produktado. La granda impeto de industrio kaj agrikulturo en 1958 des pli puŝis la amasan kulturalan aktivecon al nova alta tajdo. Miloj kaj miloj da laborantaj popolanoj partoprenis en diversspecaj artaj verkado kaj prezentado. Per kantoj, pentraĵoj kaj precipe novaj popolkantoj, ili esprimis sian senliman entuziasmon kiel venki malfacilaĵojn kaj konkeri la naturon en la konstruado de socialisma nova vivo. La laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj verkis milionojn da novaj popolkantoj, multaj el kiuj enkorpiĝis kuniĝon de revolucia realismo kaj revolucia romantiko kaj efike

## ajtoj en Ĉinio

tradukita el

—Red.

koj kaj filmo-projekciaj trupoj estas nun troveblaj en urboj kaj vilaĝoj, ĉe fabrikoj kaj minejoj tra la tuta lando, kaj per tio formiĝis vasta kultura reto socialisma. Multe kreskis ankaŭ la nombro de gazetoj, ĵurnaloj, libro-eldonejoj, dramtrupoj, teatroj kaj kinejoj. Komparu niajn kulturajn entreprenojn en 1958 kun tiuj en 1936, kies ciferoj estis plej altaj en malnova Ĉinio, kaj vi rimarkos la mirigan rapidecon en la disvolviĝo de la kultura laboro en nova Ĉinio. En 1958 la nombro de artaj trupoj diversbranĉaj atingis 3,162, dum tiu de teatroj en la tuta lando—2,620. La antaŭa pliiĝis kvaroble kaj la lasta sepoble, kompare kun tiuj en 1936. La nombro de filmo-projekciaj organizoj atingis 12,579, inter kiuj la kinejoj nombris 1,386 kaj la cirkulantaj filmo-projekciaj trupoj 8,384. Antaŭ la Liberiĝo ekzistis neniu filmo-projekcia trupo, kaj la kinejoj pliiĝis trioble kompare kun tiuj en 1936. En 1958 estis 108 eldonejoj en la tuta lando, kiuj eldonis 45,495 diversajn librojn, kun eldonkvanto de 2,300,000,000 ekzempleroj t. e. dektriple pli granda ol en 1936. La publikaj bibliotekoj guberniaj kaj plisuperaj atingis 922 en la tuta lando, t. e. dekoble pli multe ol en 1936, kaj la muzeoj guberniaj



stimulis la laborantan popolon al produktado kaj luktado. Origine la artoj devenis de la laboro. Nun sur bazo de nova ideologio ili denove kuniĝis kun la laboro. Oni povas diri, ke la hodiaŭaj verkoj de la laboranta popolo stimolataj de la socialismaj kaj komunismaj pensoj estas ĝermoj de la popolamasaj komunismaj artoj.

En la pasintaj dek jaroj, ne nur la konstruado de kulturaj kaj artaj laboroj kaj la popolamasaj kulturaj agadoj akiris grandegan sukceson, sed la armeo de la profesiaj kulturaj kaj artaj laborantoj ankaŭ havis tre grandan disvolviĝon kaj plialtiĝon. Sekve de la liberiĝo de la tuta lando, la armeo de la profesiaj kulturaj kaj artaj laborantoj pligrandiĝis senprecedence. Kaj tiu ĉi armeo sin hardis kaj remuldis en diversaj politikaj kaj ideologiaj luktoj. Sub la gvido de la Partio ĝi luktis seninterrompe kaj triumfis sur la batalfronto kultura kaj arta kontraŭ ĉiuspecaj burĝaj literaturaj pensoj kontraŭ-marksismaj. Precipe en la kontraŭ-dekstrula lukto kaj la rektifa kampanjo en 1957 ĝi ĝisfunde frakasis la atakojn de dekstruloj kaj reviziistoj, defendis la marksisman literaturan kaj artan linion de la Partio, plifortigis la gvidon de la Partio super kulturo kaj artoj kaj plifirmigis la solidareco en la kultura kaj arta rondo. Plejparto de la kulturaj laborantoj unuiĝis pli kaj pli intime ĉirkaŭ la Partio kaj pli kaj pli konsciis, ke ilia laboro estas parto de la tuta revolucia laboro gvidata de la Partio. La vasta kultura kaj arta laborantaro plifortigis siajn rilatojn kun la laborista kaj kamparana amaso. Multaj literaturistoj kaj artistoj iris labori dum longa tempo en bazaj organizoj, kie ili vivis kaj laboris kune kun la amaso. Tre multaj artaj trupoj iris al fabrikoj kaj vilaĝoj, ludis por la laborista kaj kamparana amaso. La longdaŭra kuniĝo de la kulturaj laborantoj kun la laborista kaj kamparana amaso ambaŭ en laboro kaj lukto estas la fundamenta ŝlosilo por garantii la sanan disvolviĝon, de literatura kaj arta verkado en nia lando.

La hardiĝo en ideologiaj luktoj kaj la kuniĝo kun la laborista kaj kamparana amaso ebligis al la literaturaj laborantoj multe altigi sian pens-nivelon, ricevi riĉan fonton por kreado kaj plialtigi sian artan kapablon por prezenti la vivon de la laboranta popolo. Sekve ĉiu fako de literaturo kaj arto akiris abundan rikolton en sia kreado. Multaj eminentaj verkoj estis varme akceptataj de vasta legantaro. La eldonkvanto de sufiĉe multaj romanoj superis milionon da ekzempleroj. La rigardantaroj de kelkaj elstaraj filmoj atingis po cent kelkdek milionoj da person-fojoj. Legado, teatro, muziko kaj belartaj ekspozicioj jam fariĝis nedisigebla parto de la vivo de la popolo. Multaj verkoj montris rimarkindan plialtiĝon laŭ ideologia kaj arta vidpunkto. Tiuj verkoj priskribis la herojn en la longa revolucia luktado kaj la novajn personojn kaj aferojn en la socialisma konstruado en nia lando. Multaj vivoplenaj artaj figuroj el ili jam

fariĝis bone konataj kaj varme amataj de la vasta legantaro. Samtempe la verkistoj kaj artistoj strebis al nacia koloro kaj la popolamasa karaktero en siaj verkoj kaj akiris grandan sukceson en uzado de la popolamasa lingvo kaj en kreema heredo de naciaj tradicioj.

Samtempe kun la disvolviĝo de nova literatura kaj arta verkado, ni ankaŭ prilaboris kaj heredis diversajn eminentajn tradiciajn artojn, kaj ilin renovigis, ke ili servu pli bone al la nova epoko kaj la bezono de la popolo. La renovigo kaj disvolviĝo de diversaj operoj en nia lando estis tre elstara ekzemplo. La ĉina opero estas parto de nia riĉa nacia heredaĵo havanta treege vastan rigardantaron. Laŭ la politiko "kune floru ĉiuj floroj kaj novon tiru el malnovo" difinita de Prezidanto Maŭ, ni faris por la tradicia opera arto la laborojn de elfosado, prilaborado renovigado kaj kreado, tiel ke reviviĝis operspecoj baldaŭ mortontaj, ricevis merititan takson tiuj longe ignoritaj, fondis por tiuj, kiuj

### **Abunde rikoltas agrikulturo, forstigado, bestobredado, flankokupoj kaj fiŝado**

*Novjara pentraĵo de Kang Ŝi-jaŭ*





ne havis siajn organizojn, apartajn prezentajn trupojn kaj samtempe aperis ankaŭ multaj novaj operspecoj, kiuj neniam ekzistis antaŭe. En la Unua Tutlanda Opera Prezento en 1952, venis al Pekino por partopreni nur dudek-kelkaj operospecoj. Sed laŭ la statistiko ĉijara la nombro jam superis 360. Sur la scenejo aperis de tempo al tempo kortuŝaj bonegaj teatraĵoj tradiciaj kaj nuntempaj, kiuj altiras ĉiam pli multe da rigardantoj ne nur enlande, sed ankaŭ eksterlande. La aktoroj estas estimataj ambaŭ de la ŝtato kaj de la popolo. Ilia politika konscio kaj arta nivelo multege plialtiĝas. Koninte sian devon kaj la signifon de la laboro, pri kiu ili sin okupas, ili traktas sian artan laboron per pli granda entuziasmo kaj pli serioza sinteno. Multaj famaj maljunaj artistoj jam aliĝis al la Partio kaj fariĝis gloraj kompartianoj. Samtempe rapide kreskas ankaŭ la nova generacio sub la kulturado kaj prizorgado de la Partio kaj multaj junaj aktoroj jam montris sian eksterordinaran artan talenton. Tio estas afero vere ĝojinda.

**Kune antaŭensaltas industrio, agrikulturo, komerco, edukado kaj milita afero.**

*Novjara pentraĵo de Kang Ŝi-ĵaŭ*



La kulturaj kaj artaj laboroj dum la pasintaj dek jaroj laboris en intima kunordiĝo al la socialisma revolucio kaj konstruado, stimulis la labor-entuziasmon kaj batalvolon de la vasta popolamaso, plialtigis iliajn politikan konscion kaj kulturen nivelon, pliriĝigis ilian kulturen vivon kaj ludis gravan rolon en la altigo de nia propra batalspirito, subigo de la prestiĝo de la malamikoj, solidarigo kaj edukado de la popolamaso kaj bato kaj ekstermo al la malamikoj. En la dek jaroj ni akumulis tre riĉajn spertojn, kiujn ni devas zorge resumi estonte. Jen mi citas nur kelkajn punktojn el mia kompreno.

## Partia gvido kaj persisto en politika estrado

Partia gvido kaj persisto en politika estrado estas la animo de ĉiuj kulturaj kaj artaj laboroj. Sen gvido de la Partio, la kulturaj kaj artaj laboroj neeviteble faros erarojn kaj fariĝos kaptito de la ideologio de la burĝa klaso, kaj eventuale kontraŭpopolaj kaj kontraŭsocialismaj instrumentoj utiligataj de ia malamikoj. Estas konate, ke kulturo kaj artoj estas superstrukturoj de la socio. Ili servas aŭ por la fortikiĝo de la malnova ekonomia bazo, aŭ por la defendo kaj akcelado de la nova ekonomia bazo. Niaj kulturo kaj artoj devas servi al la socialisma ekonomia bazo, kaj ili estas parto de la tuta socialisma revolucio kaj socialisma konstruado gvidata de la Partio. Disigite de la gvido de la Partio, ili neniel povos plenumi la funkciojn de la superstrukturoj de socialisma bazo por defendi kaj akceli la socialisman ekonomian bazon kaj efikas male, kio ja ne konformas al la intereso de la proletaro kaj la vasta de ĝi gvidata laboranta popolo. La burĝa klaso kaj dekstruloj el la burĝaj intelektuloj obstine kontraŭstaris la gvidon de la Partio, celante transformi la kulturon kaj artojn en instrumentojn por servi al la burĝa klaso anstataŭ al la proletaro kaj socialismo. Firme ni kontraŭbatalis kontraŭ iliaj atakoj kaj defendis la gvidon de la Partio en la kulturaj kaj artaj laboroj. Precipe en la kontraŭdekstrula lukto en 1957 ni komplete malkaŝis kaj venkis la dekstrulojn. Sekve la gvido de la Partio en la kulturaj kaj artaj laboroj plifirmiĝis, kaj tio kreis pli bonajn kondiĉojn por plua disvolviĝo kaj prosperiĝo de socialismaj kulturo kaj artoj kaj elhakis vojon por la granda impeto de kulturaj kaj artaj laboroj en 1958.

Por defendi kaj plene efektiviĝi la gvidon de la Partio en la kulturaj kaj artaj laboroj, ni akcentis la principon de politika estrado en ĉiuj kulturaj laboroj, postulante ke niaj kulturo kaj artoj devas klare kaj sencedeme servi la politikon de la proletaro, korekte respeguli kaj aktive akceli la disvolviĝon de la socialisma ekonomio kaj politiko kaj lukti kontraŭ la kontraŭkompartia kaj kontraŭsocialisma burĝa ideolo-

gio. Tial ni, kulturaj kaj artaj laborantoj, devas unue plene koni la politikan situacion, ĉiam stari sur ĝusta starpunkto, kaj observi kaj konsideri problemojn el korekta politika vidpunkto, t. e., vidpunkto por la bono de milionoj da popolanoj, kaj respieguli la vivon kaj pritrakti problemojn per ĝustaj metodoj. La fundamenta ŝlosilo por efektiviĝi politikan estradon estas tio ke ĉiuj kulturaj kaj artaj laboroj kaj ĉiuj kulturaj kaj artaj laborantoj devas firme sin apogi al la Partio kaj akcepti ĝian gvidon.

Kompreneble ĉiuj aliaj ecoj de la kulturaj kaj artaj laboroj ankaŭ neniel devas esti ignorataj. Ĉiujn internajn asociojn de kulturo kaj artoj kaj ĉiujn leĝojn de kultura kaj artaj laboroj ni devas peni koni kaj mastri. Ĉiu el ni devas studi kaj ellerni sian propran profesion. Sed ĉio ĉi tio estas por la celo, laŭ kaj per tiuj objektivaj leĝoj de artoj kaj profesiaj scioj servigi pli efike la kulturon kaj artojn al socialismo kaj al la laboranta popolo por efektiviĝi pli bone la politikajn funkciojn, sed ne por la profesio mem, des pli ne por persona famo kaj profito.

Por defendi la gvidon de la Partio kaj insisti politikan estradon por defendi la kulturajn kaj artajn laborojn de la korodo de burĝa ideologio, prezentiĝas konsekvence antaŭ la kulturaj kaj artaj laborantoj tasko de ideologia remuldo. Prezidanto Maŭ iam diris: "La lasta dividlinio inter revoluciaj, nerevoluciaj kaj kontraŭrevoluciaj intelektuloj kuŝas en tio, ĉu ili volas kaj praktikas la kuniĝon kun la laboristoj kaj kamparanoj. Kaj nur en tio, sed ne en iliaj paroloj pri la Tri Popolaj Principoj aŭ pri marksismo." (La Majo-kvara Movado") En la proceso de ideologia remuldo de la kulturaj kaj artaj laborantoj dum pluraj jaroj, ni komprenas pli kaj pli bone la gravan signifon de la politiko, ke la intelektuloj devas kuniĝi kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

## Servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, servi al socialismo

La Paroladoj de Prezidanto Maŭ ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan'an, 1942, sisteme kaj profunde solvis serion da gravaj fundamentaj problemoj en la literaturaj kaj artaj ideoj. La plej gravaj inter ili estas: ĉu literaturo kaj artoj devas servi al la popolamaso kaj kiel servi al la popolamaso. Kaj la ĉefa ŝlosilo por ambaŭ supre menciitaj problemoj estas kuniĝo de la literaturistoj kaj artistoj kun la laborista kaj kamparana popolamaso.

Ni scias, ke tuj post la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan'an, multaj literaturistoj kaj artistoj tiam en la liberigitaj regionoj, respondante al la alvoko de la Partio, iris unuj post la aliaj en la

popolamaso, aktive efektiviĝante la politikon kuniĝi kun la laboristoj kaj kamparanoj. Tiel komenciĝis nova epoko de la revolucia literatura kaj arta movado en la liberigitaj regionoj. Vigle disvolviĝis literatura verkado kaj amasaj kulturaj agadoj. Oni povas diri, ke tio estis la unua fojo en kiu la politiko de kuniĝo de la literaturistoj kaj artistoj kun la laboristoj kaj kamparanoj elmontris sian fortan vivpovon en grand-skala praktikado.

La tutlanda liberiĝo malfermis larĝan vojon por la kuniĝo de la intelektuloj kun la laboristoj kaj kamparanoj en Ĉinio. Dum la lastaj dek jaroj la Partio kaj la Registaro plene utiligis tiun ĉi favoran kondiĉon. Precipe post la venko en la lukto kontraŭ la dekstruloj dum la rektifa kampanjo en 1957, konforme al la situacio de granda antaŭensalto, la Partio mobilizis multe da literaturistoj kaj artistoj iri en la kamparon, fabrikojn kaj minejojn por ricevi korp-laboran hardadon, kaj organizis multe da artaj profesiuloj rondiri sur monton, en kamparon aŭ en roton por ludi teatraĵojn aŭ aranĝi ekspoziciojn, kaj organizis multe da verkistoj iri en la amasojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj por ĉerpi nutraĵojn por sia verkado. Partoprenante kune kun la popolamaso en produktado kaj aktuala lukto, iliaj rilatoj kun la popolamaso pliintimiĝis kaj iliaj pensoj kaj sentoj ankaŭ radikale ŝanĝiĝis.

La kuniĝo de intelektuloj kun laboristoj kaj kamparanoj estas la ŝlosilo de la kuniĝo de teorio kun praktiko, de kulturo kun la popolamaso kaj de disvastigo kun plialtigo. Ĝi estas la fundamenta vojo por la remuldo de la intelektuloj, por la starigo de kultura kaj arta armeo de la proleta klaso kaj ankaŭ por la prosperiĝo de originala verkado de literaturo kaj artoj. Ni devas decideme kaj plene plenumi tiun principon.

Socialisma kultura kaj arta laboro estas propra laboro de milionoj da popolanoj, kiu ne estas proprigebbla nek monopolebla de malmultaj personoj. Same kiel ĉiuj aliaj laboroj, ĝi devas plenumiĝi ankaŭ laŭ amasa linio.

La vasta ĉina popolamaso longe vivis en manko de kulturo, kion kaŭzis la longtempa subpremateco kaj ekspluatateco kaj la postiĝinteco de produktado. Kaj inverse la postiĝinteco de kulturo ankaŭ severe malhelpis la rapidan plialtigon de produktivo. Ekde la tempo kiam la popolo fariĝis mastro de sia lando, ili urĝe deziris ŝanĝi tiun situacion postlasitan de historio. Ili volis ĝisfunde emancipiĝi ne nur ekonomie, sed ankaŭ kulture. Kultura revolucio estis la urĝa postulo de la vasta popolo en nia lando. La granda tasko de kultura revolucio estus neniam efektivebla, se ni ne estigus vastan kaj profundan popolamasan movadon, nek plene mobilizus la vastan popolamaso al la verkado arta kaj kultura, nek vekus ilian memkonscion pri la kultura liberiĝo per si mem.



La dekjaraj okazintaĵoj pruvis, ke kiam ajn la politika movado altiĝis, altiĝis ankaŭ la popolmasa kultura movado. La kultura impeto dum la periodo de la ĉiufanka impeto kaj la popolkomunumiĝo en 1958 estis evidente la rezultato de la intima kuniĝo de bolanta kultura revolucio kun bolanta socia revolucio. Tio pruvis, ke la kulturaj laborantoj devas bone mobilizi la popolamason kaj bone disvolvi sian laboron en la popolmasa movado.

Kompreneble insisto pri la amaslinio en la kulturaj kaj artaj laboroj ne signifas, ke la funkcio de la fakuloj povas esti neglektita. Estas tre necese havi fidon al la fakuloj kaj plene disvolvi ilian aktivecon. La kulturaj kaj artaj fakuloj estas valoregaj trezoroj de la nacio. Ni devas unuigi ĉiujn fakulojn kiuj estas pretaj dediĉi sian kapablon al la Partio, por ke ili plene plenumu siajn funkciojn en la socialisma kultura konstruado. Sed aliflanke la fakuloj ankaŭ devas kuniĝi kun kaj lerni de la popolmaso. Ili devas unue fariĝi primaraj lernantoj de la popolmaso antaŭ ol ili povas fariĝi la esprimantoj, pledantoj kaj gvidantoj de la popolmaso. Disigite de la popolmaso, ili fariĝos “komandantoj sensoldataj” kaj samtempe ili nepre voĵeraras, perdinte la noblan celon servi al la popolo kaj pro sia malbona nutrado kaj malnormala kreskado fariĝos iom post iom “malsanaj militistoj”. Tio estas malutila por ambaŭ la popolmasa laboro kaj la fakuloj mem. Tial kunigi la fakulojn kun la amaso estas parto de la amasa linio.

En la kulturaj laboroj, ni devas decideme kontraŭstari la dekstran konservativisman penson ignori aŭ malestimi la popolamason, kaj samtempe en la mobilizo de la popolmaso, ni devas bone obei la principon de bezono kaj memvolo de la amaso, sed ne anstataŭigi la bezonojn de la popolmaso per tiuj, kiujn ni mem supozas kompreneblaj, ĉar tiamaniere la laboroj fariĝos formalaj kaj ne povos atingi sukceson. Neniu laboro povas malobei tiun ĉi principon kaj des pli la kulturaj kaj edukaj laboroj por plialtigi la popolamason, kiuj estas tiel delikataj ke ili povas efiki nur per la memkonscio de la popolmaso.

## La politiko “kune floru ĉiuj floroj kaj voĉon donu ĉiuj skoloj”

La prosperado de la kulturaj kaj artaj laboroj en nova Ĉinio en la pasintaj dek jaroj estis rezultato de la efektivigo de la politiko “kune floru ĉiuj floroj kaj voĉon donu ĉiuj skoloj” elmetita de la Partio.



Onjo gubernistino amas purajn infanojn

Pentris Saŭ Ging-kun

Niaj kulturo kaj artoj nepre devas servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, al socialismo. Ĝi estas la direkto, kiun devas sekvi ĉiuj kultura kaj artaj laborantoj. Por efike efektivigi tiun ĉi direkton, la Partio elmetis la politikon “kune floru ĉiuj floroj kaj voĉon donu ĉiuj skoloj”, kiu estas la plej bona politiko por mobilizi la aktivecon de ĉiuj kulturaj kaj artaj laborantoj kaj disvolvi la elstarajn bonkvalitojn de ĉiuj artaj formoj por servi al unu komuna politika celo. La kulturo kaj artoj de socialismo povas facile prosperi nur kiam la diversaj skoloj povas libere interargumenti por siaj vidpunktoj kaj diversaj artaj formoj kaj stiloj libere konkuri.

Faktoj pruvis, ke tiu ĉi politiko de la Partio estas tute prava. Nur dank’ al efektivigo de tiu ĉi politiko nun riĉe floras diverskoloraj floroj en nia literatura kaj arta ĝardeno. En nia lando ĉiu kulturo kaj arto utila al socialismo povas akiri kondiĉojn por plena disvolviĝo, ĉiu skolo de artoj ricevi subtenon kaj ĉiu literaturisto kaj artisto plene disvolvi sian talenton.

La burĝa klaso revis utiligi tiun ĉi politikon ŝajniĝi venenajn herbaĉojn aromaj floroj. Tion ni jam spertis eĉ antaŭ la kontraŭdekstrula lukto en la rektifa kampanjo. Antaŭ ol finfina malapero de la burĝa klaso, tia stato povos ankoraŭ aperi. Se oni ne konas tion ĉi aŭ opinias, ke “kune floru ĉiuj floroj” signifas pace kunesti kun la venenaj herbaĉoj anstataŭ ilin forsarki, tio estas erara dekstra vidpunkto. Sed, se oni ne permesas venenajn herbaĉojn elkreski, aŭ ilin rimarkinte tuj konsterniĝas, kaj pro tio eĉ ekdubas la pravecon de la politiko “kune floru ĉiuj floroj kaj

voĉon donu ĉiuj skoloj”, tio estas ankaŭ infaneca penso, kiu ne konas la realecon de la socio nek la leĝon de la klasbatalo. Ni scias, ke la venenaj herbaĉoj ekzistas objektivaj kaj havas certan socian fundamenton. Se ni ne permesas ilin elkreski, ili ankaŭ malbonon faras kaŝite. Male, se ni lasas ilin elkreski, faciliĝas ne nur la elsarko kaj eĉ per tio oni povas eduki la popolamason kaj plialtigi ilian kontraŭvenenan kapablon. La vero de marksismo povas hardiĝi kaj disvolviĝi nur en praktika lukto. Ni ne povas kviete konstrui socialismajn kulturon kaj artojn sen iu ajn lukto. La penso, kiu timas liberan argumentadon kaj liberan konkuradon, estas penso kontraŭ dialektiko kaj kontraŭ la politiko de la Partio, kaj tre malutila al konstruado de socialismaj kulturo kaj artoj.

Post la praktikado en la lastaj kelkaj jaroj, la kulturaj kaj artaj laborantoj de nia lando jam konas pli kaj pli profunde tiun ĉi politikon kaj venkis la unuflankecon kaj duonvojecon en ĝia efektivigo. Tio estas tre utila por krei pli prosperan staton de kulturo kaj artoj en Ĉinio.

Pasis jam dek jaroj de post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Dek jaroj estas tre mallonga periodo en la historio de evoluo de la homaro, sed nia juna socialisma patrio fluge antaŭeniĝas. Kiel ĉiuj aliaj laboroj, la kulturaj kaj artaj laboroj ankaŭ akiris grandajn atingojn. Tio estis granda venko de la politiko por kulturo kaj artoj de la Partio, la granda venko de la pensoj de Maŭ Ze-dong, kiuj kree kunigas la universalan veron de marksismo-leninismo kun la konkreta praktiko de la ĉina revolucio. Okaze de la celebros de la granda dekjara jubileo de la fondiĝo de nia popola respubliko, ni la kulturaj kaj artaj rondoj kune kun la popolo de la tuta lando, estas senlime ĝojaj kaj prezentas kiel kontribuojn al la granda patrio kaj la granda Partio la fruktojn de nia propra laboro. Ni garantias al la patrio kaj al la Partio, ke sub la gvido de la Partio kaj sub la brila prilumado de la Ĝenerala Linio, ni daŭrigos plej energie penadi kaj forte impeti al alta atingo por multe, rapide, bone kaj ekonomie konstrui socialismajn kulturon kaj artojn. Ni pentros plej belajn pentraĵojn, skribos plej novajn kaj belajn versaĵojn konvenajn al la granda glora patrio.

## Granda ĝojo de Kvincent milionoj da kamparanoj

— Pri la finkonstruo de la Unua Traktora Fabriko de Lejang —

### Venko de la Ĝenerala Linio

**L**A Unua Traktora Fabriko, forte dezirata de nia tuta popolo, establiĝis en Lejang, Henan-provinco.

Tiu ĉi estas ege ĝojinda afero de la kvincent milion kamparanoj. En la granda fabriko ekipita per pli ol dek mil modernaj maŝinoj, produktiĝas po dek naŭ minutoj freŝnova traktoro el la manoj de la laboristoj. Ili tuj diskuras, preludante la mekanikigon de agrikulturo, en la fekundajn kampojn de diverslokaj popolkomunumoj de l' patrolando.


Tuj post kiam la kamparanoj de la tuta lando gajnis la agrar-reforman bataladon kaj suriris la vojon de interhelpo kaj kooperado, la sagacaj Partio kaj Prez. Maŭ

jam faris grandiozan projekton por plene ŝanĝi la fizionomion de postresteco de ĉina agrikulturo, realigi la agrikulturan mekanikigon kaj decidis komenci konstruadon de la moderna traktora fabriko dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano.

La 1-an de okt. 1955, la ekkonstruo de la unua traktora fabriko de nia lando estis inaŭgurata en Lejang. Tiu ĉi grandskala fabriko kovras areon de 145 hektaroj. Dum la konstruado, dank' al la instigado de la Ĝenerala Linio de l' Ĉina Komunista Partio aperis multaj mirakloj. Ĉu vi iam aŭdis, ke oni kompletigis konstruon de grandtipa fabrikejo 24000-kvadratmetra nur en 38 labortagoj? Tia miraklo de altrapida konstruado tamen aperis ĉi tie.

Por konstrui la fabrikon en alta rapideco, la laboristoj aplikis la metodon de samtempa konstruado kaj produktado: kiam domkonstruado ankoraŭ ne finiĝis, jam komenciĝis interkrucite la laboro de instalado de ekipaĵoj; kiam instalaciis nur kelkaj maŝinoj en la laborejo, oni jam komencis produktadon. Dank' al ĉi tiu metodo, oni produktis unu jaron antaŭ la difinita dato, je la 1-a de aŭgusto de la pasinta jaro, la unuan traktoron de 54 ĉ. p. kun fabrikmarko “Orienta Ruĝo”. Kaj ĝis la finkonstruiĝo de la fabriko, kiam oni ekzamenis ĝin por akcepto, ĝi jam produktis 902 traktorojn. Altrapide konstruiĝis la fabriko, same altrapide produktiĝis la traktoroj.





Angulo de la Unua Traktora Fabriko

Foto de Jang Ĝen-he

### Helpoj de la tuta popolo

**L**A rapida ekprodukto de la Unua Traktora Fabriko de Lejang multe ŝuldis al la helpoj de la tuta popolo, precipe al la instigoj de la kamparanoj. Kiel forte ili deziregas uzi traktorojn fabrikitajn mem de la patrolando en pli baldaŭa tempo! Komence de la tago kiam oni celebris la ekkonstruon de la fabriko, senĉese ĝi ricevis leterojn de gratulo kaj kuraĝigo el ĉiuj anguloj de la lando. Kamparanoj malproksime el Guangdong, Hingiang kaj Nordorienta Ĉinio alvenis por mendi traktorojn. Ili alsendis al la fabriko rizon, porkajon, ovojn, arakidojn k. c. kiujn ili ŝparis el sia ĉiutaga manĝado. Kiam ion bonan ili havas, ili pensas unue pri la harooj konstruantaj la traktoran fabrikon. Ĉio ĉi multe kuraĝigis la laboristojn. Dum la konstruado de la traktora fabriko en Lejang, laboristoj el ĉiuj lokoj de la lando etendis al ili siajn helpajn manojn. Pli ol 300 frataj fabrikoj kaj minejoj en 21 provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj de la tuta lando fabrikis por la fabriko il-maŝinojn por metal-tranĉado, kaj instalaĵojn por muldo, premformigo kaj lignajfarado. Estis 130 fabrikoj kiuj prenis sur sin la taskon trejni laboristojn por ili; pli ol dek mil konstruaj laboristoj el diversaj lokoj en la lando partoprenis en la konstruado de la

Traktora Fabriko. La frataj fabrikoj kaj minejoj de Ŝanhajo, Ĉangĉun k. a. urboj, kies teknikaj fortoj estas pli grandaj, sinsekve transpostenigis pli ol 1500 teknikajn laboristojn por subteni la Unuan Traktoran Fabrikon. La popolanoj de okcidenta Henan-provinco kaj de la urbo Lejang elmetis la jenan devizon: "Ni subtenu la traktoran fabrikon per ĉio, kion ĝi bezonas". Ili certigis ĉiamaniere tujan plenumon de ĉiuj bezonoj en ĝia konstruado.

### Ili rapide posedis teknikon

**L**A plejmulto el la laboristoj, kiuj fabrikas traktorojn kun la komerca marko "Orienta Ruĝo" estis junaj kamparanoj, kaj nun estas metilernantoj laborintaj unu aŭ malpli ol unu jaron en la fabriko. En la komenco, kiam ili venis en la fabrikon, vidante ĉion de la fabriko, ili sentis nekonatecon kaj strangecon. Ne malmultaj el ili ĉagreniĝis pro difekto de sia ilo pro mismanipulado, ankaŭ ne malmultaj kuŝis sendorme en profunda nokto pro tio, ke ili ne povis parkere scii diversajn specojn kaj tipojn de la instrumentoj. Sed ili ekhavis forton senliman, kiu instigis ilin al persista lernado, kiam ili rememoris la malfacilan terkulturadon en la hejmloko per malnovaj plugiloj, kaj la ardan deziron por traktoroj de la kamparanoj. Ĉiuj 15 laboristoj ĉe la "Aŭgusto-unua" junula forno de

la ŝtalfanda laborejo estas metilernantoj krom la fornestro Daj Er-ŝen, tekniklaboristo. Ili scipovis nenion en la komenco. Tiam ĉiu produkta laborejo senpacience atendis de ili liveron de muldpecoj, kaj ili ĉiuj tre maltrankviliĝis pro tio. Sekve dum manipulado, la 6-grada laboristo Daj Er-ŝen, membro de la Komunisma Junula Ligo, ilin instruis tenante iliajn manojn. Kiam ili



Antaŭ nelonge Vang Ping-hin (la dekstra) estis kamparano, sed nun li ne nur jam bone ellernis la manipulado de pluraj specoj de ilmaŝinoj, sed ankaŭ eltrejnis tri novajn laboristojn. Jen li instruas metilernanton pri borilo.

Foto de Tang Maŭ-lin



estis liberaj de produkta laboro, ili konstruis per senutilaj brikoj modelon de aperturo de forno ekster la domo por ekzerci enjedadon de materialoj. Ili fariĝis fine lertaj laboristoj de ŝtalproduktado, kaj starigis la altproduktan rekordon de 22.5 tunoj de 5-tuna elektra fandforno. Kaj ili ĉeestis lastatempe la Tutĉinian Kunvenon de Laborherooj kiel progresinta unuo.

### Fervora helpo de Sovetio

**H**ODIAŬ, ĝoje celebrante la naskiĝon de la unua traktora Fabriko en Lejang, ni ne povas forgesi la penlaboron de la Sovetiaj specialistoj. Jam en la jaro 1953, Sovetio kolektis pli ol cent elstarajn fakulojn en la projektado de la Unua Traktora Fabriko de Ĉinio. En ĉiuj laboroj


de lokoelektado, domkonstruo, instalado de ekipaĵoj kaj aĝustigo de produktado, oni ricevis grandajn helpojn ĉiudetalajn de Sovetio, kiu provizis nin per kompletoj da teknologiaj projektoj kaj regularoj, desegnado de produktajoj ktp. Ĝi kulturis por tiu ĉi fabriko 159 funkciulojn de entrepreno-administrado kaj teknikajn kadrojn. Ĝi ankaŭ sendis kelkdek specialistojn al la fabriko por gvidi laborojn teknikajn. En 1958, kiam la fabriko komitato de la Partio alvokis, ke la unua traktoro "Orienta Ruĝo" estu produktita memore al la "Aŭgusto-unua", fondiĝtago de la Ruĝa Armeo de Laboristo-Kampanoj, kdo M. K. Tarapak, speĉialisto pri termika traktado jam finis sian servon laŭ kontrakto kaj ekveturos hejmlanden. La laboristoj timis ke la foresto de la speĉialisto

malfaciligos la termikan traktadon de traktoraj pecoj. Kamarado M. K. Tarapak diris al ili: "Mi ne reiros hejmalandon ĝis kiam mi propraokule vidos naskiĝon de via unua traktoro." Li sin jetis kune kun la laboristoj en la batalon.


Ja neforgesebla estas tia sindona laborspirito de la Sovetiaj speĉialistoj. Ili disŝutis sennombrajn semojn de amikeco kaj progresinta tekniko.

\* \* \*

La ekfunkcio de la Unua Traktora Fabriko estas antaŭsigno de alta tajdo de agrikultura mekanikigo kaj sur la vastaj kampoj de nia lando ĉie kuros "feraj ĉevaloj" kaj "feraj bovoj", kaj nia agrikultura produkto marŝos ankoraŭ pli rapide.



40-ĉevalpovaj traktoroj po-grande produktiĝas en Tiangin-a Traktora Fabriko.



## Diverstipaj Traktoroj produktiĝas pogrande en Ĉinio

Universalaj traktoroj kun fabriko marko "Aŭgusto-unua" elproduktitaj de Gianghi-a Traktora Fabriko, ankaŭ taŭgas por kulturado de akvokampo.

La laboristoj de Ŝenjang-a Traktora Fabriko streĉe laboras por subteni la mekanikigon de agrikulturo. Jen ili iras raporti al la partia komitato sian superplenumon de la produkta plano.





# Kunveno de herooj en Pekino

Notoj pri la Tutlanda Kongreso de Reprezentantoj de Pioniraj Kolektivoj kaj Pioniraj Produktantoj de la Socialisma Konstruado en Industrio, Komunikado-Transportado, Fundamenta Konstruado kaj Financo-Komerco

## Kunveno de herooj

JUS festinte la 10-an datrevenon de fondiĝo de la Respubliko, la stratoj de Pekino denove sin vestas per buntaj festo-kostumoj. Tie kaj ĉi tie sur la stratoj alte staras kolosaj slogan-kolonoj honore al la kongreso de tutlandaj herooj. En parkoj, montrofenestroj estas gluitaj afiŝoj bonvenigantaj la pionirajn produktantojn. Pri la herooj cirkulas kortuŝaj rakontoj, kiuj ĉiujn ĝojigas kaj entuziasmigas.

Pli ol 6,500 herooj kreintaj milojn da mirakloj, raportis al Prezidanto Maŭ kaj al la patrolando sian brilan sukceson en la majesta Popola Halo.


La epoko nia estas ja epoko, en kiu herooj aperas lavange. Ĝuste

kiel k-do Guo Mo-juo skribis en "Laŭdkanto al la kongreso de herooj": El ĉiuj sepdek du profesioj aperas ĝuangjuan-o\*, sed tio vere realiĝas nur hodiaŭ. En la malnova tempo la titolo honoris nur unu personon, nun milojn kaj dekmilojn; la malnova ĝuangjuan-o limigis sin nur al verkado, la nunaj troviĝas en ĉiuj profesioj. Ekde la granda antaŭensalto de 1958, en industrio, komunikado-transportado, fundamenta konstruado kaj financo-komerco aperas amase pioniraj kolektivoj kaj produktantoj kvazaŭ la senfina alruliĝanta ondaro de Jangzi-rivero. La reprezentantoj ĉeestantaj la tutlandan kongreson de herooj estas elektitaj el pli ol 286,000 pioniraj kolektivoj kaj pli ol 3,600,000 pioniraj produktantoj. La reprezentantoj estas de 23 na-


cioj inkluzive han-ojn, mongolojn, huj-ojn, tibetanojn, ujugurojn, mjaŭ-ojn, ji-ojn, ĝuang-ojn bujiojn, koreojn. Inter ili estas maljuna heroo kun aĝo de pli ol 70 jaroj, kaj juna labormodelo nur 16-jaraĝa. Tiuj standardo-portantoj de la granda antaŭensalto venis de ĉiuj anguloj de la patrolando: de fekunda altebenejo, de herboriĉa stepo, de densa arbarejo, de vasta Gobio, de bordoj ĉe la ondantaj maroj aŭ riveregoj, de montoj altaj kaj krutaj . . . kaj ilia laborenergio sufiĉe granda por turni la ĉielon kaj la teron, multe plibeligis la montojn kaj riverojn de la patrolando.

\* Titolo ricevita de la unua en vico da kandidatoj, kiuj sukcesis ekzamenon de la kortego imperiestra, en la pasinteco.

Malgrandtipaj universalaj traktoroj el la Universala Maŝinfabrika de Vuhan ankaŭ faras sian kontribuon al la agrikultura mekanikigo.



Post I-jara konstruado, jam finkonstruiĝis Ĉangĉun-a Traktora Fabrika, kaj komencis produkti mezgrandtipajn traktorojn universalajn.





Prezidanto Liu Ŝaŭ-ki k. a. ŝtatgvidantoj ĝoje akceptis Luo Ŝu-ĝen (la 1-a demaldekstre), Ĝang Baj-fa (la 2-a, masonisto), Ŝi Ĉuan-hiang (stratpurigisto, la 3-a) k. a. laborheroojn dum la kunvenado.

### Homoj kiuj antaŭiras la tempon

**N**IAJ herooj estas homoj kiuj plej bone komprenas la signifon de tempoŝparo. Ili plej bone komprenas, ke alta rapideco de disvolvado de la socia produktoforto estas la animo de la Ĝenerala Linio por la socialisma konstrado; ke ju pli rapidas la konstrado, des pli frue liberiĝos la patrolando de la stato de "unue malriĉeco, due malpleneco". Tial ili senhalte laboradas, utiligante ĉiun minuton kaj ĉiun sekundon por produktado. Su Guang-ming, ĉeestanto de la kongreso, jam antaŭ longe saltis trans la Trian Kvinjaran Planon, kaj paŝis en la jaron 1970 de la Kvara Kvinjara Plano, kalkulate laŭ lia laborkvanto. Li estas maljuna frezisto de Harbina Fabriko de Lokomotivoj kaj Vagonoj. En 1948, li uzis malnovan frezmaŝinon prenitan el tenejo de difektitaĵoj, kiu moviĝis malrapide kiel maljuna bovaĉo tiranta muelŝtonon. Laborante super ĝi, la maljuna heroo vere malpacienis: "Tiel malrapide turniĝante, kiam fine ĝi turniĝos en socialismon?" Li faris decidon renovigi la maŝinon, por ke "floru ankaŭ maljuna arbo" en tute nova

fizionomio. Li pene studis, reformis multfoje, kaj post pli ol 40 plibonigoj faritaj al la maŝino, fine li sukcesis turni la "frezmaŝino-maljunbovon" en altefikitan "universalan frezmaŝinon", plialtigante ĝian laborefikon je unu ĝis dudek obloj. La enfosa grupo de Ma Van-ŝuj en Panggiabaŭferminejo de Longjan-a Ferŝtala Kompanio, kiu dum dek jaroj ĉiunmonate superplenumis la planon kaj naŭ fojojn kreis la plej altan rekordon de la enfosado de nigra-metala mino, nun pliiĝis sian laborefikon je 180 obloj kompare kun tiu en 1949 kaj fariĝis brila standardo de "dekjara ĉampiono kaj naŭ-foja rekordtenanto". La landfama Ma Hengĉang-a Grupo de Cicihar-a Dua Maŝino-Fabriko, dum dek jaroj ĝuis la honoron de pionira grupo. Ili jam plenumis laborkvanton de 14 jaroj en periodo de la Unua Kvinjara Plano, kaj ekde la granda antaŭensalto de 1958, ili senhalte galopas antaŭen, tiel ke antaŭ la fino de 1959 ili jam longe eniris la jaron de 1970 kalkulate laŭ la laborkvanto de ili plenumita. Tiaj tempon-antaŭirantaj personoj, kiaj ili estas, nombriĝas miloj kaj dekmiloj en nia heroa

patrolando. Fine de oktobro, tratuta lando pli ol 230,000 junaj laboristoj jam paŝis en la jaron 1960 en sia produkta laboro.

### Antaŭen kune

**N**IAJ laboraj herooj kaj modeloj en la tempo, kiam ili mem fluge antaŭen marŝas al pli alta celajo, obstine venkante la malfacilojn renkontitajn en sia laboro, ankaŭ sincere ĉiel helpas homojn ĉirkaŭ si por kune progresi. Tio estas karakterizaĵo de la herooj de nia epoko, kaj ankaŭ la kaŭzo de senĉesa aperado de herooj. Ili bone komprenas, ke "sola branĉo da floroj ne povas signi printempon; printempo povas superregi la tutan ĝardenon nur dank' al plena disvolvado de ĉiuj floroj." La ekzemplo de Caŭ Huj-gju kiu helpis Kong Zi-li konkurakiri la ruĝan flagon, estas unu el multaj. Caŭ estas juna frotumistino de Ŝanhaja Fabriko de Stebilaj Kudriloj, tre rapida en sia laboro. Por helpi al Jonghe Kudrila Fabriko ŝi estas tien transpostenigita. Iu laboristino de tiu ĉi fabriko nomata Kong Zi-li ĉiam postrestis post aliaj en produkta kvanto. Kompreninte, ke ŝi ne kontentiĝas esti postresta, sed havas veran malfacilon, Caŭ Huj-gju decidis doni al ŝi helpon. Caŭ komence plenigis la mankantan parton kaŭzitan de Kong en plenumado de la grupa plano, per kromlaboro. Kaj poste, trovinte, ke la maŝino manipulata de Kong havas pli longan interspacon kaj tre peniga estas la tirado dum manipulado, ŝi do interŝanĝe donis al Kong sian malpezan kaj facilmovan maŝinon. Ŝi ofte observis la manipulado de Kong, iafoje instruis al ŝi ĝustan manieron de kudril-frotumado mano tenante manon. La sindonemo de Caŭ instigis aliajn laboristinojn de la grupo, ke ili ĉiuj ankaŭ venis helpi Kong, kiu mem ankaŭ faris sian plejblon. Tiel ŝi rapide progresis, ke en majo ŝi eĉ akiris la honoron de "Ruĝflagoportanto".



## Homoj ordinaraĵ

**O**NI eble opinius ke la du ideoj grandiozeco kaj ordinareco ne estas facile unuigeblaj, tamen, tiuj multaj labormodeloj ja estas enkorpiĝo de grandeco kaj ordinareco. Ili estas grandaj, ĉar ili estas lokomotivoj de la historio, elstaraj reprezentantoj de la heroo popolo; ili estas ordinaraĵ, ĉar ili estas simplaj popolanoj, ordinaraĵ laboristoj sur ordinaraĵ postenoj. Laboroj, kiaj disportado de poŝtaĵoj, purigado de stratoj k.a., ŝajnas al multaj, laboroj ordinaraĵ, sed inter niaj herooj, iuj faris sur tiuj postenoj rimarkindajn laborojn. Luo Ŝu-ĝen, leterportistino de Pekina Poŝtoŝicejo, kiu ĉeestis la kongreson, dum sinsekvaj 65 monatoj ekde aŭgusto de 1953 ĝis februaro de 1959, disportis pli ol milionon da leteroj, ĵurnaloj ktp. sen ia ajn eraro. Ŝi neniam prokrastis la disporton de leteroj en vetero ĉu bela ĉu pluva, kaj disportis plurajn fojojn en unu tago la leterojn al la ĝustaj adresitoj. Iun vesperon en somero, Luo Ŝu-ĝen estis trafata de pluvego survoje dum distribuado de leteroj. Ŝi rapide envolvis la portatajn poŝtaĵojn per oleita tolo, kaj sub pluvo biciklis plue por la distribuado. Kiam iu maljunulino ĉe ŝia alvoko: "leteron ricevu!" elvenis sub ombrelo por ĝin akcepti, tiu vidis ke Luo staras malseka tra la tuta korpo, sed la letero en la mano restas seka. La maljunulino profunde kortuŝiĝis kaj invitis ŝin: "Mia bona knabino! Venu rapide en la domon kaj rifuĝu de la pluvo." "Dankon, avinjo, sed restas ankoraŭ kelkaj leteroj disportotaj!" Tiel parolante ŝi jam forbiciklis. En kazo kiam ŝi trovis leterojn kun malklaraĵ aŭ tute nelegeblaj adresoj, ŝi ĉiam klopodis ĉiumaniere eltrovi la adresiton. Dank' al ŝi multaj leter-skribintoj sukcesis denove interligiĝi kun siaj parencoj kaj amikoj post multjara rompo de kontakto. Ne malmultas en la vico de niaj herooj tiaj poŝtistoj,



**Dum la kunveno, Ma Jeng-seng, brikofaristo el Ŝenhi-provinco, bone profitis la okazon por disvastigi siajn spertojn kiel aliaj laborherooj.**

infanvartistinoj, konservistoj, kuiristoj kiuj same tiel plenkore kaj diligente servas al la popolo, kia Luo Ŝu-ĝen.

### Estimi kaj postkuri

**O**NI estimas, amas, prikantas la heroojn. Dum la kongreso, krom raportistoj, fotistoj de la ĵurnaloj, pli ol cent literaturistoj kaj artistoj en la ĉefurbo tien alvenis kaj faris intervjuojn por ĉerpi ion el la fonto de literatura kreado. Ĝaŭ Ŝu-li, Lej Gia k. a. verkistoj kaj poetoj intencas prikskribi iliajn heroojn en formoj

de poemoj, noveloj kaj korespondajoj: pentristoj kaj dramistoj intencas redoni verajn figurojn de la herooj en siaj pentraĵoj kaj scenoj; muzikistoj jam verkis por la kongreso majestajn kantojn. La herooj epopeaj stimulas multajn kantojn. La herooj epopeaj stimulas multajn korojn. La slogano "Imitu kaj kuratingu la pionirajn produktantojn!" sonas tra la tuta lando, informoj pri sukcesoj en produktado kaj konstruado senĉese alvenas de diversaj flankoj kaj la tajdo de la granda antaŭensaltado jam leviĝis pli alte kaj pli forte.

**Reveninte al sia fabriko la Dua Ŝpinteksejo de Pekino, k-dino Ĉen Su-ĝi tuj transdonas al siaj koleginoj la spertojn ricevitajn en la kunveno.**





# Granda Kanalo Surmonta



Ĉi-tie estos fluejo de la kanalo

Foto de Haŭ Ĉang-geng

**L**A Granda Kanalo en antikva Ĉinio estas fame konata kiel unu el la plej grandaj konstruoj en la mondo, sed nun en Ĉinio estas fosata alia granda kanalo, kies longeco estas egala al la antikva, sed kies konstrua laboro estas multe pli malfacila. Ĝi estas surmonta kanalo situanta sur altebenaĵo de nordokcidenta Ĉinio, kaj fosata komence de junio de la jaro 1958.

Ĉi tiu kanalo komenciĝas ĉe Guĉeng de Min-gubernio de Gansu-provinco. De tie oni kondukas orienten la torenton en Taŭ-rivero, branĉo de la Flava Rivero, sur Min-monton kun alteco de 2,000 metroj super la marnivelo kaj tra altaj montpintoj kaj krutaĵoj de tiu montaro la fluo trakuras tra 1,400 kilometroj al Dongĵuan, fame konata kiel grenejo en Kingjang-gubernio de Gansu-provinco.

Taŭ-rivero devenis de orienta montpiedo de Siking-monto ĉe sudokcidenta limo de Gansu-provinco. Ĝi fluas orienten kaj poste norden al Lanĝou, la provinca ĉefurbo, kaj iom sudokcidente de tiu urbo ĝi enfluas en la Flavan Riveron. Ĉar la regiono tra kiu ĝi trafluas, havas sufiĉe grandan deklivecon, la granda fluovolumeno de 50 sekund-kubmetroj dum miloj da jaroj ĉiam sinĵetas malsupren al la Flava Rivero muĝante tra valoj de suda Gansu-provinco. Sed nun ĝi tuj komencos laŭ homa volo, traflui tra ĉefa kanalo kun larĝo de 40 metroj kaj profundeco de 6 metroj, kaj sennombraj branĉoj de diversaj grandecoj obeeme enflui en pli ol 1,300,000 hektarojn da senakva tero de pli ol dudek gubernioj en altebenaĵo de nord-



okcidenta Ĉinio. La nord-okcidenta altebenajo de Ĉinio estas regiono, kie estas multaj montoj, malmultaj arbaroj, seka vetero kaj ofte okazas senpluveco. Laŭ kroniko en 2,100 jaroj de Han-dinastio (206 a. K.—220 p. K.) ĝis la jaro 1948, en centra kaj orienta Gansu-provinco okazis entute 252 fojoj de senpluveco; kaj dum King-dinastio (1644-1911 j.) kaj la Ĉina Respubliko (1912-1948 j.) proksimume en ĉiuj du-tri jaroj okazis unu fojo de senpluveco. Ekzemple, la granda senpluveco en 1929 ampleksis pli ol 50 guberniojn kaj pli ol 3,000,000 personoj mortis pro malsato. Tiamaj reakciaj regantoj ne nur estas senpovaj kontraŭ la senpluveco, sed eĉ en la malsatego uzurpis grandan sumon da sav-mono en sian propran poŝon, tute ne zorgante la sorton de la laborantaj popolanoj. Post la liberiĝo en 1949 sub la gvido de Ĉina Kompartio, la bataloj por eviti naturajn katastrofojn kaj kontraŭi senpluvecon jam akiris mirindajn fruktojn kaj garantias ĉiu-jaran plialtigon de grenprodukto. La finkonstruo de ĉi tiu kanalo surmonta radikale ŝanĝos la senpluvecon en centra kaj orienta Gansu-provinco kaj formos en la tuta provinco unu tutan irigacian sistemon. Kaj per tio kreiĝos ankaŭ navigacio kaj hidroelektraj riĉfontoj en la nord-okcidento.

La konstruo de ĉi tiu kanalo estas multe pli malfacila ol tiu de la antikva Granda Kanalo. Nur en la 1400-kilometra ĉefa kanalo la konstruo devas transpasi pli ol 800 valojn kaj riverojn de diversaj grandecoj, ĉirkaŭiri kaj trahaki pli ol 800 monteĝojn, konstrui centojn da akvokonservejoj, kluzoj kaj povo-reduktaj konstruaĵoj kontraŭ la torento kaj elfosi 1,800 milionojn da kubmetroj da tero kaj ŝtono. La prevento de akvoperdiĝo pro enpenetro en la teron en la longa

kanalo sur loeso akvosorbema, la 18 monttrahakoj profundaj ĝis 70 eĉ 180 metroj estas maloftaj teknikaj problemoj en akvoutiliga laboro. Sed tiuj problemoj solviĝis paŝon post paŝo dank' al klopodado de centoj da sciencaj kaj teknikaj laborantoj de Ĉina Scienca Akademio kaj kelkdek aliaj sciencaj fakoj, kunlaborante kun la Konstrua Direktejo de la kanalo kaj mobilizante la popolamason. Ili faris samtempe eksperimentojn, studon kaj konstruadon.

Sed tiel granda malfacila laboro, laŭ nuna plano, efektiviĝos nur en kelkaj jaroj. Tio ja estas ne imagebla, se ni rememoras, ke 33 jarojn oni bezonis por la konstruado de Panama Kanalo, kies longeco estas malpli ol 82 kilometroj, kaj 10 jarojn por Sueza Kanalo, kiu estas nur 161 kilometrojn longa.

Post la fondo de la Konstrua Direktejo de la Kanalo en januaro de 1958, enkondukiĝis rimedoj de sinteza esplorado, unueca planado kaj mezurado, projektado kaj konstruado en apartaj partoj de la kanalo. Tial post nur kelkaj monatoj da prepara laboro en junio de la sama jaro komenciĝis la unuaperioda konstrua laboro sur 200 kilometra alta montaro de Min-gubernio ĝis Huiĉuan. Ĝis la mezo de lasta decembro oni jam elfosis 170,000,000 kubmetrojn da tero kaj ŝtonoj, t. e. 61% de la tuta laboro de tiu parto estas far-

ita. Tial la kanalo tie jam ricevis sian elementan formon. Nun la tuta laborantaro estas penanta por enkonduki akvon en la kanalon en la kuranta jaro. La esplorado por la duaperioda laboro de 800 kilometroj estas finita, ankaŭ la projekto por konkretaj paŝoj en la konstrua laboro rapide progresas.

Dum la pasinta pli ol unu jaro la laboristoj, kamparanoj, kadroj kaj sciencistoj alvenintaj el la tuta lando trahakis altajn montojn, ebenigis grandajn montodorsojn, ŝtopas aŭ transpasas profundajn valojn malgraŭ frosteco kaj varmego. Per lokaj materialoj ili fondis pli ol 600 diversajn fabrikojn por produkti instrumentojn, globolagroj, eksplodajojn, cementon, brikojn, tegolojn ktp. kaj kreis 170,000 novajn instrumentojn. Kaj dank' al tio la meza taglaborkvanto altiĝis ĝis 6.2 kubmetroj, kaj en apartaj lokoj eĉ superis cent kubmetrojn.

La natura aspekto de la vasta Minŝan-montaro nun estas ŝangiĝanta. Oni povas imagi, ke post du jaroj, kiam la tuta kanalo estas finita, tie estos tute nova bildo. Tiam, trinkakvon en la regionoj najbaraj al la kanalo oni ne plu bezonos serĉi kelkajn kilometrojn for; pli ol 1,300,000 hektaroj da neirigaciataj agroj ricevos bezonatan akvon, kaj tio multoble altigos la rikolton. La kalvaj montoj fariĝos verdaj ĝardenoj, ne nur ĉesos la terura erozio, sed ankaŭ pros-

### Dishakado de la monto Ĝugiaŝan por trakonduki la kanalon

Foto de Haŭ Ĉang-geng



periĝos multspecaj ekonomiaj produktoj en la montregiono. Ekzemple, post plenkresko de arbaroj, sole la jarprodukto de ligno atingos 3,300,000,000 kubmetrojn. Tiam pliiĝos 1,000,000 hektaroj da novaj herbejoj kaj kelkaj milionoj da brutoj paŝtigitaj tie.

Krome, utiligante la niveldiferencon de la fluo, oni povos konstrui pli ol cent mezgrandajn kaj malgrandajn hidroelektrajn staciojn kun kapacito de 500,000 kilovatoj por la lokaj industrio kaj hejma konsumo. Dume ĝi fariĝos ĉefa navigacia linio inter sudokci-

denta kaj orienta partoj de Gansu-provinco kaj akcelos ĝian socialisman konstruadon.

Konduki Taŭ-riveron sur monton estis afero, kiun neniu kuraĝis ekpensi antaŭ kelkaj jaroj, sed nun tio fariĝis afero realiĝanta.

**Vej Gi Liu:**

# ***Natura Naskiĝo Post natura embriogenio***

— La embriiĝo, naskiĝo kaj kreskado de la Pengpu-a Popola Komunumo en antaŭurbo de Ŝanhajo —

**L**A 27-an de sept. 1958, estis la naskiĝtago de la Pengpu-a Popola Komunumo, Tangnan-subdistrikto, Baŭŝan-gubernio, antaŭurbo de Ŝanhajo, kiu komencis sian embriiĝon jam antaŭ kelkaj monatoj kaj tiu tago estis nur la tempo por akusiĝo de la “bebo” maturiĝinta. Anstataŭ esti “antaŭtempa naskito”, kiel la dekstremaj oportunistoj asertis, ĝi nature naskiĝis post matura embriogenio.

## **La embriogenio**

**P**OST la alta tajdo de kooperativigo en 1956 kaj la venko de la socialisma revolucio sur la fronto politika-ideologia en 1957, kiam la produkta forto estis je unu paŝo plu liberigita, fariĝis ankoraŭ pli urĝa la postulo por ŝanĝi la postrestintan staton en produkto kaj vivo. Ĝuste tiam la kamparanoj en antaŭurboj ĉirkaŭ Ŝanhajo, stimulate de la Ĝenerala Linio de socialisma konstruado de la Partio, elmetis kuraĝan bataldevizon: “Penu produkti po muo\* cent ĝinojn\* da kontono (desemigita), mil ĝinojn da greno kaj dekmil ĝinojn da legomoj”. Ili decidis plirapidigi la disvolviĝon de produktado kaj efektiviĝi pli bone la politikon ke la agrikultura produkto antaŭurba devas priservi la urbon.

Tangnan-subdistrikto estas legom-produktejo, sekve “dek mil ĝinoj da legomoj po muo” fariĝis la ĉefa celo de iliaj klopodoj. Sed la pomua produkto de legomoj de tiu ĉi subdistrikto en 1957 estis nur 7,000 ĝinoj. Por atingi la novan celon, oni devis pliiĝi la produkton je 40% de la origina produktokvanto. Tial por enmanigi tiun frukton de antaŭensalto de “dek mil ĝinoj po muo”, oni devis entrepreni pli grandskale la fundamentan konstruadon agrikulturan,

precipe konstrui akvoutiligajn konstruaĵojn, aĉeti necesajn agrikulturajn instrumentojn kaj modernajn transportilojn, starigi kompare pli grandajn fabrikojn por priservi la agrikulturan produktadon . . . . Sed la tiamaj altgradaj kooperativoj, nek en homaj aŭ materiaj fortoj, nek en monrimedo, povis preni sur sin unuope tiujn urĝajn taskojn. El tio aperis sinsekve serio da kontraŭdiroj.

La legomoj estas “delikataj” kreskaĵoj, kiuj bezonas pli da akvo. Por kontentigi la bezonon de la legomoj je akvo kaj plifaciligi la transportadon de sterko kaj rikoltaĵoj, du riveroj, Pengjuepu kaj Luogingpu, devis esti senprokraste dragotaj. Se tiuj du riveroj estus dragitaj, 40% de la kampo en la tuta subdistrikto povus esti pli bone irigaciataj. Sed ambaŭ la nomitaj riveroj fluas tra pluraj kooperativoj, la unua tra la Unua kaj Dua Pioniraj Kooperativoj kaj la lasta tra la Unua, Tria kaj Kvara Pioniraj Kooperativoj. Sen unuigitaj gvidado kaj planado neniu el la altgradaj kooperativoj povus tradragi ambaŭ riverojn ekster siaj kooperativaj limoj. Krome, la laboro de la dragado estos sufiĉe giganta kaj neniu el la kooperativoj disponis la bezonatajn homajn kaj materiajn fortojn por tio. Kion fari do? Ĉu lasu la kooperativajn limojn kateni la homan agadon kaj la legomojn suferi mankon de akvo kaj restu kontentaj pri la malalta produkto aŭ rompu la kooperativajn limojn kaj dragu la riverojn por ke la legomoj satrinku la akvon kaj donu rikolton de dek mil ĝinoj po muo?

Super tiu ĉi problemo okazis varma diskutado en la altgradaj kooperativoj. En la Unua Pionira Kooperativo, iuj bonhavaj mezkamparanoj, kun Ĉen Tan-ĝen kiel reprezentanto diris ke la du riveroj




apartenas al la "ŝtato", sekve ili devas, esti dragataj de la registaro. Sed la kamparanoj ne konsentis al tio. Unuanime ili deziris rompi tiel la katenon de la penso, kiel la limojn de kooperativoj por dragi tiujn du "ŝtatajn riverojn" per sia propra forto. Sekve laŭ la iniciato de la Unua Pionira Kooperativo kaj sub la koncentrita gvidado de la subdistrikta partia komitato, okazis jur-kunveno por riverdragado la antaŭvesperon de la Printempa Festo\*\*.

Frumatene je la novjara tago laŭ la luna kalendaro, ankoraŭ antaŭ la krepuskiĝo, la riverdraga armeo el pli ol 3,000 personoj alvenis al la laborejo, inter kiuj partoprenis memvole ankaŭ laboristoj hejmen revenintaj por pasigi la Feston, loĝantoj de urbetoj, lernejoj kaj armeanoj garnizonantaj en la najbareco. Dank' al kunagado de laboristoj, kamparanoj, komercistoj, lernantoj kaj soldatoj kaj harmonia kunlaborado de la dek unu altgradaj kooperativoj, la laboro de dragado progresis eksterordinare rapide. Anstataŭ post du semajnoj, kiel la plano difinis, Pengjuepu-rivero malfermiĝis al trafiko nur post sep tagoj, la draga laboro de Luogingpu-rivero finiĝis en tri tagoj anstataŭ sep, kiel oni planis antaŭe.

Tradrugiĝis la du "ŝtataj riveroj", plivastiĝis la irigaciata areo kaj ŝanĝiĝis ankaŭ la penso de la homoj. Oni sentis, ke la organizo de altgradaj kooperativoj jam ne respondas al la postuloj de produkta antaŭensaltego. Por la antaŭensaltego oni ne devus lasi la kooperativajn limojn ligi al si la manojn kaj piedojn, sed plilarĝigi sian vidkampon kaj eltrovi novan elirejon.

Ĝuste tiam kvin kompare malgranaj kooperativoj kun pli grandaj malfacilaĵoj, influite de la penso pri trarompo de kooperativaj limoj kaj de la grandskala akvoutiliga konstruado, aktive serĉis sian novan elirejon. La kvin kooperativoj ĉiuj havis siajn fortajn kaj malfortajn punktojn. Ekzemple al la Tajŝan-a Kooperativo prosperis flankaj okupoj kaj estis fame konata ĝia pork-bredado. Sed pro manko de kapitalo ĝi ne havis rimedojn por aĉeti porkidojn kaj konstrui novan porkejon. La Ĝardena Kooperativo kulturis ĉefe florojn, kio estis sufiĉe profitdona kaj havigis al ĝi riĉan kapitalon. Sed mankis al ĝi laborfortoj. Meznombro, ĉiu el ĝiaj laborpovaj membroj devis prizorgi pli ol tri muojn, kion li apenaŭ povis plenumi



La popola komunumo estas bela edeno

Pentris Loŭ Ŝi-tang

kontentige. La Ĝuhiang-a Kooperativo havis superfluajn laborfortojn, sed mankis al ĝi agro, kaj ĝiaj kooperativanoj ofte restis hejme senlaboraj. Unuvorte, ĉiuj havis sian propran malfacilaĵon, kaj sentis, ke malgrandaj kooperativoj povas entrepreni nenian grandan aferon.

Frue en 1956, kiam la movado de agrikultura kooperativigo estis en alta fluso, la kvin kooperativoj jam kune prezentis peton por organizi sin en grandan kooperativon. Sed tiam la subdistrikta registaro tion ne konsentis, opiniante ke "mankas al ili sperto por organizi tian grandan kooperativon." Poste la prezidantoj de ĉi tiuj kvin kooperativoj meminiciate formis "stud-rondeton", ofte kunsidis por interŝanĝi spertojn, kaj ofte interbabilis ke "iam en la estonteco iliaj kooperativoj nepre estos kunigitaj."

En majo de 1958, kiam okazis la jur-kunveno por antaŭensalto en Tangnan-subdistrikto, la kadroj de tiuj ĉi kvin altgradaj kooperativoj havis okazon denove interrenkonti sin. "Ununura manplato ne povas klaki, kaj ununura malgranda kooperativo ne povas entrepreni ion grandan. La sola elirejo por ni estas unuiĝi en grandan kooperativon." Stimulate de la situacio de la granda antaŭensalto, la prezidanto de la Ĝardena Kooperativo denove elmetis la malnovan problemon. Ĉifoje la propono ne nur ricevis aprobon de la prezidantoj de la aliaj kooperativoj, sed, dank' al ili, ankaŭ vekis varman resonon inter la vastaj kooperativanaroj. Oni pridiskutis la aferon ĉie, de hejme ĝis surkampe. Ju pli la kooperativanoj diskutis, des pli ili vidis klare. Estas vere kiel diris la kooperativano Taŭ Gin-taŭ: "La sola vojo kondukanta al la granda antaŭensalto estas unuiĝo." Sed ĝuste kiam oni optimisme pensis pri la afero, granda

maltrankvileco ĝenis multajn anojn de la Tajŝan-a Kooperativo. Ili pensis en si, ke la Ĝardena Kooperativo ja estas tiom riĉa ke ĝi havas en la banko bonhavan de kelkdek mil juanoj\*, dume ili mem ja male havas ŝuldon de kelkmil juanoj, ĉu oni volas unuiĝi kun ilia malriĉa kooperativo? Sciiĝinte pri tio, la membroj de la Ĝardena Kooperativo sendis reprezentantojn por intime interparoli kun ili, dirante ke la starigo de pli granda kooperativo ebligas reciprokan interhelpon kaj komunan disvolviĝon profite al ĉiuj flankoj. Kiam la anoj de la Tajŝan-a Kooperativo aŭdis tion, ilia ĝojo estis ne priskribebla. Aprobite de la subdistrikta registaro, la kvin kooperativoj unuiĝis kaj fondiĝis la Ĝardena Unuiĝinta Kooperativo la 1-an de junio. Post la fondiĝo de la unuiĝinta kooperativo, la konsistigaj kooperativoj kompletigis kaj helpis unu la alian kaj laŭ la konkretaj kondiĉoj kaj la principo de reciproka utilo koncentrigis parton de kapitalo por uzi komuncelle, kaj per ĝi oni starigis riparejon de agrikulturaj instrumentoj kaj publikan manĝejon. Sekve ne nur pli grandigis la organizo de la kooperativo, sed ankaŭ kreskis en ĝi la elemento de "komuneco", kaj iom post iom formiĝis la embrio de popola komunumo.

Elemento simila al la kolektiva posedo de la popola komunumo jam ekzistis en la sfero de la subdistrikto. Antaŭ longe la kadroj kaj anoj de ĉiuj altgradaj kooperativoj de la tuta subdistrikto havis kredon, ke "la kooperativoj de la tuta subdistrikto finfine sin organizos en grandan kooperativon iam estonte." Por interrilati pli facile kaj kulturi pli bone la koncepton de granda kolektivo, la kooperativoj de la tuta subdistrikto kolektis kapitalon kaj starigis sufiĉe grandan laktobovinejon kun kvardek kelkaj laktobovinoj, kolektive posedata de la kooperativoj. Kaj oni decidis ne disdoni la dividendon provizore por plirapidigi la disvolviĝon. Ili nomis la laktobovinejon la "semo" aŭ la "kondukfadeno". Kvankam tiam la kamparanoj ankoraŭ ne konis la nomon "popola komunumo", tamen ĝia semo jam estis ĝermanta kaj la kondukfadeno por unuigi ĉiujn altgradajn kooperativojn jam ekzistis.

Sed kiam tiu ĉi "semo" estis ankoraŭ ne sufiĉe kreskinta por ekflori kaj doni fruktojn, la kontraŭdiro inter la originaj altgradaj kooperativoj kaj la antaŭensaltega situacio ne estis solvebla radikale.

Kun la leviĝo de la alta tajdo de la granda antaŭensalto, en kiu unu ondo antaŭenpuŝis la alian, oni devis en la legoma regiono ne nur efektiviĝi la celon de "dek mil ĝinoj po muo", sed ankaŭ plimultigi la specojn de la legomoj por kontentigi la diversajn bezonojn de la loĝantaro; oni devis ne nur plenumi la jaran antaŭensaltan celon, sed ankaŭ garantii ekvilibran provizadon, kaj efektiviĝi tion, ke "la malprosperaj sezonoj ne estos malprosperaj kaj la prosperaj pli prosperaj"; oni devis ne nur plimulte produkti legomojn, sed ankaŭ disvolvi ĉion-amplekse agrikul-

turon, forstadon, bestobredadon, flankokupojn kaj fiŝadon. Por plenumi tiujn ĉi taskojn, oni bezonis pli multe da laborfortoj. Kaj la nesufiĉo de laborfortoj fariĝis la plej elstara kontraŭdiro.

Tiuokaze la ŝtata traktora stacio kaj la ŝtata pumpila stacio sendis al Tangnan-subdistrikto kelkajn traktorojn kaj pumpilojn por helpi en plugado kaj akvopumpado. Rimarkinte "la senbovan plugadon", la kamparanoj multe ekscitiĝis kaj opiniis, ke tio estas la plej bona rimedo por ŝpari laborforton kaj efektiviĝi la antaŭensaltegon. Tuj ili petis la altgradajn kooperativojn aĉeti agrikulturajn maŝinojn. Kelkaj produktaj brigadoj eĉ skribis kaj sendis opini-afiŝojn al la kooperativoj. Sed fojon post fojo la petoj ricevis la saman respondon "Ni estas malgranda kooperativo. Niaj financaj rimedoj ne permesas nin nun ilin aĉeti!"

La altrapida disvolvigo de la agrikultura produkto devigis la kooperativojn starigi fabrikojn por

### Maljunula Hejmo *Novjara pentraĵo de Lin De-vej*





servi al la agrikultura produkto, precipe tiujn de agrikulturaj instrumentoj, por provizi la necesajn novajn kaj ripari la difektitajn. En majo kaj junio, 1958, la legomkampojn de la Dua Pionira Kooperativo subite atakis serioza katastrofo de malutilaj insektoj. El pli ol cent blovaspergiloj posedataj de la kooperativo multaj jam difektiĝis pro seninterrompa uzado tage kaj nokte. Ju pli frue ili estos riparitaj, des pli multo da legomoj povos esti savita el la buŝoj de la insektoj. Sed kiom povis fari la malgranda malbone ekipita riparejo de la kooperativo kun nur tri laborantoj? La kooperativanoj devis sendi la difektitajn blovaspergilojn al la Riparejo de Agrikulturaj Instrumentoj kvin liojn\* for. Sed tiutempe ankaŭ tiu ĉi fabriko estis superŝarĝita per laboroj. Rimarkante ke tiom da legomoj formanĝas la malutilaj insektoj, la kooperativanoj multe ĉagreniĝis. Ili interkonsiliĝis pri definitiva kontraŭrimedo kaj unuanime konkludis: "Estos pli bone se la kooperativoj unuiĝos." La subdistrikta registaro ankaŭ konsideris la eblecon kune starigi grandan fabrikon por instrument-riparado per la fortoj de kooperativoj kaj eĉ pruntakiris por ili du tornilojn. Sed la plano estis fine nuligita pro tio ke kooperativoj ne akordiĝis en siaj opinioj, precipe pri la problemo: "Kiu gvidu la entreprenon?"

Kun la kresko de la produkto de legomoj, kreskis ankaŭ la transporta kvanto. La personoj respondecaj pri la transportado en la daŭro de la dekdua meznokte ĝis la oka matene, povis ir-reiri nur unu fojon por la distanco de kvardekelkaj lioj. La laboro estis peza, sed la tasko ofte ne bone plenumita. La lukto kontraŭ la naturaj katastrofoj, same kiel tiu sur la batalkampoj, iafoje postulas koncentri superan batalforton por solvi iun decidigan batalon. Alie oni suferos gravan perdon. Des pli por la legomoj kiuj estas "delikataj" kreskaĵoj. Antaŭ la kooperativigo foje pro atako de frostoj 70% de la legomoj en la tuta subdistrikto estis frostmortigitaj en unu nokto. Multaj kamparanoj ploris senhelpe kaj forte sentis malfortecon de individua ekonomio antaŭ la atako de naturaj katastrofoj. Post la fondiĝo de la altgradaj kooperativoj, tia situacio ŝanĝiĝis sufiĉe multe, sed ankoraŭ ne tute likvidiĝis. La kooperativanoj estis ĉiam maltrankvilaj, ĉar ili sciis ke sen pligrandskala kunlaboro, restas ankoraŭ multe da malfacilaĵoj por supervenki la naturajn katastrofojn kaj efektiviĝi la celon de "dekmil ĝinoj po muo".

Por disolvegi la produkton, la kamparanoj senpacience sopiris unuiĝi en grandan kooperativon rompante la malnovajn limojn.

## Natura naskiĝo post matura embriogenio

**T**UTEMPE multaj kadroj kaj membroj de la kooperativoj ĉiel klopodis trovi novan elirejon.

Por efektiviĝi la grandan antaŭensalton, ili iris al Pudong, Ĉangsoŭ, kaj eĉ Hiaŭgan kaj Maĉeng de Hubej-provinco, ĉien por "peti sutron"†.

En julio de 1958, grupo da kadroj de la bazaj organizoj de la antaŭurboj de Ŝanhajo vizitis la guberniojn de Sujping, Hinhiang kaj aliaj de Henan-provinco. Inter ili troviĝis Ĉen Ĉang-gen, prezidanto de la Unua Pionira Kooperativo, kiu reprezentis Tangnan-subdistrikton. Ĵus alveninte al la unua celita loko, ili ekaŭdis pri tute nova afero "Popola komunumo". Poste ili aŭdis kaj propraokule vidis multajn avantaĝojn de la popola komunumo. Konstatinte la grandan potencon de la popola komunumo, Ĉen sentis en si senliman ĝojon, kaj tuj post la reveno al Ŝanhajo propagandis ĝin ĉie, tiel en la kooperativoj kiel en la produktaj brigadoj, kaj la novaĵo pri la starigo de popolaj komunumoj en Henan-provinco rapide disfamiĝis tra la tuta Tangnan-subdistrikto. La sciigo malfermis al la entuziasmitaj kooperativanoj esperplenan perspektivon. Ekde tiam, ĉie ajn ili renkontis la kadrojn, ili persekutis la lastajn per la demando: "Kiam ni starigos popolan komunumon?"

Tiam estis publikita la rezolucio pri la starigo de popolaj komunumoj en la kamparo aprobita de la Politika Buroo de Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio. La kooperativanoj en Tangnan-subdistrikto fariĝis des pli ĝojaj. Diskutado okazis ĉie en la kooperativoj kaj produktaj brigadoj kaj ĉiuj postulis, ke la popola komunumo starigu kiel eble plej frue. Tage la anoj sin okupis pri profunda plugado, kaj nokte ili skribis opini-afiŝojn kaj petskribojn por membriĝo al la komunumo. En la daŭro de nur kelkaj tagoj proksimume dek mil opini-afiŝoj kaj decidskriboj estis prezentitaj al la oficejo de subdistrikta registaro. La urĝemo de la vasta amaso de malriĉaj kamparanoj kaj malsupraj mezkamparanoj por komunumaniĝo estis precipe granda. Ankaŭ la plejparto de la supraj mezkamparanoj, kiuj jam spertis la avantaĝon de kolektivigo, skribis opini-afiŝojn, por aliĝo al la komunumo. Iu maljunulino nomata Ĵaŭ Gie-ŝe, kiu restis individua kamparanino ekde la organizado de interhelpaj grupoj nun ankaŭ petis aliĝi al la popola komunumo, kiam ŝi aŭdis ke "la manĝo estos senpaga" por la komunumanoj. Nur kelkaj, kiuj kontentiĝis je la estanta stato, provis vane bari tiun ĉi torrente ŝveliĝantan tajdon. Tiujn personojn povis reprezenti la bonhava mezkamparano Ĉen Kĵuan-gen, kiu diris dum la diskutado: "Ĉu la altgrada kooperativo ne estas sufiĉe bona? Kial oni ankoraŭ fondos popolan komunumon?" Sed tiu ĉi opinio estis tuj refutita de la vasta amaso. Jang Gen-hing, kiu estis dungito ĉe bienuloj longatempe en la malnova socio, diris: "Estas prave ke la malaltgradaj kooperativoj estas pli bonaj ol la interhelpaj grupoj kaj la altgradaj kooperativoj pli bonaj ol la malaltgradaj. Sed mi estas certa ke la popolaj komunumoj estos pli bonaj ol la altgradaj kooperativoj." Samtempe la amaso ripete asertis, ke la aliĝo estas tute memvola kaj neniu devigo estos altrudita al tiuj, kiuj ne volas aliĝi.

Dank' al la inspirado kaj eksplikado de aliaj membroj, Ĉen Kjuan-gen kaj la aliaj kontraŭuloj forlasis sian intencon "halti duonvoje" kaj ankaŭ sin anoncis por aliĝo al la komunumo. Post tiu plene libera ĝenerala diskutado, la aktiveco kaj spirito de la vasta amaso de kooperativanaro por starigi popolan komunmon ankoraŭ pli alte leviĝis.

Je la 27-a de sept., la Pengpu-a Popola Komunumo naskiĝis kiel maturiĝinta feti. Senprecedence granda solena inaŭguro okazis en tiu tago. La celebran procesion partoprenis pli ol dek mil personoj, frapante tamburojn kaj tamtamojn kaj dancante drak-lanternan dancon kun alte levitaj ruĝaj flagoj kaj tabuloj montrantaj per ciferoj kaj bildoj la atingajojn akiritajn omaĝe al la popola komunumo okaze de ĝia fondiĝo. Survoje ili senĉese hurais: "Vivu la Ĉina Komunista Partio!" "Vivu Prezidanto Maŭ!" k. a. Tia varmega sceno estis absolute ne estigebla per "brukrioj" de malmultaj personoj. La dekstremaj oportunistoj diris: "La popola komunumo estas la kreaĵo de la Komunista Partio." Sed fakte, la Komunista Partio nur

### La porkoj grasaj kaj la jaro riĉrikolta

*Ĉinstila pentraĵo de Huang Ĝou*



plenumis la funkcion de "akuŝigado", por ke la maturiĝinta "feti" naskiĝu senakcidente.

### Senkompara vivipovo

**T**UJ kiam la popola komunumo estis starigita, montriĝis ĝia senkompara vivipovo. Multaj kontraŭdiroj, kiuj estis longe ne solveblaj dum la tempo de altgradaj kooperativoj, nun estis solvitaj aŭ komencis esti solvataj, paŝo post paŝo.

La deziro de la vasta anaro sin ekipi per agrikulturaj instrumentoj kaj modernaj transportiloj por efektiviĝi la grandan antaŭensalton komencis esti plenumita. La kontraŭdiro de nesufiĉo de laborfortoj ankaŭ trovis kompare kontentigan solvon. Dank' al la supereco de la popola komunumo: "unue grandeco, due komuneco" kaj dispono de pli granda kapitalo, ĝi estas nun marŝanta grandpaŝe al la celo de agrikultura mekanikigo. Nuntempe la Pengpu-a Popola Komunumo jam posedas 19 traktorojn de diversaj tipoj, 45 pumpilojn (inkluzive stacion de artefarita pluvo), 8 ŝarĝaŭtomobilojn, kaj krome modernajn elektrajn blovaspergilojn kaj elektran elkovilon. Kiom ekscititaj estis la komunumanoj, kiam tiuj maŝinoj ekfunkciis, ke ili konkure alportis teon aŭ nokt-maĝon al la traktoristoj. La utiligo de tiuj ĉi agrikulturaj maŝinoj multe kontribuis en disvolvado de produktado kaj plibonigo de la laborkondiĉoj de komunumanoj. Laŭ la statistiko de januaro ĝis aŭgusto, 1959, la traktoroj jam plugis pli ol 4,000 muojn da tero kaj la ŝarĝaŭtomobiloj transportis meznombro pli ol 1,800 tanojn\* da legomo ĉiutage. Nur tiuj ĉi du jam ŝparis pli ol 90,000 labortagojn. En somero, kiam Ŝanhajon atakis tia sekeco kaj varmego, kian oni ne spertis dum la pasintaj kelkdek jaroj, por dek kelkaj tagoj la temperaturo estis super 36° C. Kvin muoj da kampoj de brasikoj apartenantaj al la Tangnan-a produkta brigado<sup>3</sup>, pro la tro alta situacio de la grundo, ne povis esti akvumitaj per maŝinoj. Kvankam oni uzis pli ol 30 labortagojn kaj urĝe akvumis ses fojojn, la brasikoj finfine ankoraŭ mortis pro sekegeco. Sed dank' al la tagnokta irigaciado per pumpiloj, ĉiuj aliaj legomkampoj havis abundan rikolton. Rigardante la verdverdan maron de legomoj sub la flamanta suno, la komunumanoj diris: "Grandan meritplanan sukceson akiris la popola komunumo."

Estis plenumita ankaŭ la deziro de la kamparanoj starigi pli grandajn fabrikojn priservantajn la agrikulturan produktadon por efektiviĝi la grandan antaŭensalton. Post la komunumiĝo, ili efektiviĝis la politikon de samtempa disvolvo de agrikulturo kaj industrio kaj aktive disvolvis industrion administratan de la komunumo. Dum la pasinta jaro ili jam nove starigis dek grandajn kaj malgrandajn fabrikojn kaj unuigis la kvar ripar-staciojn de agrikulturaj instrumentoj en plivastigitan Pioniran Fabrikon de



Agrikulturaj Instrumentoj kun pli ol 100 laboristoj. La fabriko nun havas 4 bor-maŝinojn, 2 rabot-maŝinojn por metalajoj, 1 rabotmaŝinon por ligajoj, 1 segmaŝinon por lignajoj, 1 kompletan da muldaj ekipaĵoj kaj 1 fandforonon. La fizionomio de la fabriko tute noviĝis, kun laborsfero ampleksanta muldadon, forĝadon, veldadon, tornado, muntadon, rabotadon kaj laboradon pri elektraĵoj instalajoj. Ili ne nur riparas kaj muntas agrikulturajn instrumentojn kaj transportilojn kiel pumpilojn kaj ŝarĝaŭtomobilojn, sed ankaŭ mem fabrikas dispecigajn maŝinojn por furaĝo, portebajn elektroveldilojn, kaj lastatempe sukcesis fabriki tranĉmaŝinon por furaĝo kaj semad-maŝinon de kotonoj kaj de sojfabo. Sub la aktiva subtenado kaj helpado de la urbaj laboristoj, ili jam eledukis grupon da "indiĝenaj specialistoj" kaj teknikaj laboristoj.

La deziro de la membroj labori kunordigite en pli granda kadro por efektiviĝi la grandan antaŭensalton ankaŭ realiĝis. Tio manifestis gigantajn fortojn kaj venkis multajn malfacilaĵojn, antaŭe ne konkereblajn. En la komenco de januaro, 1959, malvarmega aerfluo malofte renkontita dum la pasinta jardeko estis atakanta Ŝanhajon. Post kontrolo oni trovis, ke pro nesufiĉo de homforto kaj pajlo, pli ol 1,000 muoj da legomkampoj de la Tangnan-a produkta brigado estis ankoraŭ ne bone ŝirmitaj kaj sekve minacataj de la danĝero de baldaŭa frostmorto. La popola komunumo per urĝa ordono, mobilizis ĉiujn membrojn—laboristojn, kamparanojn, komercistojn, lernantojn kaj soldatojn—al senprokrasta helpo. Pli ol 30 ŝarĝaŭtomobiloj kaj traktoroj estis venigitaj por transporti la pajlon. Multaj anoj el aliaj produktaj brigadoj manĝis pli frue kaj kuris ok aŭ dek liojn por doni helpon. Stimulite de tia komunisma kunlaborado, la anoj de la Tangnan-a produkta brigado laboris kun des pli granda entuziasmo. En malpli ol ses horoj, kaj antaŭ la alveno de la malvarmega aerfluo, pli ol 20,000 tanoj da legomoj estis rikoltitaj kaj pli ol 1,000 muoj da legomkampoj kovritaj per pajlo. Malgraŭ ke la malvarmego atingis ok gradojn C. sub nulo, la legomoj restis nedamaĝitaj. El tiu ĉi sukcesa lukto kontraŭ la malvarmego la kamparanoj rimarkis la forton de la popola komunumo kaj ĝin prikantis:

*Ne timas granda ŝipo antaŭ ondatako,  
Nek antaŭ frostoj granda homamaso.  
Saltadas ni antaŭen, kvin en unu,  
Senlime fortas la popola komunumo.*

Ĉar la popola komunumo estas solvinta kaj solvanta serion da kontraŭdiroj kaj montris sian superecon multe pli grandan ol tiun de la altgrada kooperativo, la agrikultura produktado akiris superrapidan disvolvigon. La pomua produktokvanto de legomoj de la komunumo jam rompis la limon de dek mil ĝinoj kaj superis sian antaŭensalton celon. La pomua produktokvanto en 1958 estis pli ol 11,000 ĝinoj. En la



**Pli ol 70 el la membroj de Pengpu-a Popola Komunumo jam fariĝis maŝinmanipulantoj, kaj la plejparto de ĝiaj kampoj estas kulturitaj per traktoroj**

*Foto de Ĝaŭ Kang*

periodo de jan. ĝis aŭg., 1959, laŭ la kvanto alportita al la merkato, la pomua kvanto estis meznombro jam pli ol 8,600 ĝinoj, t. e., pliiĝis je 28% ol en la sama periodo de 1958. Oni sukcesis efektiviĝi la garantion: "Dum la tuta jaro estu ĉiam verdaj legomoj kaj la liverado estu ekvilibra en ĉiu sezono." La specaro de legomoj fariĝis pli kaj pli kompleta. Kaj la komunumo nove konstruis 141 varmdomojn en kiuj kreskas dum vintro ruĝaj tomatoj, verdaj kukumoj, purpuraj melongenoj, blankaj agarikoj. . . .

En la lasta jaro ankaŭ multe disvolviĝis la diversspeca entreprenado. Tuj post la starigo de la popola komunumo, la produktaj brigadoj konstruis porkejojn kaj disvolvis porkbredadon. Nun ĉiu familio bredas meznombro 4.4 porkojn. La kvanto de porkoj liveritaj de la komunumo al la merkato dum la unua duonjaro de 1959 egalas al tiu dum la tuta jaro de 1958. La nombro de kokoj kaj anasoj bredataj en 1959 estis proksimume sepoble de tiu en 1958. Kiel la komunumanoj priskribis, "la ĝardenoj estas plenaj je legomoj, la staloj je porkoj kaj ŝafoj, en la laĝetoj svarmas

fiŝoj, kaj kokoj kaj anasoj vivas en grandaj gregoj.”

Kune kun la kreskado de la produkto, la vivnivelo de la komunumaj membroj ankaŭ rimarkinde leviĝis. Jen estas la meznombraj jaroj enspezoj de ĉiu kamparano en diversaj jaroj:

1949	55 juaĵoj
1957	90 juaĵoj
1958	129 juaĵoj
1959	160 juaĵoj (laŭ antaŭkalkulo)

Tio montras ke la meznombra jara enspezo de ĉiu kamparano en 1959 pliiĝis laŭ antaŭkalkulo je 24% ol en 1958, je 78% ol en 1957 kaj je 191% ol en 1949.

La akumulo de la komunumo, kiu ankaŭ plimultiĝas tagon post tago, nun atingis 2,050,000 juaĵojn, inter kiuj 440,000 juaĵoj estas sub la posedo de la komunumo (ceteraj de la produktaj brigadoj). Tio estas la semo de ankoraŭ pli granda feliĉo de la popolo.

El la ses produktaj brigadoj de la komunumo, du jam efektivigis la sistemon de senpaga manĝo dum la aliaj kvar tiun de senpaga provizo de manĝgreno. En 1959 la komunumo konstruis Novan Vilaĝon de Kamparanoj kun areo de 10,000 kvadrataj metroj, inkluzive komunan manĝejon, infanvartejon, infanĝardenon, ĉionvendejon, higienan stacion kaj disaŭdigan ĉambron. Kiam la komunumano Lu Ĉun-lin transloĝiĝis en la novan vilaĝon, li diris kun ĝoja eksciteco: “Dum kvardek tri jaroj mi loĝadis en kabano, sen ununura tegolo super mi. Kiu antaŭvidis, ke unu jaron post la starigo de la popola komunumo mi povos enloĝiĝi en tian novan domon kun tegolita tegmento?” Rigardante la infanojn ludantajn sur la planko, li ne sciis kion diri al la vizitantoj kiuj venis pririgardi. Fine li diris:

“Unuvorte, la popola komunumo ja estas bona.”


La popola komunumo nur ĵus komencis elmontrian superecon kaj jam venigis tiajn grandajn ŝanĝojn. Se la popola komunumo estus “antaŭtempa naskito”, ĉu iu “denaske malsana” organizo povus montri tian grandan forton?

\* ĝino = 1/2 kg., muo = 1/15 hektaro, tano = 50 kg., juano = ĉina monunujo, lio = 1/2 km.

\*\* Novjaro laŭ la ĉina luna kalendaro, plej grava festo tradicia en Ĉinio.

† T. e. lerni bonajn spertojn.

‡ Amplekse respondanta al la antaŭa altgrada kooperativo.



KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \*

### Alia ŝtalponto trans Jangzi-rivero

Alia granda ŝtalponto trans Jangzi-rivero, la plej granda rivero en Ĉinio, estas finkonstruita kaj en lasta decembro ekfunkciis por fervoja komunikado. Tiu ĉi granda ŝtalponto estas la dua trans Jangzi. Ĝi situas ĉe la grava urbo Ĉunkino en orienta parto de Siĉuan-provinco. La longeco estas 820 metroj kaj per ĝi interligiĝas la fervojoj Ĉengdu-Ĉunkin-a kaj Siĉuan-Gujŝou-a. Sur la ponto estas du fervojoj por ir-reiraj trajnoj. La projektado kaj konstruado estas farita ekskluzive de ĉinaj teknikistoj. La konstruado komenciĝis en septembro de 1958, kaj post nur 14 monatoj la tuta laboro

estas finita, t. e. oni pli frue finis la laboron je 8 monatoj.

### Eldono de “Ĉinaj Vegetaĵoj”

Eldoniĝis la unua volumo de “Ĉinaj Vegetaĵoj”, granda scienca verko en Ĉinio. Tiu ĉi volumo estas dediĉita al la pteridofitoj (Pteridophyta). Ĝi ampleksas 450,000 ideografiajn kaj en ĝi priskribiĝas kun ilustraĵoj pli ol 400 specioj de la pteridofitoj kreskantaj en Ĉinio, kaj al ĉiuj specioj estas detale skribitaj la morfologio kaj la kreskado, ankaŭ iliaj ekonomiaj utiloj estas notitaj. La tuta verko enhavas 80 volumojn kaj ĉirkaŭ 28,000,000 ideografiajn, kun proksimume 30,000 specioj da superaj vegetaĵoj kreskantaj en Ĉinio enskribitaj.

### Filmo-projekcia reto tra la tuta lando

Antaŭ la liberigo en 1949 en Ĉinio troviĝas nur ĉirkaŭ 600 kinejoj centriĝintaj en kelkaj grandaj urboj. Sed nun funkcias jam pli ol 15,000 filmoprojekciaj unuoj kun 50 miloj da laborantoj en la urboj, kamparoj tra la tuta lando. Novaj kinejoj kun modernaj ekipaĵoj stariĝis ĉie, filmoprojekciaj trupoj kaj kluboj kun projekciaj ekipaĵoj des pli grandakvante floras. En multaj popolkomunumoj nun organiziĝas ankaŭ filmoprojekciaj trupoj. Laŭ statistiko filmrigardantaro en 1959, superis 4 miliardojn da persono-fojoj, t. e. 85-oble de tiu en 1949.



Vong Vej Je:

# Tradicia amikeco inter ĉinaj elmigrintoj kaj la popolo de Indonezio

## Tradicia amikeco de pli ol 1,500 jaroj

INTER la popoloj de Ĉinio kaj Indonezio ekzistas tradicia amikeco jam de pli ol 1,500 jaroj. Laŭ la kroniko de ĉinaj historiaj verkoj, la popoloj de Ĉinio kaj Indonezio jam interfrekventis en amikeco ekde la 2-a jarcento p. K. La eminenta ĉina monaĥo Fahian vizitis Indonezion en la 4-a jc. p.K. En la jaro 433 Javo sendis sian ekonomian komisiiton al Ĉinio. En 644 kaj 670 Malaju kaj Sjriwidjaja de Sumatro sinsekve rilatiĝis kun Ĉinio kaj estigis ekonomian interfluon. En la klasika literaturo de Indonezio, la biografio de la heroo "Hangdua", estis priskribitaj la interesaj vizitoj de vojaĝantoj el Bali kaj Sumatro al Ĉinio. Meze de la 15-a jc., Ĝeng He, kiu sep-foje veturis al "Hijang" (la Okcidenta Oceano, t. e. de Sudorienta Azio ĝis la orienta bordo de Afriko) jam multfoje vizitis Indonezion kaj faris negocon kun la lando. Liaj vojaĝoj estas rakonto tre ŝatata de la ĉinoj kaj li mem fariĝis historia figuro multe admirata en la koroj de indonezianoj. Dank' al liaj sep vojaĝoj al "Hijang", la popoloj de Sudorienta Azio ekkomprenis la noblan senton de amo al paco de la ĉina popolo kaj ekkreskis amikeco inter la ĉina popolo kaj la popoloj tra Sudorienta Azio. Tiam komercado inter la ĉina kaj Indonezia popoloj baziĝis sur egaleco, reciproka profito, kaj interŝanĝo de varoj mankaj al unu aŭ alia flanko. Ĉinio neniam faris rabadon al la Indonezia aŭ aliaj popoloj en Sudorienta Azio per sia prestiĝo kaj potenco kiel granda lando. Tial, la komercado inter Ĉinio kaj Indonezio estis tre bonvena al la

popolo de Indonezio. Laŭ "Rakonto pri Dupo-lando (Javo)" en la "Historio de Song-dinastio" oni skribis: "la ĉinaj komercistoj alvenintaj estis akceptataj en domojn por honoraj gastoj kaj regalataj per manĝaĵoj riĉaj kaj puraj." Dum longa tempo ekde tiam, la popoloj de Ĉinio kaj Indonezio komercas kaj komunikiĝas en atmosfero de pacemo kaj amikeco.

## Ĉinaj elmigrintoj fundamente diferencas de l' koloniistoj

ĈINAJ elmigrintoj loĝantaj en Indonezio ludis gravan rolon en la interamikiĝo de la ĉina kaj Indonezia popoloj. Ĉinaj elmigrintoj antaŭ longe ekloĝiĝis en Indonezio. Ma Huan, sekretario de

Ĝeng He, kiu vojaĝis al "Hijang", skribis en sia verko "Vizitoj al la Bordo de Felando", ke en diversaj lokoj de Indonezio troviĝas ĉinaj elmigrintoj. Post la vojaĝoj pli multe da ĉinoj elmigris en Indonezion. Analizoj de la historiaj materialoj de ĉinaj elmigrintoj montras ke plejparte de la ĉinoj kiuj elmigris al Sudorienta Azio estis kamparanoj prirabataj ĝis bankroto sub feŭda ekspluatado kaj imperiisma subpremado, laboristoj sub trompaj kontraktoj kaj apudmaraj loĝantoj perforte kaptitaj de la Okcidentaj koloniistoj. Tial, la ĉinaj elmigrintoj fundamente diferencas de la elmigrintoj el la Okcidentaj koloniismaj landoj, kiuj iris kun celo rabi la riĉajn provizojn de la postrestaj landoj.

## Saluto el Rostov-Don

*Karaj geamikoj en la tutmondo!*

*Ni, rostovaj geesperantistoj salutas vin okaze de la veninta Novjaro 1960. Ni deziras al vi plenan sukceson en via glora porpaca batalo per Esperanto.*

*Nun, kiam samtempe kun la alveno de 1960 alvenas la printempo kaj la degelado en la internaciaj interrilatoj, ni — esperantistoj en tuta mondo devas plifortigi niajn streĉojn kaj fortojn por plifirmigo de la porpacaj ideoj.*

*En 1960 ni devas iri kune kaj postuli, ke la registaroj plenumu la deziron de la tuta homaro: "FOR ARMILARON! POR PACO KAJ INTERKOMPRENIĜO INTER ĈIUJ POPOLOJ! VIVU LA PACO KAJ AMIKECO!"*

*Sanon, feliĉon kaj sukcesojn en via porpaca batalo!*

*En nomo de rostova esperantistaro*

*Docento Viktor Gruško*

*USSR Rostov-Don 6 Socialistiĉeskaja 169, kv. 4*

La ĉinaj elmigrintoj atinginte Indonezion rigardis ĝin kiel sian "duan hejmlandon". Kune kun la popolo de Indonezio ili disvolvis la socian ekonomion, kaj sur la bazo de tiu komuna ekonomia vivo, ili ellernis la Indonezian lingvon, kaj alprenis la Indoneziajn kutimojn kaj modojn. Multe el ili ankaŭ geedziĝis kun tieaj loĝantoj, havis filojn kaj filinojn kaj fariĝis parencoj en rilato sango-

karne nedisigebla. La amikeco inter la ĉinaj elmigrintoj kaj la Indonezia popolo estas bazita sur tiaj komunaj laboro kaj vivo. Samtempe en la amikeca kontakto de la ĉinaj elmigrintoj kaj la popolo de Indonezio, la antaŭaj ankaŭ konigis al la Indonezia popolo siajn teknikojn en produktado kaj kulturon, tiel ke la popolo de Indonezio, pli profunde komprenis la ĉinan popolon kaj la amikeco inter ili plue disvolviĝis.

## Kontribuo al la prosperigo de la Indonezia socio

**D**UM la dinastioj Tang, Song, Juan kaj la komenca epoko de Ming, la socio de Ĉinio estis en la feŭda periodo kiam kulturo kaj ekonomio jam certgrade disvolviĝis. Tiam la ĉina industrio — precipe metiindustrio, komerco kaj agrikulturo sufiĉe alte evoluis; sed tiam Indonezio sin trovis ankoraŭ en malpli alta etapo de la

# Ĉinaj elmigrintoj en Indonezio

(Fotoj de Hinhua Novajservo)



La ĉinaj elmigrintoj kontribuis kaj kontribuas sian penlaboron al la utiligo de minoj en Indonezio. La produktokvanto de plumbio en Indonezio okupas la duan lokon en la mondo, kaj la plej granda plumbominejo en Indonezio — la Bangka-Billiton-a Plumbio-minejo ĝis nun dungas plejparte ĉinajn elmigrintojn kiel laboristojn. Jen la ĉinaj elmigrintaj ministoj en la plumbio-minejo.

Jen la "Ruĝa Rivereto" proksime de Djakarta, la ĉefurbo de Indonezio. En la jaro 1740, en luktado kontraŭ la Nederlanda koloniista regado, la ĉinaj elmigrintoj kune kun la Indonezia popolo faradis intensajn batalojn kontraŭ la Nederlandaj koloniistaj armeoj. Multaj ĉinaj elmigrintoj oferis sian vivon ruĝigante tiun rivereton. Por ilin memori la posteuloj ĝin nomas "Ruĝa Rivereto".






socia disvolviĝo. Tial la interkomercado de Ĉinio kaj Indonezio kaj la enmigro de ĉinoj en Indonezio ambaŭ certgrade stimulis la disvolviĝon de la ekonomio de Indonezio. Multaj teknikoj por produktado diskonigitaj de ĉinaj elmigrintoj al Indonezia popolo estis vaste bonvenigitaj en ĉiuj partoj de Indonezio. Ekz., ĝis la 19-a jarcento, la kamparanoj en Kalimantan ankoraŭ uzis ĉinajn plugilojn; la kulturarto por

kreskigo de sukerkanoj, la metodoj en produkto de sukero kaj plantado de sinapoj en Javo estis alportitaj de ĉinoj el la provincoj Guangdong kaj Fugian; la elfosado kaj fandado de plumbo en la komenca periodo en Billiton kaj Bangka ankaŭ dependis de la tekniko de ĉinoj el Junnan-provinco. Samtempe la ĉinaj elmigrintoj disvastigis la ĉinan kulturon en Indonezio kaj tio certgrade florigis kulturon de Indonezio. Ekz.,

kiam Ma Huan akompanis Ĝeng He al "Hijang" en la 15-a jarcento, li rimarkis ke en Javo ankoraŭ "ne troviĝas papero kaj plumo. Oni gravuris sur la latifoliaj\* ŝeloj per pintaj tranĉiloj", ŝmiris ilin per karbopulvoroj por videbli la vortojn. Sed ĝis la 16-a jc. ĉinaj komercistoj jam alportis tien paperon. Tio multe helpis al la disvolviĝo de Indonezia kulturo. Taŭvejstak, la fondinto de la Orient-India Partio, skribis en





**Dum la komenca periodo de la Billiton-a Plumbominejo la ĉinaj elmigrintaj ministoj uzis ĉina-tipan akvoradon por dreni la akvon el la minejo.**



**La diligenta kaj peniga laborado de ĉinaj elmigrintaj etkomercistoj kaj etvendistoj ludas certan aktivan rolon en la ekonomia vivo de Indonezio. Jen ĉina elmigrinta etvendisto aĉete alportas per sia propra laboro malnovajn jutsakojn el la urbo kelkdek kilometrojn for.**

**En la printempo de 1959, la ĉina Ĝenerala Asocio en Bandung, Indonezio, alvokis la lokajn elmigrintajn ĉinojn partopreni la fosadon de la fluejo de Liulien-rivero, ĉe la orienta antaŭurbo de Bandung. La rivero superakvas dum la tuta jaro, kaŭzante katastrofojn. Jen la ĉinoj laboras en la rivero.**

**Ĉinaj elmigrintoj partoprenis en la fosado de la fluejo de Liulian-rivero ekster la urbo Bandung, Indonezio. Jen la ĉinoj fosas la teron.**





sia verko "Historia Skizo de Indonezio", ke "... interalie, tia komerco havas ankaŭ alian avantaĝon, ke la supereca kulturo de Ĉinio disvastigita en ĉiuj lokoj de nia lando pliriĉigis kaj pliampleksigis niajn artojn kaj kulturon. Niaj prapatroj el-lernis de Ĉinio la teknikon pri bredo de silkraŭpoj kaj la metodon por silkoteksado."

Krome, la ĉinaj elmigrintoj, kune kun la Indonezia popolo en komuna laborado klopodis por la socia prosperigo de Indonezio. En ekspluatado de plumbominoj de la insuloj Billiton kaj Bangka, en starigo de la fiŝkaptaj distriktoj de Bajenjabi, en konstruado de la plantejoj en Sumatro, kaj en utiligo de arbaroj de okcidenta Kalimantan, ĉie laboris komune multaj ĉinaj ministoj, fiŝistoj kaj plantejaj laboristoj kun la Indonezia popolo. Ankaŭ estis multaj ĉinaj komercistoj, kiuj funkciigis butikojn en la solecaj vilaĝoj, serve al la vasta popolamaso de Indonezio, provizas ilin per ĉiutagaj necesajoj kaj liveras al la urboj agrikulturajn produktaĵojn de la kamparanoj. La ĉinaj butikistoj tiel kontribuis al la varo-interŝanĝo inter la urboj kaj vilaĝoj de Indonezio. Konsekvence, la ĉinaj elmigrintoj estas ĉie bonvenigataj de ĝia vasta loĝantaro.

### **Batalo ŝultron ĉe ŝultro kontraŭ la komunaj malamikoj**

POST la invado de la Nederlandaj koloniistoj en Indonezion, la ĉinaj elmigrintoj, samkiel la Indonezia popolo, suferadis kruelan subpremado de la koloniistoj. Tial, en la longjaraj bataloj de la Indonezia popolo kontraŭ la Nederlanda koloniismo, la vastaj ĉinaj elmigrintoj ĉiam staris ĉe la flanko de la Indonezia popolo. La ĉinaj ministoj en Billiton kaj Bangka, kune kun la Indoneziaj kontraŭstaris la posedantojn de la "Konko"-marka kaj la "Standard"-a Petrol-entreprenoj. En la jaroj 1740-1744, la ĉinaj elmigrintoj kuniĝis kun la Indonezia po-

polo en batalo kontraŭ la subpremado de la Nederlandaj koloniistoj. Ili ankaŭ partoprenis la gerilajn trupojn de la Indonezia popolo kontraŭ la japanaj faŝistoj, kaj la defendbatalojn de Indonezia popolo kontraŭ la Unuiĝinta armeo de la koloniistoj. Ili partoprenis la heroecan "defendon de Surabaja" de Indonezio. . . . Nemalmultaj ĉinaj elmigrintoj verŝis sian sangon aŭ oferis siajn vivojn por la naciliberigo kaj sendependeco de Indonezio.

### **Nova etapo de profunda amikeco**

POST la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en la jaro 1949, la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Indonezio disvolviĝas en novan etapon. Inter la du landoj estiĝis egalrajta reciproke profita interrilato en komerco. Ĉinio ankaŭ donis al Indonezio helpojn ekonomian kaj teknikan en ĝia ekonomia konstruado, el sinceraj deziroj subteni la disvolviĝon de sendependa ekonomio de la Indonezia nacio.

La ĉina registaro multfoje admonis siajn elmigrintojn ke ili aktive partoprenu entreprenojn favorajn al la ekonomia disvolviĝo de Indonezio, ke ili paceme kunvivu kun la Indonezia popolo, prizorgante la bonstaton de la Indonezia popolo. En Indonezio, la plej granda parto de la ĉinaj elmigrintoj observas tiujn admonojn de sia registaro. Ili aktive partoprenas la diritajn entreprenojn kaj kun entuziasmo partoprenas sociajn entreprenojn kulturajn, edukajn kaj bonstatajn, utilajn al la Indonezia popolo. Kiam la registaro de Indonezio en marto de 1959 postulis de ĉiuj komercistoj ke ili helpu en la stabiligo de varprezoj, la ĉinaj organizaĵoj en Djakarta kaj Gjukang kaj ĉiuj jurnalaj redaktataj de ĉinaj elmigrintoj alvokis al la ĉinaj elmigrintoj, ke ili helpu la Indonezian registaron en la laboro de stabiligo de varprezoj. Dum la batalo kontraŭ imperiismo de la

Indonezia popolo por postuli la redonon de Okcidenta Iriano, la ĉinaj elmigrintoj en Djakarta partoprenis la manifestacian mitingon de la Indonezia popolo por la liberigo de Okcidenta Iriano. En tiu kunveno la ĉinaj elmigrintoj esprimis sian tutkoran subtenon al la popolo de Indonezio en la batalo por reakiro de tiu landparto. Iuj ĉinaj elmigrintoj en Javo kaj Sumatro eĉ per monrimedoj subtenas la laboron de la agada komitato por la liberiĝo de Okcidenta Iriano.

Samkiel la popolo de Indonezio, la ĉinaj elmigrintoj sincere deziras la plifruan ekstermon de la ribela armeo por ke oni povu pli bone plenumi la pacan konstruadon. Kien la registaraj armeoj atingis kun la tasko ekstermi la ribelarmeon, tie ili estis fervore bonvenigitaj kaj konsolitaj de la ĉinaj elmigrintoj.

La profunda amikeco inter la ĉinaj elmigrintoj kaj la popolo de Indonezio plenigis la historion kaj ŝvebas super la vasta tero de Indonezio. Tiu ĉi amikeco havas ne nur longdaŭran kaj grandan influon sed ankaŭ firman bazon. Ĉiuj imperiistoj kaj iliaj agentoj, kiuj intrigas por rompi tiun amikecon finfine fiaskos.

La amikeco inter la ĉina kaj Indonezia popoloj sendube daŭros kaj pli kaj pli vastiĝos kaj grandiĝos. Vivu la amikeco inter ĉinaj elmigrintoj kaj la popolo de Indonezio!

\**Zizania latifolia.*





# Nova disvolviĝo de kulturo kaj edukado en Tibeto

**L**A sukceso de la demokratia reformo de "Tri kontraŭoj kaj du malpliigoj\*" estigis novan disvolviĝon de kulturo kaj edukado en Tibeto. La vesperaj lernejoj por kamparanoj kaj la elementaj lernejoj fonditaj de la popolo mem, ĉie aperis en urboj kaj vilaĝoj kiel fungoj post pluvo. La emancipita vasta amaso de la Tibeta laboranta popolo tiel avidas kleriĝon, ke ili utiligas ĉiun eblon por lernado. La kultura vivo de urba kaj vilaĝa popolo estas ankaŭ senprecedence vigla.

"Klerigi la sekvantan generacion" estas la komuna volo de la nuntempa Tibeta popolo, kiu baraktis por sin liberigi. Tuj post kiam la demokratia reformo komenciĝis, ili jam esprimis deziron fondi lernejojn, ĉar antaŭ la Liberiĝo, ja estis neniu regula lernejo en la tuta regiono de Tibeto. Post la Liberiĝo, fondiĝis kelkaj lernejoj en la urboj, tamen pro la subpremado de la feŭda potenco, la infanoj de la popolamaso ankoraŭ ne povis viziti lernejojn. Dum la movado de demokratia reformo, la laboranta popolo diris: "Ĉar nun ni estas liberaj, ni deziras ke niaj infanoj vizitu lernejon." Laborantoj senditaj de la Komunista Partio ilin subtenas kaj helpas por efektiviĝi la deziron. Tial, en la soleca montregiono de Himalaja, en la vasta herbejo de Nigra Rivero, en la distriktoj de Ari kaj Ĉangtu malproksime de Lhasa, kaj en multaj lokoj de Tibeto, popolfonditaj elementaj lernejoj aperis unu post la alia. De tiam

\* Kontraŭ ribelo, kontraŭ devigservo, kontraŭ servuto kaj malpliigoj de lupago kaj rentumo.

ŝanĝiĝis la historie kulturmanka aspekto de la Tibeta altebeno. En la regionoj Lhasa kaj Montarsudo, kie la movado de demokratia reformo procedis pli frue, preskaŭ ĉiuj gubernioj kaj multaj vilaĝoj havas siajn lernejojn. En la soleca vilaĝo, Gheĝi Ŝika, situanta sur la deklivo de la monto Mo, norde de Himalaja, pli ol kvin mil metrojn super la marnivelo, troviĝas nur dudek familioj, kie lernejo ankaŭ establiĝis tuj post la fondiĝo de la prepara komitato de la kamparana unio. En Lhasa kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, troviĝas pli ol dudek popolfonditaj elementaj lernejoj.

Tiuj ĉi lernejoj alportis senlimajn ĝojon kaj esperon al la Tibeta laboranta popolo, kaj gajnis de ili profundan amon: Ili mem kondukis siajn infanojn al lernejo, prezentis "hada"\*\*\* kaj saluton al la portreto de Prezidanto Maŭ Zedong, kaj helpis al la lernejo solvi malfacilaĵojn. En vilaĝoj la popolfonditaj elementaj lernejoj estis ofte vizitataj de maljunuloj, kiuj venis en libertempo nur por vidi siajn lernantajn infanojn kaj returne iris senbrue kun kontenta rideto. Kiam la lernantoj ripetis alfabetojn aŭ kantojn ellernitajn al siaj gepatroj, la lastaj ĉiam karesis iliajn kapojn dirante emocie kaj ĝoje: "La feŭdaj regintoj pensis ke niaj infanoj povas nur esti sklavo, paŝti bovojn kaj ŝafojn, sed en efektiveco, kiel lertaj ili estas!"

En Lhasa, Ŝekaze, Ĉangtu kaj Zedang estas ankaŭ dek tri publikaj elementaj lernejoj kaj unu mezlernejo. Nun la lernantoj nom-

\*\* Silkaĵo uzata kiel omaĝo de tibetanoj.

bras duoble ĝis trioble pli ol antaŭ la subpremo de ribelo. La Tria Mezlernejo, fondita post la subpremo de ribelo, planis unue enlasi 300 lernantojn, kaj fine pli ol 600 lernantoj estis enskribitaj. En la pasinteco, plejmulto de la lernantaro en la Unua Elementa Lernejo en Lhasa estis infanoj de riĉaj familioj, sed nun la infanoj de la malriĉaj formas la plimulton de la lernantaro en ĉiu lernejo de la urbo.

En la tagoj kiam ili batalis por liberigo kaj ĝisfunda detruo de feŭda sistemo, la Tibeta laboranta popolo precipe konsciis ke ili forte bezonas lernadon kaj klerecon. Dum la movado "elverŝi dolorojn", ili plendis, ke pro sia malklereco ili estis ĉiel trompita de la feŭdaj mastrosinjoroj, kaj dum ili celebris pri sia nova vivo kaj efektiviĝis la taskon de demokratia reformo, ili ree sentis la malfacilecon pro sia malklereco.

## Gelernantoj de la Unua Elementa Lernejo de Lhasa faras gimnastikajn ekzercojn

Foto de Ĵen Jong-ĝaŭ





**La meteorologia esploro "Ruĝa Majo" en la mezlernejo de Lhasa**

*Foto de Ĵen Jong-ĝaŭ*

Tial ili memkonscie komencas marŝi al klereco per diligenta lernado. En Lhasa la popolo mem establis 35 suplementajn klerigajn lernejojn, kiuj estis vizitataj de ĉirkaŭ du mil metiistoj, etkomercoj, kolportistoj kaj malriĉuloj. La membroj de diversaj loĝantar-komitatoj regule kunvenis por studi la dokumentojn pri demokratia reformo kaj la Tibetan Ĵurnalon. En la regiono Montarsudo establiĝis kvar vesperaj lernejoj, vizitataj regule de pli ol 500 kamparanoj. Ĉiuj vespere oni venas verve post laborado en la tago, kun skribotabuleto sub brako kaj bambuskrubilo en mano, marŝante unu aŭ du liojn al la vespera lernejo kaj tie studas ĝis meznokto. Multaj maljunuloj, maljunulinoj 50-60 jaraĝaj kaj gefilojn havantaj virinoj fariĝas ankaŭ aktivuloj de lernado.

En la arda kultura revolucio, kultura vivo de la urba kaj vilaĝa popolo montriĝis precipe vigla. La tibetanoj havas la bonan tradicion de kantado kaj dancado. En tiuj tagoj de granda ŝanĝiĝo, kiam la feŭda servuta sistemo estis detruata, ili ĉion sentis tiel profunde ke ili elverŝis siajn verajn sentojn per kantoj. Novaj popolkantoj pri la feliĉa vivo, pri

la Komunista Partio kaj pri Prezidanto Maŭ Ze-dong estas tiel multaj kiel steloj sur la ĉielo. Dum la movado de la demokratia reformo efektiviĝas en vilaĝoj, la kamparanoj kantis post kunvenoj,

dum la bruligo de procentegaj kontraktoj, dum la starigo de hejmo por la sendomaj langsenoj, kaj ili ankaŭ kantis dum fondiĝo de lernejoj kaj abunda rikolto; ili kantis pri sia profunda malamo al la estintaj feŭdaj mastrosinjoroj, kaj ankaŭ pri siaj hodiaŭaj feliĉoj kaj ĝojoj.

Oni ankaŭ esprimas la novan revolucionan enhavon per diversaj tradiciaj formoj de literaturo. En urboj aŭ en vilaĝoj, la laboranta popolo prezentis novajn Tibetajn teatraĵojn aŭ vivgazetajn drametojn verkitajn de ili mem pri la ekspluatado kaj subpremado de la tri grandaj feŭdaj mastrosinjoroj kiuj subpremegis la popolon en la pasinteco, kaj la krimoj de la ribelinta reakcia kliko de la Tibeta supera tavolo. En la kvar loĝataj kvartaloj de Lhasa, establiĝis amatoraj trupoj kun pli ol 300 ludan-

† *La plej malsupera el la tri klasoj de servutuloj en Tibeto, kiu servas en la hejmo de siaj mastrosinjoroj de generacio al generacio.*

**Oriente ruĝas sun'**

*Lignogravuraĵo de Niu Ven*





toj, kiuj estas metiistoj, malriĉaj kamparanoj, kaj iamaj almozuloj kaj langsen-oj. Ekde la unuaj tagoj de julio, ili senĉese ludis sur stratoj kaj en grandaj kortoj kie estas pli multe da loĝantoj, malkovrante la mallumon de la feŭda servuta socio, kaj propagandi la partiajn politikojn en subpremo de ribelo kaj de "tri kontraŭoj kaj du malpliigoj". Ili pretigis pli ol dek drametojn vivgazetajn kaj dudek kelkajn dancajn programerojn, kiuj plene esprimas ilian

ĝojon post la Liberiĝo kaj estas tre bonvenaj al la loĝantaro.

Plej bonvenigataj de la tibetanoj estas filmoj. Sed, en la pasinteco, diversaj kondiĉoj limigis al ili rigardon de filmoj. Post la sukcesa subpremo de ribelo la Popola Kinoteatro en Lhasa projekcias filmojn precipe por la urba loĝantaro. La cirkulantaj filmotrupoj en Lhasa kaj en la regiono Montarsudo ofte servas en vilaĝoj kaj paŝtejoj per filmoprezentado al kamparanoj kaj

paŝtistoj. Dum la pasintaj kelkaj monatoj, pli ol sepdek fojojn oni filmoprotekciis antaŭ pli ol 70,000 spektantoj. La Lhasa-a filmotrupo ankaŭ penetris en najbarajn guberniojn, tiel ke la loĝantaro en montregiono povis vidi filmon la unuan fojon.

Kun la efektiviĝo de la demokratia reformo kaj la disvolviĝo de diversaj konstruadoj, la Tibeta kulturo kaj edukado certe antaŭenmarŝos kun ĉiam nova progreso.

*Malaĉinĥu (mongolo):*

# Uojperdo

## I

**G**IANg Jan estis graveda jam de kvar monatoj kiam ŝi preparis sin por forlasi Siĉuan, sian naskiĝan provincon, kaj veturi al Baŭtoŭ. Tiam admonis ŝin ŝia patrino: "La Fera kaj Ŝtala Kompanio de Baŭtoŭ estos same bone konstruita, eĉ se vi iom prokrastos la vojaĝon. Prefere iru post la akuŝo!" Sed Giang Jan restis firma en sia decido kaj daŭrigis la preparadon. Kaj ŝiaj amikinoj ŝerce diris al la patrino: "Lasu ŝin iri, onklino! Ŝi preskaŭ freneziga pro sopiro revidi sian Ĝuĉjon!" Sed por ŝi, verdire, la grandioza konstruado de la Fera kaj Ŝtala Kompanio de Baŭtoŭ multe pli altiris ŝin ol la revido de la edzo. Tamen ŝi respondis al siaj amikinoj kun ŝajnigita seriozeco: "Jes, ja! Kiu ne sopiras al sia edzo en malproksima loko?"

Ŝi alvenis al Baŭtoŭ. Ĉar ŝi estis kuracistino dum ŝia edzo laboris en termezura brigado, la geedzoj povis sin renkonti apenaŭ unu fojon ĉiumonate. Nur kelkajn monatojn poste, kiam alproksimiĝis ŝia akuŝtempo, ŝi iris al sia edzo por pasigi la antaŭakuŝan libertempon. En tiu tempo, sur ambaŭ bordoj de Ĥundlen-rivero etendiĝis nur vasta kaj soleca stepo.


Ne ekzistis eĉ unu terkabano, por ne paroli jam pri loĝejoj. La termezura brigado loĝis en tendoj. Ili starigis por la geedzoj apartan tendon. Dumtage, kiam ŝia edzo eliris labori, Giang Jan restis sola en sia "hejmo".

Oni diris ke promeni estas bona korpekzercado por akuŝontino. Iutage post vespermanĝo, kiam ŝia edzo forlasis hejmon por ĉeesti kunvenon, ŝi iris el la tendo por fari promenadon. Sur la senlima stepo, origita de la radioj de la suno subiranta, regis plena silento. Sur la tero staris flagetoj, ruĝaj kaj blankaj, ligitaj per maldikaj ŝnuroj en linioj de malsamaj direktoj. "Ni ŝanĝos tiun ĉi solecan stepon en bazon de fero kaj ŝtalo, unuaklasan en la mondo". Ŝi ekridis pretervole, kiam ŝi rememoris tiujn vortojn kiujn ŝia edzo diradis al ŝi kun entuziasmo. "Bazo de fero kaj ŝtalo, unuaklasa en la mondo! Sed nun troviĝas nur sablaj montetoj, ŝnuroj, flagetoj..." Ŝi ne dubis pri la vortoj de sia edzo, tute ne, ĉar ĝuste pro tiu granda idealo ŝi ja alvenis ĉi tien. Tamen la realiĝo de la idealo kuŝas en estonteco tro malproksima. Ne estas ia afero facile plenumbla, konstrui sur la dezerta tero bazo de fero kaj ŝtalo, unuaklasan en la mondo!

Giang Jan sencele iris antaŭen sur la senvoja stepo. Okcidente, la krespusko iom post iom pli mal-

**Parto de la Ferŝtala bazo de Baŭtoŭ**

*Foto de Juan Ĵu-sun*



heliĝis. Unu aglo fiere flugis supre. Sur fora altaĵo, vagadis senzorge grupo da ĉamoj kiuj sin konsideris ĝis nun ankoraŭ "mastroj" de la stepo.

Giang Jan sencele antaŭen iris laŭlonge de Ĥundlen-rivero kies sabla fundo estis videbla pro malleviĝo de la akvo. Ne malproksime kelkaj kampaj ratoj kuretis tien reen. Ŝi volis preni pecon da ŝtono por ĵetfrapi ilin sed ŝi ne povis kliniĝi kaj nur faris kelkajn siblojn kiuj ilin fortimigis.

La krepusko daŭris mallonge. La nokto disetendis ĉiam pli vasten sian unuan vualon. Ŝi ne povis antaŭen iri plu. Kiam ŝi returnis sin, ŝi ektrovis ŝi jam iris tro longan distancon tiel ke la tendoj de la termezura brigado fariĝis tute nevideblaj malantaŭ la foraj sablaj montetoj. Se ŝi ne vidus la rektan linion de la spuroj kiujn ŝi ĵus lasis, ŝi preskaŭ ne sciis laŭ kiu direkto ŝi iru por reatingi la hejmon.

Se nur la flagetoj starigitaj de la termezura brigado estos retrovitaj, la vojo jam ne perdiĝos. Ŝi iris serĉante. Sur la stepo, nebuligita de la nokta ombro, ŝi nenion povis distingi ĉirkaŭ si, kvazaŭ ŝin atakis subite noktoblindeco. Krome, nuboj kovris la ĉielon kaj ne lasis vidi la Grandan Urson. Post kelktempa irado, la talio kaj la kruroj komencis dolori al ŝi, kaj ŝi ne povis ne halti por iom ripozi. Nun ŝi ekrimarkis ke ĉi tie estas marĉejo kiun ŝi ĵus tute ne preterpasis.

La unuan fojon aperis nun en ŝia cerbo la teruraj vortoj: "Mi perdis la vojon!"

Ŝi volis fari kriojn, sed kiu povus ŝin aŭdi en la vastejo kie vidiĝis eĉ neniu lumeto de lampo? Ne, krei ŝi ne devis! Oni diris ke tie ĉirkaŭe estas lupoj. Se ŝiaj krioj alvokus ilin, estus ankoraŭ pli malbone. La penso pri lupoj ekkaŭzis al ŝi senton de timo. Antaŭ kelkaj tagoj unu ŝafo de la termezura brigado estis rabita de lupo. Pensante pri tio ŝi diris al si: "Ĉi tie mi ne devas longe resti. Iru, antaŭen!"

Iom poste, ŝi sukcesis eliri el la marĉejo. Tamen estis videbla ankoraŭ neniu lamplumo. Ŝi tiel ĉagreniĝis ke ŝi volis ja plori.

La laco komencis ŝin ataki. Ŝiaj paŝoj fariĝis ĉiam pli malrapidaj, sed ŝi ne volis halti kaj persiste trenis sin antaŭen paŝo post paŝo . . . Subite ŝi sentis doloron ĉe la ventro, kio vere ŝin konsternis. Ŝi premis la ventron per manplato kaj sidigis sin sur la teron. Ĉu ne la laciĝo fruigis la akuŝon? En la soleca stepo! . . . Kie estas la termezura brigado kaj la edzo? Ĉu ili ankoraŭ ne finis sian kunvenon?

En tiu momento aŭdiĝis en takto ia sono: "Ta, ta. . ." Kiam la sono alproksimiĝis, ŝi povis distingi ke ĝi estas de ĉevalhufoj. Retenante sian spiradon ŝi fiksas sian rigardon al la alproksimiĝanta nigra figuro. Ŝi volis krei, sed ŝi timis. Dum tiu hezitado, rajdanto kun fusilo ĉe la ŝultro ekaperis antaŭ ŝi.

Trovante ke sur la tero kuŝas io nigra, la ĉevalo surprizite deturnis flanken kaj komencis forkuri. La rajdanto rapide ĝin haltigis streĉante la bridon kaj demandis laŭte:

"Ĥen? Jamar Ĥun? (Mongole: Kion vi faras?)

Giang Jan ne komprenis lin, sed ŝi povis diveni pli malpli kion li demandis.

"Mi estas de la termezura brigado."

"Do vi estas laboristino?" La rajdanto redemandis en la ĉina lingvo, sed en tono mongola: "Kion vi faras sola ĉi tie sidante?"

"Mi perdis la vojon."

"Ve, junulino!"

Giang Jan rimarkis ke li estas mongola maljunulo, pli ol 50-jara, kun afabla paŝtista vizaĝo, plena je sulkoj. Espero eklumis en ŝi, kvazaŭ ŝi trovus sian familianon. Ŝi pensis: "Mi estas savita!"

La maljuna paŝtisto nomiĝis Ĥuĥe. De pli ol dudek jaroj li jam paŝtis nomade sur tiu ĉi stepo. Poste li transloĝiĝis malantaŭ la monton. Hodiaŭ kelkaj el liaj bovoj elgrediĝis kaj malaperis, pro tio li portis sian ĉasfusilon kaj venis ilin serĉi.

Post kiam Giang Jan rakontis al li la okazintaĵon, la maljunulo riproĉis ke ŝi ne devis deiri tiom longe de la tendaro kaj samtempe li petis ŝin rapide surĉevaliĝi por konduki ŝin hejmen. Sed ŝi timis ke ŝi eble falos de la ĉevalo, ĉar ŝi rajdis neniam antaŭe. Ĥuĥe asertis ke li kondukos la ĉevalon tenante la bridon, kaj tiamaniere ŝi neniel falos. Sed ŝi ankoraŭ hezitis akcepti la proponon kvazaŭ temus pri io ne deca. La paŝtisto malpacientiĝis kaj paŝis al ŝi por ŝin surĉevaliĝi. Nur tiam ŝi surĉevaliĝis.

Kondukante la ĉevalon Ĥuĥe marŝas rekte antaŭen, kvazaŭ sur ebena ŝoseo. Longan tempon poste ekflagretis en malproksimo lamplumo.

"Ho, fine mi retrovas la hejmon! Onklo, kiel dankema mi . . ." Ne fininte sian entuziasman parolon, Giang Jan denove eksentis doloron ĉe la ventro. Sed li eltenis ĝin kaj ne sciigis al la maljunulo.


Kiam ili atingis la tendojn, tie regis malkvieta bruado. Estis evidente ke post la kunveno ili estis surprizitaj kaj maltrankviligitaj de la malapero de Giang Jan.

Kiam Giang Jan deĉevaliĝis helpe de la maljunulo ĉe la tendo, ŝia edzo kaj kelkaj junuloj estis ĝuste pretaj foriri por ŝin serĉi kun elektraĵtorĉoj en la manoj. Giang Jan komunikis al sia edzo ke ŝia ventro forte ŝin doloras. La ĉeestantaro ne komprenis kio okazas kaj antaŭ ĉio ŝin subtene kondukis en la tendon. Oni petis la maljunan paŝtiston tranokti ĉe la brigado, sed li ne konsentis dirante ke li devas iri serĉi siajn bovojn ĉi-nokte ĉar, alie, ili forvagos tro malproksimen kaj fariĝos ne retroveblaj. Li adiaŭis la brigadanojn kaj rapidis for.

## II

**R**EVENINTE post tiu serĉado de bovoj la maljuna Ĥuĥe ne alvenis al antaŭmonto por pluraj jaroj. Pri tio ke la Fera kaj Ŝtala Kompanio de Baŭtoŭ estos baldaŭ finkonstruita kaj ke la stepo





Angulo de la loĝkvartalo de la ferstala bazo de Baŭtoŭ.

Foto de Juan Ju-sun

estas plena de altaj domoj, li nur informiĝis el la letero de sia filo, kiu sin anoncis kiam la Kompanio varbis la unuan grupon de mongolaj laboristoj, kaj revenis al la Kompanio en Baŭtoŭ nur antaŭ unu monato, post lernado en la Fera kaj Ŝtala Kompanio de Anŝan.

En la lastaj tagoj, la patro ricevis plurajn leterojn de sia filo kiu petis lin veni al la Kompanio kaj lin revidi.

La maljunulo tion faris. Kaj kion li vidis? Antaŭ la monto, la stepo radikale ŝanĝis sian fizionomion — li venis kvazaŭ al nova mondo. Rigardante al la bordoj de Ĥundlen-rivero, li ekviŝis al si la okulojn kaj demandis: “Ĉu tio estas nia mongola tero?” . . .”

Ĥuĥe ekloĝis kun sia filo en ĉambro sur la dua etaĝo de laborista loĝejo. Tage, kiam la filo laboris, li restis sola en la ĉambro, tre enue. Li do decidis fari promenadon ekstere. Por faciligi la retrovon de la loĝejo, li metis la ĉevalvapon ĉe la pordo de la domo kie li loĝis, kaj poste li ekiris trankvile.

Post longa marŝado li sukcesis eliri el la domaro kaj surpaŝi straton, kiu estis homplena, kredeble pro tio ke tiam estis horo de laborfiniĝo. La maljunulo rigardadis tien kaj ĉi tien, kaj vagadis senzorge. Kaj li ekpensis en si: “Eble estas ĉi tie, kie mi renkontis tiujare kuracistinon kiu perdis sian vojon.” Li promenadis kaj promenadis, preterpasante, neniun sciis, kiom da domaroj kaj stratoj. La suno malleviĝis nerimarkite malantaŭ la okcidentaj montoj. La tempo estis jam malfrua. Kredante ke lia filo certe finis nun sian laboron, li rapidis returne.

Ho, kiom da domoj estas konstruitaj ĉi tie! Li preterpasis ilin unu post la alia. Ili estis samkoloraj kaj kun sama alteco, kiel ŝafidoj naskitaj en sama tago, kiujn oni malfacile povas diferencigi unu de la alia. Li iris rapidpaŝe al sia hejmo. Vidate de malproksime tiu vico da pluretaĝaj domoj staranta antaŭ li ŝajnis kie li loĝis, sed alproksimiĝinte li trovis ke tie ne troviĝas lia loĝejo. Li rememoris ke li metis

ĉevalvapon ĉe la pordo de la loĝejo. La sola rimedo por li nun estis serĉi la vapon. Li pririgardis la pordojn unu post la alia, de domo al domo, de domvico al domvico . . . Ne, tio ne donos rezulton! Tiamaniere li neniam sukcesus reatingi la hejmon eĉ se li serĉus ĝis rompiĝo de la kruroj. Krome, kiu povas certigi ke li ne tiel iras eĉ pli malproksimen de sia hejmo? Kiam la elektraĵaj lampoj lumigis ĉiujn domojn kaj la nokto envolvis la urbon, li ankoraŭ estis senhelpe vaganta. Li volis demandi al aliaj, sed kiel li povis tion fari, ne sciante mem la numeron de sia loĝejo?

Nun aperis en lia cerbo la vortoj: “Mi perdis la vojon!”

La laceco komencis lin ataki. La mongolaj botoj peziĝis sur liaj piedoj kvazaŭ ili estus faritaj el fero. Li ne povis ne halti por iom ripozi.

Li sidigis sin ĉe angulo de domo. Kiam li estis cerbumanta al kiu direkto li devos sin turni por retrovi la hejmon, rapide alpaŝis persono, kiu ne rimarkante ke sidas homo ĉe la angulo, surtretis la piedon de la maljunulo. La alveninto estis virino. Ŝi tuj petis lian pardonon: “Senkulpigu min, ĉar mi venis kun mia infano de la vartejo kaj rapidas hejmen.”

En la ombro de la domo la maljunulo ne povis klare vidi ŝian vizaĝon. Li ekstaris, respondante: “Ne gravas.” Poste li aldonis: “Kamaradino, mi perdis la vojon. Ĉu vi scias kie loĝas la mongola laboristo Gonĉig?”

“Gonĉig? Ĉu li estas ŝtallaboristo?”

“Jes, jes!” Li respondis senprokraste.

“Ni laboras en la sama fabriko. Lia hejmo estas proksima al la mia. Iru do kun mi!”

Plena je ĝojo Ĥuĥe ŝin sekvis. Post mallonga momento ili haltis antaŭ domo ĉe kies pordo troviĝis ankoraŭ ĉevalvipo.

“Jen, ni jam alvenis. Li loĝas sur la dua etaĝo. Ĝis revido!”

Tuj post la adiaŭo, ŝi ekforiris. Komprenoble Ĥuĥe ne volis lasi ŝin iri. Li postkuris ŝin, kriante:

“Mi treege vin dankas! Sed kial vi, konatino de Gonĉig, ĵus helpinta min el embaraso, ne eniras nian hejmon por iom ripozi? Mi estas la patro de Gonĉig.”

“Morgaŭ mi venos, onklo! Ĉar la paĉjo de la infano nin atendas hejme.”

“Ne, vi ne devas foriri! Mi venis de la stepo kun multe da butero, kazeo, kremo, lakta vino. . . Laŭ nia mongola moro, vi ne devas foriri antaŭ ol preni en nia hejmo kelkajn laktajojn kaj trinki tason da lakta teo.”

Kiam ili estis senfine sin interpersvadanta, alrapidis persono de la orienta flanko. Ŝajnis ke li havas ion urĝan. Kiam li proksimiĝis, ili trovis ke li estas neniu alia ol Gonĉig.

“Kien vi iris, paĉjo? Mi serĉadis sed vin ne trovis. Ĵus mi volis eliri por vin serĉi ekster la loĝejo.”

“Mi perdis la vojon kaj tiu ĉi kamaradino min kondukis hejmen.”

Gonĉig sin turnis al la kamaradino kaj diris: “Multajn dankojn!”

La gastino fine cedis kaj eniris ilian ĉambron kun sia infano. Ŝi petis la maljunulon sidiĝi. Tiu ĉi kontraŭpetis, dirante:

“La gastino devas sidiĝi la unua. Vi ja estas mia bonfarantino!”

Metinte sian infanon sur la liton, la kamaradino ridante alparolis la maljunulon:

“Onklo, ne estu . . .” Apenaŭ ŝi eldiris tiujn vortojn, ŝi subite, oni ne scias kial, ekŝtoniĝis, kaj tuj sekve ekriis: “Ho, estas vi, onklo Ĥuĥe! . . . Kia hazardo!”

Gonĉig tute konfuziĝis, ankaŭ la maljunulo.

“Onklo Ĥuĥe, mi estas Giang Jan. Ĉu vi ne memoras ke iunokte mi perdis la vojon kaj vi kondukis min al la termezura brigado? En tiu sama nokto mi naskis tiun ĉi infanon!”

Nun la maljunulo tion rememoris. Li rigardis la amindan infanon sur la lito kaj demandis:

“Kiom da jaroj ĝi havas?”

“Tri jarojn.”


“Ho, nur dum mallongaj tri jaroj!” Diris kun emocio la maljunulo, kaj sin proksimigis al la fenestro, ekster kiu ĉie lumis lampoj kaj fumo ŝvebis en la aero.

Ankaŭ la junulo kaj la junulino paŝis al la fenestro kvazaŭ interkonsentinte. Feliĉaj larmoj brilis ĉe la okulanguloj de la maljunulo:

“Infanoj, mi ne atendis ke iutage mi perdus vojon tie kie mi paŝis en mia juna aĝo! Ho, kiel bonsorta vojperdo!”

Trad. Yang Yongsan

# TRI POPOLOJ



*Plej bonas regado de mem la  
popol'*

—El Vusan-gubernio, Gansu-provinc—

Ilustris Mi Gu

*Vuŝan-a blankrizo, Lanĝoŭ-a melon';  
Plej ame dorlotas gepatra la kor';  
Plej karas la nia Komunista Partio;  
Plej bonas regado de mem la popol'.*

*Brodigās pompege la peoni-flor';  
Semriĉas granato de roza kolor';  
La heliantflor' al la sun' turnigadas;  
Komunist-partion postsekvus popol'.*

*Profunde radikas surmonta pinarb';  
Kaj ĉiam verdverdas ĝia foliar';  
Fidele l' Partio l' popolon priservas—  
La vivo bonigās nun jaron post jar'.*



# KANTOJ

## *Laŭ la fluo naĝas fiŝo*

—De la tibetanoj en Kinghaj-provinco—

Ilustris Huang Ĝou

*Laŭ la fluo naĝas fiŝoj,  
Nuben flugas aglo-viro;  
Ho, karulo, estu aglo—  
Koopera pioniro.*

*River-ondoj maren kuras,  
Alta l' aglo foren flugas;  
Ho, karul' imitu tion—  
Ĉiam sekvu la Partion.*



## *Patrinan domon iras novedzino*

—El Henan-provinco—

Ilustris Li Kjun

*Persikaj floroj —  
Ruĝ' de l' aŭroro,  
Patrinan domon iras novedzino.  
En vestoj kiaj?  
Helblua pantalon', jaketo flora.  
Ornamoj kiaj?  
Ĉe la tempio, pirofloro blanka.  
Kiu akompanas?  
Ja ŝia edzo.  
Ĉu iu vidas?  
Mi mem vidas,  
Kaj aŭdas eĉ parolon korintiman.  
La edz' demandas:  
"Kiam vi revenos de l' patrino?"  
Kun kapklino  
La novedzino  
Ruĝiĝas kvazaŭ persikfloro:  
"Vi trankviligu vian koron.  
Mi iras nun kaj venos morgaŭ.  
Mi preterlasos nek laboron  
De l' Komunum', nek lernoĥoron."*

Trad. Laŭlum



## La fiŝista kanto ĉe Erhaj

Ŝvebis sonora kanto en la nokta vento . . . .

Kantis Jumej, la fiŝista fraŭlino, dume ŝi zorgeme riparis la rompitan fiŝreton.

Subite, la kanto ĉesis kvazaŭ tondita per tondilo. La penso malagrabra denove sin prezentis en ŝia koro. Gape fiksinte dum momento sian rigardon al la fiŝista fajro antaŭ si kaj ekmordante sian lipon, ŝi diris decideme: "Hm, ni vidu, kiu la unua alparolos la alian!"

Ŝia amato Hajŝuan estas fame konata licea diplomito en la komunumo, lerta en skribado kaj pentrado. La komunumo intencis lin perfektigi, kaj decidis sendi lin al la agrikultura kolegio en la provinca ĉefurbo. Sed la komunumestro difinis al li taskon antaŭ la foriro pentri bildon de la perspektiva plano de la komunumo jam longe pripensita, por ke oni povu

ĝin pendigi sur la muron kaj montri al la amaso en la komunumana kunveno la estontecon brillan samkiel la bela lago Erhaj.

Kiu atendis, ke tiun gravan taskon Hajŝuan tute forgesis, ĉar sciiginte pri la baldaŭa eniro en la altan lernejon, li estis ege ravita, ke li sin dediĉis tagnokte al relernado de siaj lernejoj taskoj forgesante eĉ la dormon. La junulo ja timis, ke li ne povos sekvi la kurson en la kolegio, kaj per tio alportos malhonoron al la komunumo.

En la tago de la kunveno Jumej kolere okulserĉis Hajŝuan. Dume li retiriĝis en la angulo de la kunvenejo kun kapo ĝistere klinita, kaj eĉ solan rigardon li ne kuraĝis jeti al ŝi.

Kolere Jumej hejmeniris antaŭ la fino de la kunveno kaj tuj skribis opiniafiŝon pri Hajŝuan, ke "li zorgas nur pri si mem sed nenion



Feliĉe vivas la baj-nacianoj loĝantaj ĉe Erhaj

Foto de Ki Guan-san

pri la komunumo!" Ŝi algluis la afiŝon ĉe la pordo de la kunvenejo. Post la kunveno, multaj svarmis tie. Finleginte, oni diris ridante: "Tio estas rektifa kampanjo inter la juna paro!"

Pasis jam semajno ekde tiu tempo. Neniu el ili alsalutis la alian. Se ili renkontiĝis, Hajŝuan klinis sian kapon kun ruĝiĝanta vizaĝo, kaj Jumej fortunis la kapon kun paŭzata buŝeto, preter-

\* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \*

### Esploro de glaciriveroj

La Esplora Taĉmento por Utiligo de Glacio sur Altaj Montoj de Ĉina Scienca Akademio finis siajn esplorajn laborojn pri glaciazaj riĉfontoj sur Tianŝan, la plej granda montaro en Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. La taĉmento surbaze de propra esplorado kaj materialoj de aerofotografado sur la monto Tianŝan trovis pli ol 1,400 kvadratajn kilometrojn da glaci-riveroj. La akvovolumeno entenata en tiuj glaciriveroj atingis 88,000 milionojn da kubaj metroj. Ĝi trovis

ankaŭ tre riĉan laŭsezonan neĝamason. Ĝiaj esploroj liveras riĉajn materialojn por studi kiel plene utiligi la glacieron kaj neĝon sur Tianŝan, transformi la sekan fizionomion norde kaj sude de la montaro kaj plivastigi la kultureblan teron.

### Sciencaj esploroj en popolkomunumoj

Por kontentigi la bezonojn de agrikultura teknika reformo nun en multaj popolkomunumoj en Ĉinio floras sciencaj esploroj kaj tiuj esploroj rikoltas riĉajn fruk-

tojn. Ekzemple, en la popolkomunumoj en Guangdong-provinco stariĝis jam proksimume dudek mil sciencaj unuoj, agrikulturaj institutoj kaj eksperimentaj stacioj. Agrikulturaj eksperimentaj stacioj, la popolamasa agrikultura scienca organizo, de la popolkomunumoj en Guangxi-provinco atingas du mil. Tiuj esploroj akcelas altigon de agrikulturaj produktoj kaj reformas agrikulturajn produktajn teknikojn, kaj tial la organizoj fariĝas centroj por akceli la riĉan rikolton sur granda areo kaj krei la plej altan rikolton en agrikultura produktado.



pasante unu la alian. Sed ŝi ĵus aŭdis, ke li foriros morgaŭ. . . .

“Se li vere tiel foriros kaj min ignorus eterne . . . . .” Ŝi ne kuraĝis pensi pli, “Nu, lin vizitu kaj klarigu la aferon. . . .” Ŝi stariĝis, sed hezitante momenton ŝi denove sidiĝis. “Ne, ja ne mi kulpas pri tio!”

Ŝvebis denove sonora kanto en la nokta vento. . . .

Denove ĉesiĝis la kanto. Ŝi ekaŭdis la familiaran paŝbruon pli kaj pli alproksimiĝantan, kaj ŝi klare aŭdis ĉiun paŝon tiel delikatan.

Ŝi sentis, ke li jam staras post ŝia dorso.

Rapidiĝis la batado de ŝia koro, ekstremis ŝiaj manoj kaj ŝia vizaĝo ardis kvazaŭ en brulego.

Subite susure falis bela pentraĵo antaŭ ŝi el lia mano. Ho, jen la alta monto Ĉangŝan kaj eĉ kun blanka nuboj kvazaŭ silka rubando ĉirkaŭ ĝi. Kaj jen Erhaj, kiom vasta ĝi estas! Kio estas tio? Ho, jes, lumaj domoj kaj larĝa ŝoseo! Ho, tie estas hospitalo, klubo, granda magazeno . . . . . Sed kial ne estas kamelioj kiel tiuj foje de li al ŝi donacitaj?

“Oni devas aldoni kelkajn branĉojn da kamelioj.” Ŝi eldiris senkonscie.

“Kion?” Li ne klare aŭdis.

Konfuzite Ŝi ruĝiĝis kaj haste klare klarigis: “Mi diris, ke tuj ĝin donu al la komunumestro.”

“La komunumestro ordonis min ĝin doni al vi . . . . .”

“Kial do?”

“Li diris, ke ĝin transdonu al li pere de vi. . . . .”

“Sed, kial?”

“La komunumestro diris, ke li, li volas esti paĉiganto kaj religi

la rompitan fadenon inter ni.” Des pli mallaŭtiĝis la voĉo.

Ŝi sentis, ke li jam sidiĝis, tuj apude sidiĝis. Ŝi kovris per manoj sian vizaĝon honteme ardant-

an kaj malantaŭen sinkliniĝinte, falis sur lian bruston larĝan kaj varman.

Ŝvebis denove sonora kanto en la nokta vento . . . . .

### Knabinoj de baj-nacio loĝantaj ĉe Erhaj

Foto de Ki Guan-ŝan



\*Lago en Dali-gubernio en Junnan-provinco.



# Zamenhofa Jubileo

avide rigardis la ĉeestantoj. En la sama tago aperis en la ĵurnalo Ĝuangming Ribao artikolo de K-do Sun Jong omaĝe al Zamenhofa Jaro. En la sekvinta tago raportis pri la kunveno multaj ĵurnaloj, laŭ la informo sendita de Hin-hua-a Informo-servo. En la 15-a decembro 1959, la Ĵurnalo Ren-min Ribao, organo de la Ĉina Komunista Partio, aperigis memorigan artikolon de K-do Hujucz "La Espero Estas Realiĝanta" kaj mallongan klarigan artikolon pri Zamenhof kaj Esperanto.

## En Vjetnamio

La 100-jara datreveno de la naskiĝo de Doktoro Ludoviko Zamenhof estas solene celebrata en Hanoi, ĉefurbo de Vjetnama Demokratia Respubliko. Ĝin organizis Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio. Partoprenis la solenajon, gerezpresentantoj de Vjetnama Packomitato, de Vjetnama Patrolanda Fronto, S-ro ataŝeo al Pola Ambasadato en Hanoi, kelkaj ataŝeoj kulturaj en la ambasadoj Sovetia, ĉina, bulgara, k. a., krome pli ol 500

**Kamarado Hujucz (prezidanto de Ĉ. E. L.) malfermas la kunvenon**

## En Pekino

Por jubilei la 100-an datrevenon de 1<sup>a</sup> naskiĝtago de D-ro L. L. Zamenhof, la Ĉina Esperanto-Ligo okazigis memor-kunvenon en Pekino la 13-an de dec. 1959, kune kun la Ĉina-Pola Amikeca Asocio. Ĉirkaŭ 100 personoj partoprenis la feston, inter kiuj troviĝis reprezentantoj de diversaj kulturaj institucioj kaj ĵurnalistoj. La kunvenon prezidis K-do Hujucz, prezidanto de ĈEL, kaj ĉeestis ankaŭ la vicprezidanto de la Ĉina-Pola Amikeca Asocio K-do He Ĉeng-hiang.

K-do Je Laishi, vicprezidanto de ĈEL, faris prelegon pri la vivo kaj la laboro de la kreinto de la lingvo Esperanto kaj pri la jubilea 44-a Universala Kongreso kiun li mem partoprenis.

Parolis al la kunveno K-do S. Flato, la provizora komisiito de aferoj de la Pola Ambasadorejo, kiu ĉeestis kun sia edzino kaj la pola kultura ataŝeo K-do A. Dembnicki. Parolis ankaŭ Prof. Ĉen

Ki-hiang de la Pekina Universitato kaj K-do Yeh Chun-chien, verkisto.

Estis aranĝita en la kunvenejo ekspozicio pri Esperanto, kiun

**Parto de la Esperanta ekspozicio aranĝita okaze de la Zamenhof-festo en Pekino**





gemembroj, gekursanoj kaj simpatiantoj de la Asocio en Hanoi.

En tiu kunsido, S-ro Hoang-Minh-Giam, Vjetnama Ministro de Kulturo kaj honora membro de Centra Komitato de la Asocio, prelegis pri la vivo kaj verkaro de L. Zamenhof. Li substrekis la gravan rolon de la lingvo internacia Esperanto en la porpaca batalo kaj la kultura interŝanĝado de la popoloj. Li speciale rememorigis pri la Rezolucio de la 2-a MEM-Konferenco, kiu postulis la ĉesigon de Usona imperiisma interveno en Sud-Vjetnamio kaj la seriozan aplikadon de la Ĝenevaj Konvencioj de jaro 1954 celante reunuigi Vjetnamion surbaze de sendependeco kaj demo-

kratio, tiel plenumante la plej grandan sopiron de la tuta vjetnama popolo. Ankaŭ li menciis kaj bonvenigis la grandan eventon de la 44-a Kongreso de Esperanto en Varsovio, per kiu la vjetnamaj esperantistaj delegitoj havis okazon rilati amikece kaj starigi bonajn kontaktojn kun geesperantistoj el ĉiuj partoj de la mondo.

Tiuokaze, la redakcio de la revuo "Vjetnamio antaŭenmarŝas" (kiu aperos dumonate en la jaro 1960) aperigis specialan numeron honore al Zamenhof en decembro 1959. Vjetnama Radio-stacio kaj pluraj enlandaj ĵurnaloj raportis pri tiu solenaĵo Zamenhofa en Hanoi.

## En Koreio

Vespere de la 15-a decembro 1959, la Korea Esperanto Asocio organizis la solenon memore al la 100-jara datreveno de naskiĝtago de D-ro L. L. Zamenhof ĉe la klubo de la Ministerio de Komunikado, Pjengjang.

Ĉeestis la ceremonion k-do Hong-Mjenghwi, vicĉefministro de Korea Demokratia Popola Respubliko, K-do Baig-Namun, prezidanto de Korea Akademio de Sciencoj, k-do Ri-Gwgro, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de Supera Popola Kongreso, k-do Coj-Gicer, vicprezidanto de la Kultura Kunliga Komitato por alilandoj, estraranoj de Korea

## Felican Novan Jaron

*ni deziras al niaj legantoj kaj amikoj,  
kaj speciale dankas al tiuj samideanoj,  
kamaradoj kaj frataj organizoj, kiu bonvolis  
sendi al ni novjarajn kartojn aŭ salutle-  
terojn.*

*Ĉina Esperanto-Ligo*



*A.H. Tahtinen:*

## Al Popola Ĉinio

*En mondon venis nova sento,  
ĝi kvazaŭ refreŝiga vento  
la polvon de 1' jarcentoj blovas for.*

*Popoloj tie havas ion  
por rekonstrui. Ni socion  
rekreas, jam kadukan, kun fervor'.*

*"El oriento lumo", diras  
konata verso. Nun eliras  
de tie nova vivokred' al ni.*

*Ĝi al homaro militanta,  
jam vivokredon forperdanta,  
pri sankta garantias harmoni'.*

*Ĉini! Tra tempoj vi latente  
vivkredon gardis. Nun konsente  
eldiras: "Nia horo batis nun!"*

*"El oriento lumo", diras  
konata verso. Mondo spiras  
jam pli facile en matena sun'.*

Esperanto Asocio kaj de aliaj sociaj organizaĵoj, geesperantistoj en Pjengjang, laborantoj de scienco, de kulturo, de arto k.t.p.

K-do Jozefo Drijgljas, pola eksterordinara kaj plenpova ambasadoro en Korea Demokratia Popola Respubliko, kaj kulturaj ataŝeoj de aliaj ambasadorejoj estis ankaŭ invititaj.

La ĉeestintoj nombris pli ol 700 personoj entute.

Tie faris raporton k-do Song-Bong-ug, financa ministro de K. D. P. R. kaj prezidanto de KEA, pri la vivo de D-ro Zamenhof kaj nuna Esperanto-movado.

Li menciis en sia raporto ke la esperantistoj en la mondo memorigas la 15-an de decembro, la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof kiel Zamenhofan Tagon.

Li ankaŭ emfazis ke oni prospere memorigas 100-jaran datrevenon de D-ro Zamenhof, kiu postlasis grandan meriton je la inspirado de PACO kaj humanisma ideo inter diversaj popoloj.

Daŭre menciante pri la nuna stato de Esp-movado en la mondo, li montris la fakton ke centmiloj da personoj uzas Esperanton praktike kaj ne nur multaj Esperantaj periodaĵoj estas eldonataj en diversaj landoj sed ankaŭ miloj da lernolibroj kaj vortaroj estis kaj estas eldonataj, ke pluraj senmortaj verkoj de mondfamaj grandaj verkistoj estis tradukitaj kaj nemalmultaj soci-sciencaj kaj natursciencaj literaturoj, klasikaj de marksismo-leninismo estis ankaŭ eldonataj Esperante.

Li menciis precipe ankaŭ la fakton ke la Esperanto-movado en Koreio plivigliĝas en tiu ĉi jaro sub la helpo kaj gvidado de la Korea Labora Partio kaj la registaro.

Li montris ke la ideo de paca kunekzistado inter diversaj

popoloj, kaj nobla humanisma spirito kiujn D-ro L. L. Zamenhof tiel aspiris, hodiaŭ komencas efektiviĝi pere de aktiva batalo de la popoloj de socialisma tendaro kaj de pacamaj popoloj de la mondo. Fine li emfazis ke la internacia lingvo Esperanto, la genia kreaĵo postlasita de D-ro Zamenhof restas kiel altvalora trezoro kiun la homaro akiris kaj plej ĝuste ni pacdefendantoj utiligas.

En la solenejo malfermiĝis Ekspozicio kiun pliriĉigis materialoj senditaj el Ĉinio, Bulgario, Pollando kaj aliaj fratlandoj.

Tiu ĉi ekspozicio funkciis ĝis la fino de 1959 ĉe la Korea-Sovetia Frateca Ekspoziciejo kaj pli ol 10 mil personoj vizitis ĝin.

Je la fino de la dirita soleno, la Esperantaj magnetfonaj bendoj senditaj de Radio Pjengjang kaj Radio Varsovio multe interesis la ĉeestantojn.

(KEA)

## En Liepaja de Latvia SSR

Por honori la centan datrevenon de la naskiĝjaro de D-ro L. L. Zamenhof estis aranĝita en Liepaja dusemajna jubilea ekspozicio en salono de la urba muzeo, de la 13-a ĝis la 27-a de septembro. Ĝin aranĝis la Esperanto-rondo

ĉe la Liepaja Kulturdomo sub devizo "Per Esperanto por la mondpaco". Krom la atentiga artikolo en gazeto kaj sciigo per radia oni dissendis 500 presitajn invitilojn.

La ekspozicio konsistis el 12 fakoj. La unua fako enhavis la foton de D-ro L. L. Zamenhof kaj prezentas gravajn datojn kaj faktojn pri la aŭtoro de Esperanto kaj pri Esperanto-movado.

La aliaj estas la fakoj de lernolibroj kaj vortaroj el diversaj landoj (eĉ vortaro por blinduloj en 4 grandaj volumoj!), literaturoj pri Esperanto, originalaj kaj tradukitaj verkoj, eltranĉaĵoj-artikoloj pri Esperanto el la Latvia gazetaro en lastaj 3 jaroj, jarkolektoj de la revuoj "Nuntempa Bulgario", "El Popola Ĉinio" kaj diversaj Esperanto-gazetoj, bultenoj el 10 landoj, gvidlibroj, korespondaĵoj de la Liepaja Esperanto-rondo kaj diversaj memoraroj ricevitaj el diversaj landoj. Troviĝis ankaŭ granda fotalbumo prezentanta per fotoj la historion de la Liepaja Esperanto-rondo dum la jaroj 1957-1959, esperantistoj deĵoris ĉiutage en la salono por gvidi la vizitantojn tra la ekspozicio. La gastoj ne nur vidis, sed ankaŭ multon aŭdis pri Esperanto.

La ekspozicion vizitis entute 2,500 personoj. Multaj favoraj

## Aranĝintoj de la ekspozicio en Liepaja (de maldekstre): Vera Mitmane, Lidia Lange, Rudolfo Sakels, Olga Mitmane kaj Arma Gaike





opinienskriboj de la vizitantoj diras, ke la ekspozicio vekas veran intereson ĉe la rigardantoj.


L. Lange

## En urbo Rostov-Don (Sovetunio)

La 26-an de decembro 1959 en urbo Rostov-Don okazis en Domo de Sciencistoj granda Esperanta festo omaĝe al la Centjara datreveno de naskiĝtago de D-ro L. L. Zamenhof. Dum la festo oni aŭskultis la prelegojn "La aŭtoro de Esperanto D-ro Zamenhof — batalanto por paco" de docento Viktor Gruško, "D-ro Zamenhof—la fondinto de Esperanto-literaturo" de malnova Rostova esperantisto k-do Zaljetov. En la muzika parto de la festo oni kantis kun la akompanado "Ho, mia kor' !. . ." kaj deklamadis multajn Esperantajn versojn de Zamenhof, Ljudmila Evsejeva kaj aliaj.

La ĉeestantoj estis tre mirigitaj, kiam ili ekaŭdis la voĉon de fama Vjetnamia poeto-esperantisto Dao Anh Kha, kiu deklamis siajn versojn en Esperanto kaj en vietnama lingvo per magnetofono. Sekvis tuj tondro de aplaŭdoj post la deklamo. La vespero finiĝis je la komuna kantado de Esperantaj kantoj.

## Parto de la ekspozicio en Liepaja



# Esperanto marŝas

## Nova Vortaro Esperanta-Ĉina

La "Nova Vortaro Esperanta-Ĉina", longe sopirata de ĉinaj esperantistoj fine aperis ĝuste en la tago de la centjara jubileo de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof. Ĝi estas la unua vortaro kompilita kaj eldonita post la fondiĝo de Ĉina Popola Respubliko. La vortaro estas prestia en poŝa formato kun fortika bindo. En ĝi troviĝas ĉiuj vortoj de Plena Vortaro de SAT, inkluzive tiujn en la suplemento. Ofte uzataj propraj nomoj esperantigitaj estas ankaŭ enmetitaj. Ĉe la fino troviĝas ankaŭ listo de mallongigoj. La tuta vortaro ampleksas 333. paĝojn. Ĝin kompilis ĈEL kaj eldonis Komerca Presejo. Eldona kvanto de la unua eldono estas 5,000 ekzempleroj.

## Esperantaj kursoj en Koreio

Post la fondiĝo de KEA oni organizis sinsekve en Pjengjang jam du Esperantajn kursojn: La unua finiĝis en septembro en la lasta jaro kaj la dua (en du klasoj) komencis tuj en la komenco de oktobro. Partoprenis pli ol 650 personoj. Ilin gvidas k-do Hong-Gimun kaj Ri-Giin. Eldonon de presitaj lernolibroj, oni ankaŭ preparis.

## El Ĉeĥoslovakio

Esperanto-movado en Ĉeská Lípa removiĝas. Nova Kurso por komencantoj komenciĝis en lasta septembro. Por tio la distrikta kleriga domo en Ĉeská Lípa senpage pruntis ĉambron. La glernantoj diligente studas nian lingvon, por ke ili povu baldaŭ komenci korespondadon kun eksterlandaj gesamideanoj. Pro tio ili aranĝos fine de monato februaro 1960 solenan letervesperon. Ĉiuj esperantistoj en la tuta mondo estas petataj ke ili skribu salutleterojn kaj ilustritajn poŝtkartojn kaj sendu adresojn kaj proponojn por korespondado. Ĉiujn sendaĵojn sendu al: Jan Wildmann, ĈSD Ĉeská Lípa, Ĉeĥoslovakio.

## RADIO-SOFFIA

Radio-Sofia disaŭdigas en Esperanto. La programo enhavos novaĵojn, komentariojn pri enlandaj kaj eksterlandaj demandoj, raportajojn kaj prelegojn pri la ekonomia kaj la kultura vivo en Bulgario, bulgaran popolmuzikon, kaj ĉiun unuan dimanĉon de la monato—la "Poŝtkesto"-n. Je la horaroj kaj ondlogoj:

### Ĉiudimanĉe

de 19 ĝis 19,25 horo (Grinviĉa tempo).

### Ondoj:

39.11 m — 7650 kilocikloj  
41.35 m — 7255 kilocikloj

La disaŭdigo estas ripetata la saman tagon de 22.30 ĝis 22.55 horo (Grinviĉa tempo).

### Ondoj:

30.93 m — 9700 kilocikloj  
39.11 m — 7670 kilocikloj  
41.35 m — 7255 kilocikloj

demandojn, opiniojn kaj sugestojn oni skribu al RADIO-SOFIA DISAŬDIGOJ EN ESPERANTO, SOFIA, BULGARIO.

### Aŭskultu Esperantan Disaŭdigon el Koreio!

“Radio Pjengjang” komencis disaŭdigon Esperantan ekde la unua merkredo de ĉijaro kaj daŭrigos ĝin kiel jene:

Tago: merkredo

Horo: 11.00-11.30 min.  
grenviĉa tempo.

Ondoj:  
mezaj: 820 Kc.

1080 Kc.

mallongaj: 6250 Kc.

La temoj aranĝiĝos bunte. Ĉiuj opinioj aŭ proponoj estos ricevataj kun plezuro.

Korea Esperanto Asocio  
Pjeng Jang P.O. Kesto 16,  
Korea Demokratia Popola  
Respubliko

C. C. Chang:

## Iom pri la enhavo de Ĉina Antologio

Dediĉe al la centjara jubileo de Zamenhof-naskiĝo, Ĉina Esperanto-Ligo mobilizis sian forton por aperigi la Ĉinan Antologion (1949-1959). La libro ampleksas ĉ. 400 paĝojn inkluzive bildojn, inter kiuj tri estas koloraj. Ĝi konsistas el kelkdek pecoj da noveloj, skizoj kaj versaĵoj el la plumoj de pli ol 30 beletristoj de moderna Ĉinio.

Kiel kunlaboranto de Ĉina Esperanto-Ligo, mi havis la okazon tralegi la tutan manuskripton de tiu ĉi unika eldonaĵo de la ĝisnuna ĉina Esperanto-movado, kaj mi sentas, ke mi havas la devon ĝin prezenti al la esp-ista publiko.

La antologio konsistas el du partoj: versaĵoj kaj prozoj, kaj la lasta estas plue dividita en noveloj kaj skizoj. Estas entute 17 noveloj kaj 3 skizoj. En la parto de poezio sin trovas 21 poemoj, inkluzive 4 poemojn de Prezidanto Maŭ Ze-dong, kiu estas ne nur granda marksisto, politikisto, strategiisto sed ankaŭ granda poeto de nia epoko.

La temoj de la noveloj, skizoj kaj poemoj estas tre diversaj, tamen, ili senescepte spegulas la vivon kaj batalon de la ĉina popolo, kiu, dum la pasintaj cent jaroj, travivis neesprimeblajn suferojn, mizerojn kaj akrajn

militojn kaj revoluciojn, sed nun konstruas sian feliĉan vivon per propraj liberigitaj manoj.

Mankas al mi sufiĉa spaco por detale klarigi ĉiujn temojn priskribitajn. Ĉi tie mi povas nur limigi min al temoj de noveloj.

Estas tri noveloj (Neĝfloro de Marto, Partia Kotizo kaj Neĝa Tago) kiuj temas pri la pasintaj revoluciaj bataloj. Ili priskribas, kiel la ĉinaj popolamasoj sinofere batalis kontraŭ enlandaj kaj eksterlandaj subpremantoj sub terure malfacilaj kondiĉoj. Kiam mi tralegis ilin, mi estis tiel kortusitaj, ke mi povas neniel deteni miajn larmojn. Leginte tiujn novelojn kaj iom koninte la grandajn suferojn kaj sinofere-majn batalojn de la ĉinaj popolamasoj en la pasinteco, oni povas pli klare kompreni, kial ili, sin liberiginte el ekspluatado kaj subpremado, nun dediĉas sin tiel fervore al la grandioza socialisma konstruado per sia tuta forto.

La novelo “Sur la Ŝoseo kun Leviĝanta Polvo” temas pri la milito kontraŭ Usonaj imperiistoj en Koreio. Ĝi priskribas, kiel heroe kaj samtempe sagace batalis la ĉinaj volontuloj ŝultron ĉe ŝultro kun la korea armeo sur la korea batalkampo por kune defendi la du fratajn nove liberigitajn landojn kontraŭ la invado

de Usonaj imperiistoj. Tiu ĉi novelo iagrade malkovris al ni la sekreton, kial la malbone ekipitaj ĉinaj volontuloj, kune kun siaj koreaj kunbatalantoj, fine venkis la Usonajn invadantojn, kiuj estis superaj en armiloj.

Interesa estas la novelo “La Potenco de Kombajno”, kiu temas pri la rilato inter junaj geedzoj en la vilaĝo de nova Ĉinio. Ĝi priskribas, ke en la rilato inter la junaj geedzoj estas ne nur amo sed io pli, io nova.

La aliaj noveloj temas pri la vivo kaj laboro de nuntempaj ĉinaj laboristoj kaj kamparanoj, precipe pri ilia sindona laborado dum la granda impeto de produktado. En tiuj noveloj oni povas klare vidi, kiel la ĉinaj popolamasoj energioplene rekonstruas sian landon kaj samtempe sin mem — fari sin novaj konsciaj homoj.

Tio, kion mi diris pri la noveloj ankaŭ validas por la skizoj kaj poemoj. Ili prezentas al la legantoj diversajn bildojn, kiujn la ĉina popolo pentris kaj pentras per sia sango, larmo kaj ŝvito, kaj iafoje ankaŭ per rido kaj fiero.

De la vidpunkto de belarto, la antologio ankaŭ povas esti rigardata kiel kontentiga. Estas notinde, ke multaj verkistoj prezentitaj estas ankoraŭ sufiĉe junaj, kaj kelkaj estas eĉ nove debutintaj. Ili estas ankoraŭ grim pantaj al la alta montpinto de belarto. Tamen, ili devenas de la amasoj, travivantaj kaj travivantaj la amasajn batalojn, do ili profunde konas la realan vivon, kiun ili realisme reproduktis en siaj verkoj. Kaj dank’ al tio, iliaj verkoj donas al la legantoj senton de realeco, freŝeco kaj viveco, kaj ankaŭ ian forton de la nobla ideo por progreso de la homaro.

Traleinte la antologion, vi trovos, ke ĝi iomgrade prezentas al vi la gigantan figuron de ĉina popolamaso, kiu senlace kaj grandpaŝe marŝas antaŭen kaj antaŭen.





# SUR NIA LIBROBRETO

**Plena Gramatiko de Esperanto** verkita de K. Kalocsay kaj G. Waringhien: La unuan kajeron de la tria eldono jam eldonis Esperanto-Propaganda Centro. Casella postale 1175, Milano, Italujo. Prezo de la kompleta verko estas it. liroj 4,200 aŭ egalvaloro, inkluzive de la sendokostoj.

Eble ĝi estas verko de Esperanta gramatiko timige granda kaj kompleksa por komencantoj aŭ tiuj kiuj nur volas iom sin distri per Esperanto kaj neniam volas serioze sin doni al la verkado en la lingvo kaj partopreni en la kolektiva kreado de la lingvo. Se male oni jam ellernis la fundamenton de la lingvo kaj komencis serioze verki Esperante por laŭvole esprimi sian kompleksan penson pri la kompleksa disvolviĝanta homa vivo plena de kontraŭdiroj, tiam la Plena Gramatiko de Esperanto fariĝas nepre necesa konsilanto, kiu montras al vi la disvolviĝantan uzadon de la lingvo, la tendencan de la disvolviĝo, la subtilajn nuancojn de esprimrimedoj, la nesolvitajn problemojn de esprimo kaj la proponitajn solvojn. La antaŭaj eldonoj estis kaj estas mia konstanta konsilanto - instruisto dum mia Esperanta laboro. Ĝi ne diktas regulojn al vi sed pensige diskutas kun vi, ke vi mem serioze partoprenu en la lingvokreado en praktika uzado. Trafoliumante la bonvenan unuan kajeron de la tria eldono, mi trovis, ke ĝi estas pli riĉa en ekzemploj kaj pli detala en klarigoj. Mi esperas, ke la dua kaj tria kajeroj baldaŭ elduniĝos kaj venos al nia helpo en nia Esperanta laboro.

Sendube, kvankam granda kaj kompleksa, la Plena Gramatiko de Esperanto ne povas solvi ĉiujn

problemojn. Ekzemple, mi menciuj la jenajn:

1. La aŭtoroj opinias ke la distingo inter la komunaj kaj propraj nomoj ne ĉiam estas facila, ke *Vieno* estas propra nomo, tamen ekzistas almenaŭ du Vienoj en Eŭropo, dum ekzistas nur unu suno, kio tamen estas komuna nomo (§28). Ŝajnas al mi, ĉi tie ne troviĝas granda malfacilo, ĉar la aŭtoroj ja diras, ke la komunaj nomoj servas por nomi klason, specon de uloj aŭ aĵoj (kies komunan karakteron, kompreneble, la komuna nomo esprimas), kaj ke la propraj nomoj servas por nomi individue ulon aŭ aĵon (kies karakteron, kompreneble, la propra nomo neniel esprimas). Por komuna nomo oni ĉiam povas doni difinon, dum al propra nomo oni ne povas. Oni povas difini *sunon* kiel "centra lumiga kaj varmiga astro de planedaro", do "suno" estas komuna nomo. Aliflanke, oni ne povas difini *Vieno* kiel "ĉefurbo de Aŭstrio", ĉar ne ĉiuj Vienoj estas ĉefurboj de Aŭstrio, kaj la nuna ĉefurbo de Aŭstrio estas nomata Vieno ankaŭ ne pro tio, ke ĝi estas la ĉefurbo — eble ĝi iam ne estis aŭ ne estos la ĉefurbo. Unuvorte, *Vieno* ne signifas "ĉefurbo de Aŭstrio", sed *suno* signifas "centra lumiga kaj varmiga astro de planedaro", tial tiu estas propra nomo kaj ĉi tiu, komuna nomo.

2. § 30 ... havas veran valoron de substantivo ... la kvantaj adverboj *iom*, *neniom*, *kelke da*, *multe da*, *malmulte da*: "sur la arbo sin trovis multe (aŭ multo) da birdoj"; "mi volus iom da teo"; "ni havis jam neniom da mono".

§ 84. Kiel kvantaj adjektivoj funkcias laŭ sia senco ankaŭ la

formoj *kiom da*, *tiom da*, *iom da*, *ĉiom da*, *neniom da* ...

Laŭ la klarigo de § 30, en la frazo "mi volus iom da teo", *iom* havas valoron de substantivo uzata kiel objekto. Sed laŭ la klarigo de § 84, *iom da*, funkcias kiel adjektivo kaj do *teo* devas esti objekto en la akuzativa kazo, *teon*. Tamen, fakte, neniu tiel parolas aŭ skribas. Kaj krome, *da* ja estas prepozicio. Kiel povas substantivo post prepozicio esti objekto de verbo antaŭ la prepozicio? Tio faras la logikan gramatikon de Esperanto senbezzone neiogika, kompleksa kaj malfacila. Tial mi opinias, ke la klarigo de § 84 estas malprava kaj malutila.

Por la klarigo en § 30 ankaŭ restas problemoj, ŝajnas al mi, neklarigita. Ekzemple, se oni diras, "Kiom da libroj estas bonaj kaj kiom malbonaj?" kial la predikativo *bonaj* akordiĝas nombre kun la substantivo *libroj* post la prepozicio kaj ne neŭtrale kun la adverba subjekto *kiom* alprenante la adverban finon *-e*? Ĉu tion oni povas klarigi jene: *kelke* estas subjekto laŭ formo dum *libroj* estas subjekto laŭ senco?

Eble ankaŭ estas erare menciitaj *kelke da*, *multe da*, *malmulte da* anstataŭ *kelke*, *multe*, *malmulte* apud *iom* kaj *neniom* kiel adverboj. (§ 30)

3. Ankaŭ en la tria eldono ne troviĝas klarigo pri la jena malfacilo en parolo aŭ skribo de granda nombro. Ekzemple se ni diras, "Ni havas 2,852,784 volumojn da libroj en nia biblioteko", ĉu estas korekte uzi volumojn en



la akuzativo? Se jes, kiel legu la nombron? Ĉu "du milionojn, en la akuzativo? Se jes, kiel legu la nombron? Ĉu "du milionojn, okcent kvindek du mil, sepcent okdek kvar da volumoj ..."? Ĉar post la substantivo *milionoj* oni ja devas uzi *da* antaŭ la sekvanta substantivo *volumojn*, kies akuzativan finon *-n* oni devas forstrecki. Tamen, oni ofte parolas kaj skribas la substantivon en tia oka-

zo en la akuzativo. Ĉu oni rigardas "*milionojn*" kiel nevarian same kiel la aliaj numeraloj kaj legas ĝin *milion*?

Klarigoj pri la supre menciitaj problemoj de la aŭtoroj certe estos bonvenaj kaj helpodonaj al seriozaj studentoj de Esperanto.

Kiel preseraron mi nur hazarde trovis unu, tio estas *kunigais* anstataŭ *kunigas*, L 15, p. 64.

V. Fon

\* **22-jara junulo** dez. kor. kun tuta mondo pri radio, astronomio, lingvoscienco; interŝ. ankaŭ jurnalojn, revuojn, bk., fotojn. Skribu Esp-e aŭ angle. Adr.: **Niktor A.** Podavaj, Magadan-4, USSR.

\* Rumana nova esp-isto **Konstantin Delta** dez. kor. pri p.m., literaturo kaj inters. bk., sportprogramojn kaj muzikdiskojn. Adr.: Rumanio—Bukureŝto 35, R. Lekin. str. Dr. E. Iosif 3.

\* **14 bulgaraj gekursanoj** (flegistinoj kaj kuracistoj) dez. kor. kun ges-anoj en Aziaj kaj Afrikaj landoj pri diversaj temoj inkluzive interŝ. de libroj kaj bk., Adresu al: instruisto **Nikolaj P. Nikolov**, ul. M. Simeon 16, Kolarovgrad, Bulgario.

\* **Vladimir Belajev**, artisto de dramteatro, dez. kor. kaj interŝ. art-kartojn, p.m., il. revuoj, ktp, resp. garantiata. Adr.: USSR Nord Kakaz, Groznij, ul. Polejaeva, 3/30 kv. 38.

\* **E-rondeto de inĝ. gestudentoj** volas kontakti kun ĉinaj kaj vietnamaj studentaj E-grupoj. Niaj membroj dez. kor. ankaŭ tutmonde, precipe pri teknikaj temoj. Adr.: USSR. Litovio, Kaunas 6, KPI—Esperanto.

\* **K-do inĝ. Azarij Perelman** dez. ricevi Plenan Esp-Esp-an Vortaron. Rekomencos laŭ deziro de la sendinto. Adr.: USSR, urbo Barnaul, str. 21 janvarja, n-ro 17-V, kv. 3.

\* **Bartulec Paulo**, Stonava 110, Silezio, Ĉeĥoslovakio.

\* **Du fervojfiscistoj** deziras korespondi kun ĉinaj kaj orientlandaj geesperantistoj, interŝ. pm. kaj bk. Adresoj: **Czirjak Eugen**, CLUJ, str. Armater Rosii 1, Rumanio. **Reitmayer George**, CLUJ, str. Horea 62, Rumanio.

\* **S-ino Fernanda DESSERTENNE**, Germolles-sur-Grosne par TRAMAYES (S-et-L) Francio, dez. kor. kun ĉinaj, hindaj, koreaj, Vietnamiaj kaj Indoneziaj esp-istoj.



## Korespondi deziras

\* **Diversaĝa Esperanto-grupo de esperantist(in)oj en urbo Rostov-Don** volas korespondi kun diverslandaj samlingvanoj-amikoj de Paco kaj Amikeco. Skribu amase: ĉiu letero estos respondita. Indiku viajn interesojn, aĝon, sekson, okupon, profesion kaj NEPRE klare kaj legeble preslitere skribu vian adreson. Nia adreso estas: USSR (Sovet-Unio), Rostov-Don 6, Socialistiĉeskaja ul. 169, kv. 4, Docento Viktor Gruŝko.

\* **36 gesamideanoj** (geoficistoj kaj gelaboristoj) dez. amikan korespondadon kun gesamideanoj el tuta mondo. Skribu al inĝ-ero Veselin Kirilov, Zavod "Elprom" Sliven, Bulgario.

\* **Natarau Ioan**, Căramidari 116, Baia—Mare, Rumanio, 25-jara junulo, dez. kor. kaj interŝ. pm. kaj bk. kun ĉiuj landoj.

\* **Du bulgaraj esp-istoj** dez. kor. kun ĉinaj amikoj: Georgi Ivanov kovaĉev, kv. Palauzovo Gabrovo, Bulgario; Petro Totev Petkov, str. Skobelevska 30 apt. 20, Gabrovo, Bulgario.

\* **36 gimnazianoj** — 11-12-jaraj knaboj kaj knabinoj — kiuj kiel oficiala eksperimenta instruado ĝuas instruadon de Esperanto, kiel unu fremda lingvo, sekvata sekvan jaron de la germana, dum oni depost la dua klaso instruos al ili iun fakon — eble la geografion per Esperanto —

deziras kontakti kun samaĝaj Esperanto-kursanoj—volonte korespondus kun la gepatroj de alilandaj esperantistaj geknaboj. Adreso nur: Esperanto, Somero, Finnlando, Eŭropo.

\* **Penka Popova**, str. Dobruĝa 11, Tirnovo, Bulgario, 54-jara instruistino dez. kor. kun ekstereŭropaj landoj.


\* **4 geesp-istoj ĉeĥoslovakaj** serĉas kor. kontaktojn; s-ino Mirka Baierova, Trzni 643, Strakonice; s-ino Jiřina Marzova, Strakonice 11/6; s-ro Václav Kalous, Sidlište 662, Strakonice I; s-ro Antonin Trtek, Klostermannova 203, Strakonice II. Ĉiuj en Ĉeĥoslovakio.

\* **Edward Piskorski**, 48-jara instruisto, La Lernejo 4, Piekary Sl., Pollando, kor. volonte kun ĉinaj gekolegoj pri lernejoj kaj aliaj temoj. Resp. garantiata.

\* **Jose V. Espinosa**, Apertado 4571, Maracay, Aragua, Venezuelo, dez. ricevi ABC-librojn uzatajn de infanoj en unua klaso de elementa lernejo, por aranĝi tutmondan ekspozicion. Libroj devas esti postmilitaj kaj nacilinvaj. Mi rekomencos per simila literaturo de mia lando.

\* **D-ro Georgi Zahov**, str. Silvestar 8, Tirnovo, Bulgario, kuracisto-internisto dez. kor. kun kuracistoj-internistoj prefere pri kuracado de hipertonio, kronikaj nefritoj, akuta leŭkemio.






Unu el la moderne ekipitaj laborejoj: la muntlinio de cilindroj.




La ĝenerala muntlino.

54-ĉevalpovaj traktoroj elproduktiĝis pogrande.



La fabriko donacas sian produktaĵon al la najbara Ĝianhe-a Popolkomunumo.

La traktoroj de la 1-a Traktora Fabriko forte antaŭenpuŝos la mekanikigon de ĉina agrikulturo.





KUL  
BIBLIOTEKA